

DUOBLA NUMERO.

3<sup>ra</sup> JARO.

CELANIO

N<sup>ro</sup> 2-3

# TRA LA MONDO.

· TVTMONDA · ILVSTRATA · REVUO · ESPERANTISTA ·

AUG<sup>o</sup>. — SEPT<sup>o</sup>.

1907.

EVROPO

ASIO

AFRIKO

AMERIKO



## ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

**DIVERSAĴOJ** : Mia Patrujo, de *P. Fewings* (AŬSTRALIO).

La Japana Skribmaniero, de *Rev. C. Steenbuch* (JAPANUJO).

**LITERATURA PAĜO** : Ŝvarc, de *Fino Helena Hempel* (POLUJO).

**FELIETONO** : Duonsurda, originala komedio de *Roksano* (FRANCUJO).

**PRI ESPERANTO** : La « Tria », de *A. Montrosier*, *Steletoj* kaj *Th. Rousseau* (FRANCUJO).

La dudekjara jubileo de Esperanto, de *Steletoj*.  
Kroniko-Bibliografio.

**MIKSAĴOJ** : Ludoj, Amuzaĵoj, de *Brunet Ch.* (FRANCUJO).

**ĈIULANDA VIVADO** : Internacia enketo pri edukado. — Raporto de *Pro Th. Rousseau* (FRANCUJO) laŭ dokumentoj de *St<sup>oj</sup> James Knight* (SKOTLANDO) kaj *J. W. Eggleton* (GERMANUJO), *Iwamura* kaj *Horio* (JAPANUJO), *E. Webber* (NOVA ZELANDO).

**SCIENCJOJ** : La Spiritismo, de *Marcel Finot* (FRANCUJO).

**MILITISTARO KAJ MARISTARO** : Esperanto kaj Ruĝa-Kruco, de *D<sup>o</sup> Artigues* (FRANCUJO).

**TRA LA MONDO** : En la polusaj regionoj; Vojaĝo de *Amundsen* (NORVEGO), de *Pro Bord* (FRANCUJO).



DUOBLA NUMERO : 1 fr. 50 (0,60 Sm.).

CAROLINE  
1907. OXFENFORD. E.V.

« Tra la Mondo » aperas **REGULE KAJ AKURATE** la lastan tagon de ĉiu monato.

## REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S<sup>o</sup> Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)  
Manuskripto, kaj mendoj KUN MONO, devas esti sendataj al:

**Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.**

Urĝaj sciigoj; **REKLAMOJ, ANONCOJ**, k. a. devas alveni antaŭ de 10<sup>a</sup> de ĉiu monato, por la tuj elironta N<sup>o</sup>  
Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de  
specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia *efektiva* valoro.

**Jara abono : 8 fr. ĉiulande. (1<sup>a</sup> Jaro : 12 fr.) — Duona : 4.50 fr. — Kvarona : 2.25 fr. — Unu kajero : 75 c.**


**RIPREZENTANTOJ**: Brita Imperio: British Esperanto Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.  
Svedujo: S<sup>vo</sup> P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

« TRA LA MONDO » estas aĉetebla ponumere ĉe la Librairie de l'Esperanto.

**POŝTAJ ABONOJ** en la jenaj landoj: *Belga, Dana, Franca, Itala, Norvega, Portugala, Sveda, Svisa.*

## ASP KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza,  
Oportuna, Pura,  
Neestingebla  
en Ventego,  
Funkciadas bonege  
nur kiam oni uzas  
la por ĝi

**Konstruitajn ASP-Kandelojn**

145.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn, = Spes. 2,20

kun lenso 5 kronojn, = » 2,75

18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn = » 0,83

SENDOTA ĈIEN DE


**O. F. ASP, Kopenhague.  
DANUJO.**

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

Generala Agento:

S<sup>ro</sup> G. RUTTER, 30, Red  
Lion Squar, LONDON.



## Fandejo por presiloj **DEBERNY kaj K<sup>o</sup>**

52, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto  
pri skribliteroj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fanta-  
ziaĵoj. Presliteroj kun supersignoj specialaj  
por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj **ESPERANTO**.  
La fandejo **DEBERNY kaj K<sup>o</sup>** sendos, laŭ peto,  
presprovaĵojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi  
posedas la specialajn supersignojn por **ES-  
PERANTO**.

**La universalaj « Ŝlosilaro » kaj « Tutaro ».**

Ĉarman volumeton ni ricevis antaŭ ne longe:  
« La Universala Ŝlosilaro », enhavantan, sub eleg-  
anta karakteriza bindaĵo, 7 ŝlosilojn, nome: angla,  
dana, franca, germana, hispana, itala, sveda. Post  
la bindo de tiu libreto, vera *breviero de l'vojaĝema  
esperantisto*, aperis ankaŭ la hungara, brazila kaj  
portugala ŝlosiloj, kaj baldaŭ eliros la ĉeĥa kaj  
holanda. La « Ŝlosilaro » kostas 1 ŝil. (0,50 Sm.)

La « Ĉefeĉ » aĵoj enhavas ankaŭ la « Tuto » jn,  
t. e. diverslingve, « La Tuto de Esperanto, kaj  
la rimedo ĝin lerni sen lecionoj, legante mal-  
grandan historion » Tiu propagandilo, sagace  
elpensita, konsistas el ŝlosilo kaj el historieto en  
Esperanto kun la subvorta traduko, kaj kun klarigaj  
aldonoj ebligantaj la plenan komprenon de l' lingv-  
aj principoj. Jam aperis la « Tuto » por Angloj,  
Danoj, Francoj, Germanoj, Hispanoj kaj Italoj.

Kiel niaj abonintoj povis ĝin vidi per la folio  
klariga enmetita en nian lastan n<sup>on</sup>, ambaŭ  
propagandiloj montras bonege la superecon de  
Esperanto kompare kun la aliaj artefaritaj  
lingvoj. Oni ne tro scius rekomendi ilin al  
grupoj kaj al propagandistoj. Ni rememorigas,  
ke ili estas aĉeteblaj *kondiĉe* po 3 fr. 50 (1,40  
Sm.) aŭ 7 fr. 50 (3 Sm.) ĉiu centoj kun reklama  
kartono por la fenestroj de la librovendistoj.

Ni rememorigu fine, ke la agema elpensito  
de ambaŭ verketoj, ne plu povante daŭrigi sola  
la teruran laboradon kaŭzatan de la eldonado  
kaj disvendado, kaj dezirante certigi la sen-  
dependecon de la entrepreno, transdonis ĝin al  
speciala komitato el sep anglaj esperantistoj:

S<sup>ro</sup> James Blaikie M.A. (Cantab.), Major-  
Generalo George Cox, B.A. (Cantab.), S<sup>roj</sup> H. F.  
Höveler (*Ĉefeĉ*), E. L. Kearney, M. A. (Cantab.),  
E. A. Millidge, *ĉefredaktoro de The British  
Esperantist*, H. Bolingbroke Mudie, *ano de la  
organiza Trio por la Kongreso en Cambridge*,  
S. Nicholl, *honora sekretario de la Brita Esper-  
antista Asocio*.

Al tiu komitato, direktata de Major-Generalo  
Cox, kaj nomata « *Internacia Esperantista pro-  
pagandejo* » devas esti sendataj ĉiuj mendoj,  
leteroj kaj mensejoj, kiel estas skribite sur  
la kovrila anonco.

« T. L. M. »

**Dezirans korespondi.** Gust. Volfram, komerca  
korespondanto, Hannover, Goethe-str. 29<sup>11</sup> r.  
(Germanujo) deziras korespondi Esperante kun  
negermanoj pri komercaj aferoj k. t. p., inter-  
ŝanĝi ilust. poŝtkartojn (urbaj vidoj) kaj foto-  
grafajojn.

## ★ ESPERANTO ★

Duonmonata internacia Gazeto.

*La plej ofta! La plej malkara! La plej disvastigata!*

**Tutmonda Informilo — Korespondantoj en ĉiuj landoj.** — Informoj pri  
politiko, komerco & industrio, financo, statistiko, legoscienco, instruado,  
teatro, k. t. p.

**Felietono — Kroniko politika — Internaciaj Enketoj — Konkursoj por  
la legantoj kun valoraj premioj.**

**Esperanto**, en speciala parto, publikigas ĉiujn sciigojn pri la praktika  
uzado de Esperanto; ĝi estas la organo de la konsuloj, Esp. Oficoj,  
kaj specialaj peresperantaj societoj.

**Esperanto** aperas en ĵurnala formato. Ĝi estas aĉetebla ĉe la belgaj,  
francaj, svisaj, svedaj, stacidomoj, kaj ĉe multaj publikaj ĵurnalvendejoj  
en ĉiuj landoj.

Unu numero: 10 centimoj (4 Sd.). Jarabono: 3 frankoj (1,20 Sm.).

Direkcio: 8 rue Bovy-Lysberg, Genève [Svisujo].

## FERVOJOJ

DE

**PARIS — LYON — MÉDITERRANÉE.**

La kompanio P. L. M. ĵus eldonis serion el 25 poŝtkartoj  
montrantaj, kun koloroj, la plej rimarkindajn el ĝiaj afiŝoj  
ilustritaj.

Tiuj 25 poŝtkartoj, enmetitaj en poŝeton, estas vendataj en  
la bibliotekoj de l' ĉefaj stacidomoj de la relreto, je la prezo  
1 fr. (0,40 Sm.); tiuj kartoj estas ankaŭ vendataj aparte po  
0 fr 05 (2 sd.) ĉiu ekzemplero. La poŝeto estas sendata hejmen  
laŭ peto akompanata de 1 fr. poŝtmarke, kaj adresita al « Service  
Central de l'Exploitation, 20, boulevard Diderot, Paris ».



**Tre atentinda por la kolektistoj.**



ARTEZA BORO EN AŬSTRALIO.

*Taga livero : 1.000.000 da anglaj galonoj, t. e. 45.000 hektolitroj.*

## Mia patrujo.

Ni estas feliĉaj enpresi hodiaŭ tre interesan artikolon pri Aŭstralio, de nia klera korespondanto kaj amiko P. Fewings, kunlaboranto de la fama « Brisbane observer ». De ĉirkaŭe unu jaro, S-ro P. Fewings verkas regule « notojn esperantistajn » por tiu ĵurnalo, kiuj potence efikas por la propagando de Esperanto en Queensland.

La nuna artikolo ne malpli efikas por konigi al multaj el niaj legantoj landon nekŝatatan, aŭ pri kiu kelkaj havas ankoraŭ falsajn ideojn. Je ilia nomo ni sincere dankas la distingindan aŭtoron. (1)

Vi petis min verki ion! Mi ne deziras nei vian peton; kaj samtempe mi sentas, ke ĝi estas tre simila al nesingardemeco, se nelertulo prenas sur sin tian aferon.

Tamen — « nekuraĝa koro neniam gajnis beletan virinon » — kiel diras nia proverbo.

Mia patrujo estas mia temo! Ne pensu, miaj legantoj, ĉar mi loĝas en lando, kie iam nigraj hommanĝuloj (kanibaloj) loĝis, kaj ĉar mia patro venis al tiu ĉi lando por helpi kristanigi ĝiajn nigrajn enlandulojn, ke mi priskribos grandan kaldronegon, en kiu multe da misiistoj — rostitaj aŭ bolitaj — trovis lastan surteran restejon dum hommanĝula festeno!

Mia patrolando estas mia temo! Mia komunikiga perilo estas la lingvo internacia; mia legantaro loĝas en Esperantujo. Tial mi scias ke tio, kion mi verkas, estos komprenata de Esperantujanoj — eble.

Ni, Queensland'anoj (Kvinslandanoj) kutimas nomi nian ŝtaton — la plej beleta ŝtato de la Aŭstralia federacio. Vere ĝi estas nur infano inter

la terglobaj nacioj, sed plenega je forto kaj natura riĉeco, ĉiam peneganta antaŭen puŝi kaj disvastigi siajn naturajn industriojn, mineralan, terkulturan, paŝtejan, ŝaflanan, k. t. p.

Ni solenigos nian jubileon la dekan tagon de Decembro 1909<sup>a</sup>; tial ni ne estas duoncentjaraj kiel sendependa, memstara, memrega ŝtato. La ŝtatanoj estas optimismoplenaj, kaj havas grandan fidon al sia lando.

Kiam ajn mi pripensas pri tiu ĉi lando, mi ĉiam tuj rememoriĝas la vortojn de profeto « Isiah » (XXXV. I et passim).

« Ĉar en la dezerto la akvoj trarompos la teron kaj riveretoj fluos ».

« La sekiĝita tero fariĝos laĝeto », « kaj en soifantaj landoj estos fontoj de akvo ».

« En la loĝejo de drakoj, kie iuj kuŝis, estos herbaro kun kanoj kaj junkoj. »

« Nenia leono estos tie, nek ia englutema sovaĝa besto loĝos tie. Ĝi ne estos trovata » k. t. p.

(1) La tre belaj ilustraĵoj, kiuj akompanas la tekston, estas ŝuldataj al la ajableco de F<sup>ino</sup> Marian Frazer, samideanino, kiu instigis sian fraton, S-ro Murray Frazer — la ĉefa gravuristo kaj kliŝajisto de Brisbane — ilin fari speciale por « Tra la Mondo ». Ni tre dankas ambaŭ, tiom pli ke, malaware, S-ro Murray Frazer donacis la kliŝaĵojn, kiel estimatesto por Esperanto kaj por « Tra la Mondo ».



SERĈADO PRO ORO.

Estas stranga koincido, ke estas tiom da naturaj faktoj aŭ aĵoj en Queensland'o, nuntempe akordiĝantaj kun la antaŭdiro Isiah'a.

Ni pripensu ilin mallonge.

« En la dezerto la akvoj trarompos la teron kaj riveretoj fluos ». Ĉiu scias, ke dum la pasintaj dudek kvin jaroj per la « artezaj boroj » (1) (aŭ simpledire « boroj ») la akvoj litere trarompis (eĉ trarompegis) la teron, simile al grandegaj fontoj, en la dezertaj lokoj tra la longeco kaj larĝeco de okcidenta Queensland'o trans la « Main » (Men) montaro, sur kies krutetaj okcidentaj flankoj estas la enirejo (kiel la scienculoj diras) de la subteraj akvoj en la « Blythdale-Braystone » formado, tre poroza (truriĉa) tie.

Tiuj ĉi akvoj trarompas la teron kaj elversas siajn fluidajn ŝarĝojn ofte po 1,000,000 da galonoj (2) ĉiutage; kaj sekve, riveretoj fluas en la dezertaj lokoj.

Nun estas centoj da tiuj ĉi « boroj » ŝprucigantaj sen ĉesado siajn akvajjn trezorojn, egalvalorajn je la plej bona dividendhaviga orminejo. La « bor » akvoj, esceptinte se la elfluo estas tro forta, estas kelkfoje « jungataj » kaj kondukataj per tubaĵoj por provizi la kamparajn urbetojn je akvo, kiu estas uzata por superverŝi la ĝardenojn, por sin bani, por trinki, por lavadi, k. t. p.

Foje, la skribanto alvenis somere en urbeton kamparan je la kvina horo matene, kaj post longa

tutnokta vojaĝo vagonara imagis, ke malvarma bano estos tre refreŝiga. Iom poste en hotelo — sub la pluvbano — la krano turniĝas... la atendanta laculo subite estas sub superverŝado de varma « bor » akvo je ĉirkaŭe dekdu gradoj super la homsaŭga temperaturo! Mil diabloj!

« La sekigita tero fariĝos lageto ».

Ne ĉiam per « bor » akvoj plenigantaj la kavajn lokojn, sed per la mano kaj laboro de viroj, kiuj konstruis grandajn akvujegojn per akvoŝtopiloj, en la lokoj kie la akvo fluas post pluvo.

« En la soifantaj landoj estos fontoj de akvo ».

Kiel vera tio ĉi estas! La akvoj de la « boroj » elŝprucas ĝis alto je multaj futoj (ducent ofte) en la aeron kaj poste, falintaj teren, forfluas riverete. Senĉesa fluo! Ja mirindaj estas tiuj ĉi vidaĵoj.

« En la loĝejo de drakoj, kie iuj kuŝis, estos herbaro kun kanoj kaj junkoj ».

Ree en la lando de la « boroj », en la antikvaj riveraj kuŝejoj, grandegaj elfositaĵoj estas trovitaj: la restaĵoj de grandegaj timigaj bestoj — veraj drakoj, ekzemple la « palemnarĥos » (antikvalagetestro) — grandega monstro! kaj la deprotodo — antikva « Kangaru » (makropo), la geologia prapatro de nia sendanĝera, gracia, nuntempa « kangaru », ĉirkaŭe dudek futojn altkreska; krom tiuj ĉi estas multe da aliaj elfositaĵoj pli-malpli

(1) Tio, kion ni nomas arteza boro aŭ mallongige « boro », bezonas klarigon. Ĉiu Esperantisto scias, kion « bori » signifas. Mi uzas la vorton « boro », substantive, kiel la plej taŭgan vorton por esprimi tion, kion ni nomas angle « bore » (elp. bor).

Per granda borilo (iafoje diamanta borilo) malgranda truo estas farata tre profunde en la teron, kelkfoje je profundo du aŭ tri milojn da futoj. La viroj, kiuj estas dungitaj por tia ĉi laboro, estas nomitaj « putoboristoj ». Tubaĵoj estas enmetataj samtempe, kaj tuj kiam la subtera akvujo estas atingita, la akvo trafluas la tubaĵon jen rapidege, jen malrapide; aliffoje la akvo ne alvenas al la supro de la tubaĵo; liaokaze, ĝi estas elpumpata. Ordinare la akvo estas varma, iafoje ĝi estas varmega.

Ni nomas la tutan aferon: tubaĵon, akvoŝtuadon, k. t. p. — « bore ». Boro (radika vorto: bor), havas nenian alian signifon Esperante. Arteza estas geografia nomo laŭ la franca provinco « Artois ».

(2) « gallon » estas angla fluida mezurilo.



ĜARDENO BOTANIKA EN BRISBANE.  
Mirinda kreskaĵaro eliras el tero en Queensland.

grandaj. Nia muzeo havas grandan kolekton el tiuj ĉi.

« Estos herbaro kun kanoj kaj junkoj »

Laŭlonge de la bordoj de la diritaj riveretoj kreskas sufiĉege kanoj kaj junkoj, kiuj verŝajne ne estas konataj ie en la lando. De kie ili devenas, neniu ŝajnas povi klarigi. Sufiĉas diri, ke kie la « bor » akvoj riveretiĝas, tie kreskas tiuj ĉi strangaj kanoj kaj junkoj.

Mi malkredas tute al la abiojenezoterio pri ilia deveno (kiel la nesciulo diras; iaj personoj estas

neniam kontentigitaj, escepte se tio, kion ili ne komprenas, havas misteran supernaturan devenon). La kanosemoj estas ĉu en la tero longatempempe atendintaj la ĝustajn kondiĉojn por povi burĝoniĝi kaj kreski, ĉu en la akvo mem, aŭ, plej iĝeble, la akvo-birdoj alportas la semojn de malproksime sur siaj plumoj, aŭ piedoj, aŭ bekoj.

« Nenia leono estos tie nek ia englutema sovaĝa besto loĝos tie. »

Estas rimarkinde, ke en tiu ĉi lando nenia leono aŭ elfositaja postsigno leona estis iam trovita.



SAKOJ DE LANO SUR ŜARĜVETURILOJ  
Alvenantaj ĉe Charleville, en okcidenta Queensland.



Queensland Club, from Botanical Gardens.

QUEENSLAND'A KLUBO.

Antaŭe, fontano kaj palmoj de la ĝardeno botanika.

Nek ia englutema besto loĝas tie, kaj estas tute nekonata en la lando. Ĉiuj tiuj ĉi koincidoj estas vere rimarkindaj.

La « Brita-Izraela » entuziasmulo vidas, je tiuj ĉi diritaĵoj, pluan evidentecon de siaj teorioj; nome ke la Britujanoj estas la senditaj dek gentoj Izraelaj.

Kia disendo al la okcidenta Queensland'o estis la eltrovo de la subteraj akvoj, tiu ĉi senfiniĝa provizo!

Plejeksterordinara afero okazis ĉe la urbo nomita Roma'o: La ĉielo ja estis malavara, donacegema. El unu boro, akvo kaj natura gaso elfluis kune. Tio ĉi daŭris dum ia tempo. Amiko mia, ŝerce, ekbruligis per alumedo la gason fluantan el la tubaĵo, kaj oni tiam vidis, kvazaŭ brulanta akvo elfluus el la tubaĵo. Malfacile estis por estingi la flamon.

La gaso estis ne uzita: ĝi estis tute perdita.

Post mallonga intertempo tamen la urbkonsilantaro, per simpla aparato, disigis la akvon kaj la gason, kolektis la gason en grandan gasujon, kaj per tubaĵo ĝin alportis en la urbon kaj en la domojn, elspezante sep mil sterlingajn librojn. Stratlampoj estis starigataj. Kiam ĉio estis preta kaj la gasujo tute plena, la Reganto estis invitata viziti la urbon kaj malfermi la gasfeston.

La gasaj stratlampoj estis lumigataj kaj brulis gaje dum la nokto, sed ho ve! la gasprovizo finiĝis kaj ĉe la sunleviĝo la ĉagrenita urbeŝtaro sciigis, ke la gaso ne elfluas plu, pro ia nekomprenebla kaŭzo, kaj ĝis nun la gaso ne estas tie.

Profeto Iziah'o ne diris ion pri la gaso!!! Ne klarigebla formetado!

Sufiĉe pri « boroj ».

## II.

Sur la verdaj bordoj de la kurbiĝanta rivero Brisbane, simile al grandega serpento arĝenta rampanta malrapide al la malproksima maro, kuŝas la ŝtatĉefurbo Brisbane, ĉirkaŭe dekdu mejlojn (anglajn) « kiel la korniko flugas » (1) for de la golfo nomata « Moreton », en kiun la rivero enfluas, kaj ĉirkaŭe dudek mejlojn laŭ la rivero mem.

Kapitano Cook (elp. Kuk) estis la unua maristo, kiu eniris la diritan golfon per ŝipo. Li eltrovis kaj nomis ĝin, kaj estis tute certa kaj konvinkita per la kotsimila flavbruna koloro de ĝiaj akvoj, ke rivero aŭ riveroj enfluas en ĝin.

Leŭtenanto Oxley (elp. Oksli) en la fina parto de la lasta jarcento (1873) esploris tre zorge ĝin kaj eltrovis la Brisbanan riveron, sur kies akvoj per boatoj li vojaĝis ĝis la loko, kie la rivereto nomita Oxley enfluas en la Brisbanan riveron. La vojaĝo, kiun li tiam elfaris, estis ĉirkaŭe kvindek mejlojn for de la rivera enfluejo.

En la jaro 1824<sup>a</sup> enlandiĝis la unua aro (bando) da krimuloj sur la bordojn de la golfo, ĉe loko nomita Humpy Bong (elp. Humpi Bong), kiu, tradukite laŭvorte el la nigrenlandula lingvo, signifas « dometo (kabano), mortinta ».

Poste la krimuloj estis transportataj de Humpy Bong al la loko, kie Brisbane nun kuŝas! Maljuna nigrulo, rigardante la enruiniĝintajn konstruaĵojn de la krimulejo elparolis « Humpy Bong » kaj tiamaniere la loko ricevis sian nomon.

Humpy Bong (speciale nomita « Redcliffe ») estas

(1) Angla proverbo signifanta « laŭ rekta linio ».



BRISBANE: REĜINA STRATO EN LA JARO 1858.

*La komparo de tiu vidaĵo kun la du postaj, montras kiel mirinde progresis la urbo priskribita de nia afabla korespondanto.*

nun la plej vizitata marbordo aŭ somerloĝejo de la loĝantoj Brisbanaj, kie ili pasigas la varmajn somerajn monatojn, kaj ĝuas la plaĉan kaj refreŝigan marbanadon.


Tiu ĉi lando unue estis la malliberejo de la krimuloj de Anglujo.

Mi ne parolos pri la severegeco kaj ofte krueleco, kiun al la malfeliĉaj krimuloj, malbone blinda sorto disdonis. La severeĝuloj (la esprimo ne estas tro

forta) havis kelkafoje malbelegan finon, per la koleregigintaj krimuloj mem. Niaj historiskribantoj raportas pri tiaj historioj de preskaŭ nekredeblaj aferoj kaj okazintaĵoj — tro terurigaj por ilin rakonti — dum la komencaj tagoj de tiuj ĉi lando; tial vi kompleze permesos al mi faligi kurtenon antaŭ ĝi.

Tia estas la komenco de nia historio, malĝoja kaj neplaĉa.

Nia historio ne atingas ĝis Julio Cezaro aŭ



VICTORIA BRIDGE (VIKTORIA PONTO).

*Finita en la jaro 1897, ĝi anstataŭas malnovan, detruitan de superakvego en la jaro 1893.*

Aleksandro la Granda. Ni ne povas montri al la fremdulo, interne de niaj pordegoj, iajn antikvajn batalempojn, iajn malnovajn konstruaĵojn heder-vestitajn, katedrojn, muregojn, monumentojn, turojn aŭ aliajn tiajn ejojn aŭ aĵojn, kiujn pli malnovaj landoj povas vidiĝi fiere aŭ deziras kaŝi pro honto.

La tagoj de la krimuloj feliĉe estas forpasintaj antaŭ sesdek aŭ sepdek jaroj.

Poste sekvis la alveno de la liberaj koloniistoj, kiuj el la malnova hejmlando — la insuloj en la maro nevenkebla, alvenis al tiuj ĉi bordoj kun kuraĝaj koroj kaj viglaj fortaj manoj, kaj sendependaj spritoj por trovi sian sorton en tiu ĉi transmara nova lando.

Tiuj ĉi estas viroj — la ideala tipo; la savo de la tero estis la harditaj Aŭstraliaj pioniroj. Mia amiko « *Steele Rudd* » dediĉis sian amuzan kaj spritan verkon « *Sur nia farmo* » al tiuj ĉi pioniroj kaj li pardonos al mi, se mi citas la dediĉon tie ĉi.

« Al vi kiuj naskis nian patrujon, al la memoro de vi, kies nomoj, kies grandegula entrepreno, kies agoj de kuraĝeco kaj maltimeco ne estas enskribitaj sur ian monumenton!

« Al vi, kiuj laboregis en la silento de nekonataj, senhomaj, lokoj de la kamparo kaj faris ilin niaj!

« Al vi, kiuj laboradis en soleco dum la jaroj, kiuj estas forpasintaj!

« Al vi, kiuj posedas nenian lokon en la historio de nia lando, kiel ĝi estas ĝis nun skribita!

« Al vi, kiuj estas elfarintaj la plej multon por tiu ĉi lando!

« Al vi, pri kiuj, en la irado kaj progresado de loĝiĝo, en la barakto de okupa urba vivado, malmultaj ŝajnas nun pripensi!

« Al vi mi dediĉas tiun ĉi libron! »

Tiel okazas ĝenerale pri la pioniroj, almenaŭ pri la plimulto da ili. Estas neniam krime makulo sur tiuj ĉi fortaj, harditaj, multimemaj pioniroj.

Tiuj ĉi prapatroj lasis al siaj posteuloj bonegan heredon, t. e. amo al la libereco, mirinda optimismo, malamo al la tiranoj kaj subpremece; naskiĝintaj de konstanta ĉiutaga interrilato kun la naturo en ĉiuj ĝiaj diversaj fazoj kaj formoj.

Kaj Aŭstralio sufiĉegas je plej diversaj naturaj objektoj kaj kondiĉoj, interne de siaj ĉiufankaj limoj.

La lingvo internacia tre malfrue alvenis tien ĉi. Ĝi estas nun en nia mezo kaj, dank' al ĝi, pero estas apuda, per kiu mi povas paroli al la tuta Esperantista mondo sen la longa laŭgata traduko el mia nacilingvo en dudekajn da aliaj.

Brisbane, 5-1-07.

P. P. FEWINGS,  
Prez. de la « *Brisbane Esp. Klubo* »,  
Aŭstralio.



« COURIER BUILDINGS » EN BRISBANE.

Tiu domo estas la oficejo de tri gravaj gazetoj en Brisbane: « *The Courier* », kiu eliras ĉiutage; « *The Observer* », eldonata ĉiuposttage; kaj « *The Queenslander* », eliranta ĉiusemajne. En « *The Observer* » aperas regule « *Esperantaj Notoj* » de Sr<sup>o</sup> P. Fewings, tre gravaj por la propagando.





## Esperanto kaj Ruĝa-Kruco. Nuna situacio. (\*\*)

En la lasta numero de «Tra la Mondo» aperis artikolo de L<sup>to</sup> Bayol, pri Esperanto kaj Ruĝa Kruco. Pruvinte la necescon de interkomprenilo en la diversaj flegoj de l' milita tempo, la verkinto montras la provojn sinseke faritajn de S<sup>ro</sup> Torelli, de S<sup>ro</sup> Blasche, kaj, nur finante diras, ke Esperanto povas liveri la solan veran solvon de la demando.

Kion pro troa modesteco li ne diris, mi dirus hodiaŭ, montrante, ke, dank' al lia nelacigebla klopodado, Esperanto ne nur povas liveri, sed jam liveras la deziratan solvon, se la tuta Esperantistaro jam ne konus la admirindan agemecon de L<sup>to</sup> Bayol, kies nomo, de nun famiĝinta ĉe ĉiuj landoj de l' terglobo, estas nedisigeble ligita kun la supredirita afero.

Per sia france verkita broŝuro «Esperanto et Croix-Rouge», per la ĵus aperintaj laŭĉefeĉaj ŝlosiletoj (gvidlibro Esperanto Ruĝa Kruco), kiuj estas nun tradukitaj diverslingven, per artikoloj en naciaj aŭ internaciaj gazetoj, per senĉesaj paroladoj ĉu en Francujo ĉu alilande, per kursoj, unuvorte per ĉiuj eblaj rimedoj, li sukcesis vekti intereson al tiu grava ideo, kiu el la teorio, iom post iom eniris en la praktikon, poste, kiel, Esperanto mem, progresadis, disvastiĝadis, kaj nun estas sufiĉe matura por ke jam estu antaŭdirebla ĝia fina triumfo!

La ideo pri «Esperanto kaj Ruĝa Kruco» aperis la unuan fojon en artikolo subskribita «Parisienne», kiun, antaŭ kvin jaroj, publikigis «la Lumo» tiama Kanada ĵurnalo. Preskaŭ samtempe D<sup>ro</sup> de Rop, prezidanto de la Antverpena Ruĝkruca komitato, ĝin siavice alprenis, kaj sukcesis altiri al Esperanto la suprenomitan komitaton; fine, la lastan jaron, ĉe la Geneva kongreso, L<sup>to</sup> Bayol proponis al la kongresanaro kaj akceptigis unuvoĉe, gravan protokolon pri tiu temo. De tiam, la afero marŝadis per pli kaj pli rapidaj paŝoj. Famaj artikoloj aperis en diversaj militaj revuoj: Armée et marine, la Belgique militaire, le Congo Belge, Il diritto militare Italiano, k. a. Ĉiulande, agemaj propagandistoj prenis sur sin la antaŭenpuŝon de la afero. En Italujo, L<sup>to</sup> Salaris, D<sup>ro</sup> Pedrazzini kaj la tutmonde konata Esperantistino S<sup>ino</sup> Junck; en Hispanujo, generalo Moncada kaj lia stabestro, subkolonelo Ayza; en Svedujo, Intendant Max Schürer von Waldheim kaj S<sup>ro</sup> Ahlberg la eminenta direktoro de «Esperantisten»; en Usono Profesoro Grillon; en Danujo, S<sup>ino</sup> Mönster; en insulo Malto, D<sup>ro</sup> Busutil; en Japanujo, S<sup>ro</sup> Mistler; en Belgujo, D<sup>ro</sup> de Rop, Komandanto Lemaire, k. t. p., k. t. p.

Sed en Francujo precipe, la ideo progresadis dank' al la nelacigebleco de L<sup>to</sup> Bayol. La «Union des femmes de France» la plej grava el la francaj societoj estas faritaj unue en Lyon'o de nia samideanino, S<sup>ino</sup> Sarpy. Poste, en Parizo, Bayol faris serion da paroladoj ĉe la centra sidejo de la supredirita societo, kies prezidantino, S<sup>ino</sup> Pérouse, petis de S<sup>ro</sup> Gaston Moch, plenan kurson, kiun ĉeestis granda aro da sinjorinoj.

Generalo Sébert ankaŭ kunigis sian gravan agadon kun la

klopodoj de L<sup>to</sup> Bayol kaj sendis detalan kaj interesan cirkuleron al ĉiuj delegitoj al la 8<sup>a</sup> internacia kongreso de Ruĝa Kruco, en Londono.

Dume, Rektoro Boirac, en Dijon'o, faris paroladon ĉe alia samcela societo «les Dames Françaises».

Milita ĉefkuracisto Achintre siavice paroladis en Avignon. Majorkuracisto Jenny publikigis gravan artikolon en medicina ĵurnalo «le Caducée», k. t. p., k. t. p.

Kompreneble la tuta Esperanta gazetaro potence helpis al nia sindonema propagandisto.

Mi do estas prava dirante ke jam antaŭvidebligas la fina triumfo de la ideo.

Kaj tiu triumfo estos samtempe la triumfo de l' homamemo, de l' sindonemo, de l' korboneco. Ĝi alportos al kompatindaj infanoj, falintaj sur la batalkampo, la eblecon ricevi ne nur pli efikan flegadon, sed ankaŭ tiujn korajn parolojn, kiuj havas pli trafan influon ol la kuraciloj mem; komprenante kaj komprenate, la malfeliĉa vundito, kiam ia flegistino ameme sin klinos al li, kredos, ke li vidas sian malproksiman patrinon, kaj larmoj de ĝojo anstataŭos en liaj okuloj, la plorojn de suferado. Ĉio alta, ĉio nobla estas ja propraĝo de Esperanto; sed nenio estas pli alta, nenio pli nobla, ol la servoj kiujn ĝi povas fari al la vunditaro.

Tial, la ideo nedubeble sukcesos.

Se Esperanto vekis ies malamikecon pro lingvaj, religiaj aŭ politikaj motivoj, sur la kampo de l' sindonemo kiu kuraĝus ĝin kontraŭbatali? Pri tiel laŭdinda ideo, kiu kuraĝus jes! ke li ne estas samideano?

En tiu paca batalado, ni ne havas malamikojn, sed nur malamikaĵojn: la apation, la malfervoron, la indiferentecon.... Por ilin disbati, kio estas necesa?

Ĉiam, ĉie, ĉiel propagandi nian lingvon; esperantistigi ruĝkrucaĵojn, ruĝkrucajn Esperantistojn; starigi fortan kaj sindonan anaron konsistantan el ĉiuj homoj, kiujn, per ia ajn flanko, povas interesi la ideo pri vunditflegado.

Vi, oficiroj, kuracistoj, farmaciistoj ĉiulandaj, pastroj ĉiureligiaj, vi aliĝintaj al Esperanto pro la diversaj progresoj kiujn ĝi ebligas, vi precipe, virinoj, al kies koro oni neniam vane sin turnas, respondu nian alvokon! Ne atendu ĝis kiam la registaro estos trudintaj al la popoloj la lernadon de nia lingvo; sed nian lingvon lernadu kaj lernigu, por ke ĝi fine sin trudu al la registaroj!

Pripensu, ke via propagando estos kvazaŭa almozo por estontaj ĉiunaciaj vunditoj. Propagandu ne nur per via cerbo, ne nur per via buŝo, sed per via koro! kaj el via koro ankaŭ venos iam la rekompenco, kiam, en la tago de l' fina venko, vin ĝojigos la penso, ke vi alportis vian ŝtonon al la glora konstruaĵo!

DOKTORO ARTIGUES.  
Franca milita kuracisto.



### PROPAGANDO EN LA ARMEO. MILITISTOJ ESPERANTISTAJ (\*).

**Anglujo:**  
Majoro Generalo George Cox. 9, Wilbraham Place, Sloane Street, London, W. C.

**Japanujo:**  
S<sup>ro</sup> T. Tokuo. Lernanto ĉe la militista lernejo en Tokio.

**Bulgarujo:**  
K<sup>no</sup> Krstju Marčev. 5a artileria Reg. Choumen.

Grigoro Ĉoĉo, maŝinisto ĉe aviso Nadejda, Varna.  
Jankov Ksenofono. Milita artileria lernejo, Sofia.

**Francujo:**  
D<sup>ro</sup> Jenny. 14<sup>a</sup> Rég. de Chasseurs, Châlons.

D<sup>ro</sup> Leniez. Milita kuracisto ĉe la Ecole Spéciale Militaire, St. Cyr (S.&O.)

K<sup>no</sup> Pereira. 113a Inf. Reg. Blois (L. & C.).

L<sup>to</sup> Roiffé. 113a Inf. Reg. Blois (L. & C.).  
L<sup>toj</sup> Lefolcalvez kaj Pinaudier. Instruktoroj ĉe la Ecole spéciale Militaire, St. Cyr (S. & O.).

L<sup>to</sup> Piotet. 5<sup>e</sup> Reg. du Génie, Versailles (S. & O.).  
L<sup>to</sup> Husson. 3<sup>e</sup> Reg. du Génie, Arras (P. de C.).

**Hispanujo:**  
Generalo Moncada Soler Luis. E. M., Valencia.

L<sup>to</sup> Kolonelo Roman Ayza. E. M. Roteros 16, Valencia.

K<sup>no</sup> Rafaelo Duyos. Zaragoza, 7, 3<sup>o</sup>.  
**Hungarujo:**  
Herman Kuhn, oberleutenant, 13, Div. Artilerie. Reg. de Somorja.

**U. S. de A.:**  
K<sup>no</sup> Buff. Wm. E. 62 Providence St. Worcester, Mass.

**Meksikujo:**  
L<sup>to</sup> G. Palacios. Sekretaria de Guerro. Depto de Estado-Mayor, Mexico.

**Rusujo:**  
L<sup>to</sup> Korotkij. 167-aj Ostroĵkij Polk. Ĉernigov.

S<sup>ro</sup> Emile Böhm. Oficira lokotenanta, 72a Reg. Presbourg.

L<sup>to</sup> Venjnkov. Serpuhovo.

**Svedujo:**  
Max Schürer von Waldheim. Regeimentsintendant vid. Kungl Skanska. Husarregimentet. Hälsingborg.

**Aŭstrujo:**  
J. Raninger, ĉefleŭt<sup>o</sup>. Scheffelfg, 16. Brünn.

(\*) 2a Nomaro. Vidu la 1an Nom. — Ni daŭros enpresii adresojn de veraj militistoj esperantistaj, laŭ sciigoj ricevitaj. Oni bonvolu tre zorge skribi la nomojn kaj adresojn. — (\*\*) Ni petas la personojn, kiuj interesiĝas al la disvastiĝo de Esperanto en la Ruĝ-Krucaj rondoj, ke ili penadu presigi, tute aŭ resume, tradukojn de niaj artikoloj en naciajn ĵurnalojn.

## Ŝvarc.

Eltirajo el memorskriboj de St. Hempel, gvardiano de Napoleono 1<sup>a</sup>

Dum iaj verkistoj priskribas al ni la morojn de fremdlandoj, aliaj, la sciencobjektojn aŭ kortuŝajn okazojn de pasia amo, mi, en mia trankvila rifuĝejo — revenigante en mian memoron antaŭlongajn militistajn faktojn, rakontos al vi pri la virtoj de la brava *Ŝvarc*.

« Kiu ĝi estas? — demandos eble multaj el miaj legantoj — ĉu iu nekonata historiisto, poeto, aŭ heroo de malnovtempaj krucmilitoj? »

Ho, ne! La virta, kuraĝa kaj amikema *Ŝvarc*, estis nur hundo en la regimento de polaj gvardianoj de Napoleono 1<sup>a</sup>. Ne ridu, mi petas, se mi diros, ke *Ŝvarc* estis senvosta; aliparte, ĝi estis forta, nigra kreitaĵo, kun starantaj oreloj; kaj, en ĝiaj okuloj montriĝis saĝeco, kuraĝo kaj sentimeco. Jam en komenco de sia vivo, ĝi estis neobeema kaj liberpensanta; tial en junaĝo, rompinte la malliberigan ledkolumon, per kiu enkatenigadis ĝin bierfaristo en Hanovero, ĝi foriris, kun la 9<sup>a</sup> regimento de francaj ĉevalpafistoj, al la prusa milito, kie en la batalo apud Fridlando, ĝi estis antaŭ la fronto de l' regimento, trafetita en nukon per karabengkuglo, kiu, kun la tempkuro, malsupreniĝinte sub la haŭto en ĝian subgorĝon, restis dum la tuta vivo, ĝia ornamo, kiel pruvo de kuraĝo.

Post la milito en 1807, kiam la 9<sup>a</sup> regimento de pafistoj haltiĝadis garnizone en Potsdam', *Ŝvarc*, enuanta pro malagema vivo, forlasis neavertinte la francajn pafistojn kaj postiris la taĉmento de polaj gvardioj, al la milito hispana. Dum la marŝo, ĝi paŝadis ĉiam antaŭ la trumpetistoj, pasigadis ĉiujn noktojn kun la aliaj soldatoj, kaj matene, stariĝis unua sur la kunvenloko de l' skadroj.

Kiam la ulanregimento ripozadis kelkajn monatojn en Bordeaux, *Ŝvarc* konis ĉiujn militistloĝejoj en tiu vasta urbo kaj forlasis nenium militavokon sur la komandplaco. Ĉe ĉiu militist-ekzercado, eĉ en magazenoj ĉe la divido de provizaĵoj, ĝi ĉiam ĉeestis, tute sindonema al la militistservo, senŝanĝe amikema kaj servpreta; nur pri amsentoj ĝi estis

indiferenta, kaj tial rigardadis kun malŝato aliajn regimenthundojn.

Unufoje, escepte, kiam la ulanskadroj iris ekzercadi, *Ŝvarc* malfruiĝis, kondukante kun si ian mirbelan mopsinon; sed aŭdinte la trumpetsonon, hontantiĝinte pri sia ago, ĝi alkuris rapide al sia loko, kaj ĝia okazkunulino ĉagrena estis devigita forlasi la maldankemulon.

Apud ĉiuj tiuj ĉi bonaj ecoj, ĝin oni devas sincere konfesi, *Ŝvarc* estis iom frandema; tial, en Bordeaux, oni povis ĝin vidi ĉiutage rapidantan, el plej malproksimaj urbstatoj, al la oficirmangejo « Tri Kronoj ». Sed, aliflanke, dum la milito, ĝi suferadis pacience la malsaton kaj ĉiujn penadojn, neniam ripozante en tendejo. Ĝi ĉiam vigladis ĉe antaŭgvardioj, kaj kiam li vidis la ulanojn rajdantajn al patrolo aŭ pikedo, ĉu estis tago aŭ nokto, ĝi partoprenis kun ili en ĉiu ekskurso. Dum la batalo, ĝi okupadis la lokon antaŭ la fronto, starante senmove sub la paflegfajro kaj kuradis gaje al la atako, apud siaj trumpetistoj.

Ĝi ĉeestadis en Hispanujo, apud Moskvo, sur la bordoj de Danubo kaj Vistulo; ĝi travivis feliĉe ĉiujn militojn, en ĉiu soldato havante amikon. Kaj kiam la taĉmento de gvardioj, post sangaj bataladoj, adiaŭadis sian standardon kaj redonis la ĉevalojn kaj armilojn sur la urbplaco en Kutno, oni povis ankoraŭ vidi la maljunan *Ŝvarcon*, kiu kuŝis malgaje antaŭ la fronto de sia regimento.

Multaj oficiroj kaj soldatoj volis doni al ĝi rifuĝejon en domo trankvila, sed ĝi, ne aŭdante pli sian amatan trumpetsonon, estis surda por iliaj alvokoj. Fine, post maljuna kripla soldato paŝanta sur lignaj iriloj, ĝi postiris, kun malsuprenigita kapo, en Pozenprinclandon, kie ĝi baldaŭ, pro enuo kaj maljuneco, finigis sian aventurplenan vivon.

*El la pola lingvo. Esperantigis*  
Rino HELENA HEMPEL,  
Polujo.

## LITERATURAJ VERKOJ.

D<sup>o</sup> L. L. ZAMENHOF: La Revizoro; La Predikanto. — Libraro pacifisma.

Ni povis nur citi ĝis nun, du verkojn de D<sup>o</sup> Zamenhof: *la Revizoro'n* kaj *la Predikanto'n*, represojn de verkoj jam aperintaj en « la Revuo ».

En la *Revizoro*, Gogol, la fama rusa aŭtoro, montras sian observadan potencon, sian profundan konon pri la moroj de la rusa oficistaro ne ĉiam rekomendindaj je l' epoko kiam li verkis sian satiran komedion. La detaloj estas interesaj kaj amuzaj; sed, bedaŭrinde, en iaj partoj la legado estas malfacila, iom laciga, kaj la senco konfuza, ĉar la tradukinto celis traduki litivorte la originalon: manko de pronomoj, de artikolo; intermiksiĝo de interjekcioj, de demandoj en la interparoladoj malutilas iom la kompreneblecon je la unua legado. Ankaŭ okazas, ke la aŭtoro aludas kutimojn lokajn, ne konatajn de la alilanduloj; eĉ malnovajn kutimojn ne konatajn

de la nunaj Rusoj. Estus do bone, ke, en la proksima eldono, D<sup>o</sup> L. L. Zamenhof aldonu kelkajn klarigajn notojn, por ke iaj partoj de lia interesa traduko ne restadu nekompreneblaj.

*La Predikanto*, pli serioza verko, ne havas — por la plimulto de la legantoj — la saman allogecon kiel *la Revizoro*, sed ĝi estas pli facile legebla.

Estas senutile diri ke ambaŭ verkoj havas naturan lokon en la bibliotekoj de ĉiuj Esperantamaj. (Ĉe Hachette & K<sup>o</sup>: *La Revizoro*. 1 fr. 50—9,60 Sm.; *la Predikanto*, 0 fr. 75—0,30 Sm.)

A. MONTROSIER.

Libraro Pacifisma: « Paco kaj Milito », de Pro Charles Richet kaj D<sup>o</sup> Vallienne: 0,75 (0,30 Sm.). « Pri malmarmo: Ĥimeroj kaj Realajoj », de Gaston Moch: 0,25 (0,10 Sm.).



# DIVERSAJĴOJ



## La japana skribmaniero.

Speciale por « Tra la Mondo » verkita.

Nun la Japanoj klopodas por forpeli la ĥinajn ideografojn kaj anstataŭigi ilin per fonetikaj literoj. Nia bonega kunfrato « Japana Esperantisto » sciigadas nin pri tiu grava provo aprobita *principe* de S<sup>o</sup> Saŭajanagl. Vic-Ministro de Edukado. La demando staras nun: ĉu la novaj literoj estos latinaj aŭ Sanskritaj aŭ « Kana » (Japanaj literoj).

Nia klera kunlaboranto C. Steenbuch, afable verkis la tre interesan jenan artikolon pri tiu tute nuna temo.

Estas en Japanujo multaj mirindaĵoj, sed inter la plej strangaj el ili estas la skribmaniero, ne nur pro sia propra eksterordinareco, sed ankaŭ pro la fakto, ke, kvankam la Japanoj povas nun ĝenerale esti rigardataj kiel civilizitaj homoj, tamen ilia skribmaniero estas tute necivilizita kaj neracia. En japana skribo estas mikse uzataj du specoj da skribsignoj (oni ne povas prave nomi ilin literoj), nome:

- 1<sup>e</sup>: La ĥinaj signoj, kaj
- 2<sup>e</sup>: La japanaj signoj.

La japanajn signojn oni povas plue dividi laŭ du specoj, nome:

- 1<sup>e</sup>: « Hirakana » kaj
- 2<sup>e</sup>: « Katakana ».

La signifo de « kana » estas « alfabeto », la antaŭmetitaj vortoj « hira » kaj « kata » estas, laŭ nia scio, sen ia propra signifo.

La ĥinaj skribsignoj (ordinare nomataj « ideografoj ») estas elpensitaj antikve de ĥina saĝulo, kaj ĉirkaŭ la 286<sup>a</sup> jaro antaŭ Kristo enkondukitaj en Japanujon, laŭdire de la Koreanoj.

Ili estas la skribsignoj, kiuj estas uzataj nun ĉie tra Ĥinujo, Koreujo kaj Japanujo; sed ne kredo, ke, sekve ili faras bonan internacian skriblingvon (t. e. inter la suprenomitaj nacioj) same kiel oni ĉie povas uzi kaj kompreni la arabajn numerajn signojn; ĉar kvankam la signifo de la plimulto el ili estas preskaŭ ĉie sama, tamen estas multaj el ili, kies signifoj estas grade ŝanĝigadintaj en la diversaj landoj, tiom ke ekz. nun Japano ne povas bone kompreni ĥinajn aŭ koreajn gazetojn, se li ne konas la ĥinan aŭ korean lingvon. Tiuj ĥinaj skribsignoj tute ne estas alfabeto, sed po ĉiu vorto estas unu signo; do estas multaj miloj da tiuj skribsignoj, kaj por kompreni ordinaran libron aŭ gazeton oni devas koni kvin aŭ ses milojn da ili. Kia laboro, do, ellerni eĉ la plej necesajn el ili! Estas kompreneble, ke en la japanaj lernejoj oni ne havas tempon lerni

serioze ion krom tiuj multegaj skribsignoj, kaj estas ankaŭ kompreneble, ke ordinara Japano, kiu ne trairis la pli altajn lernejojn, tute ne povas legi aŭ skribi laŭ la ordinara japana maniero. — Jen estas kelkaj el ili. (Fig. 2<sup>a</sup>).

Oni legas la signojn de supre malsupren (de dekstre maldekstren). La signifo de la supraj estas:

N<sup>o</sup> 1: « granda », N<sup>o</sup> 2: « deklivo », N<sup>o</sup> 3: « instruo », N<sup>o</sup> 4: « depeŝo ». Nu, « granda deklivo » estas japane nomata « Osaka » (o- « granda », « saka » -deklivo) kaj ĉi tie signifas la nomon de japana urbo; instruo-depeŝo ĉi tie signifas depeŝo pri instruado aŭ instruajo, kaj la tuto do estas la nomo de japana gazeto, eldonata en la urbo Osaka. Japane oni elparolas ĉi tiujn signojn:

« Ōsaka Kyōhō ». Se oni prenas la skribsignon signifantan « fulmo » kaj metas ĝin antaŭ la supre skribita signo signifanta « depeŝo », jen estas la vorto fulmdepeŝo, t. e. telegramo.

Mi povus longe priskribi tiujn malfacilegajn, sed historie interesplenajn ĥinajn signojn, sed mi kredas ke jam sufiĉas, kaj mi do ekpriskribos la japanajn signojn, nome la « hirakana » kaj la « katakana ». El tiuj la « hirakana » estas la ordinare uzata, sed ĉar la « katakana » estas la unua, laŭhistorie, mi do unue priskribos tiun ĉi. Kiel supre dirite, po unu vorto estas unu ĥina skribsigno. Sed kiel oni do povas skribi la signifon aŭ la elparolon de la ĥinaj skribsignoj? Se ekz. oni deziras skribi, ke la signifo de la kvara el la supraj signoj estas « depeŝo », kiel do fari? En Ĥinujo oni tute ne povas skribi la signifon, sed estas devigata tion priinstrui tute pervoĉe; en Japanujo, tamen, oni elpensis la uzon de kelkaj el la ĥinaj signoj kiel alfabeton (aŭ: pli ĝuste: silabliterojn). Per tiu ĉi metodo oni do povis priinstrui la ĥinajn signojn per libroj, kaj eĉ verki vortarojn enhavantajn la signojn kune kun iliaj signifoj.

Sed oni faris ankaŭ pluan paŝon, simpligante la signojn, kiujn oni tiel uzis alfabeto. Prenante du aŭ tri el la plej karakterizaj linioj (aŭ partoj)

24/10/11

2fr.





FIG 1<sup>a</sup> JAPANA POŝTKARTO.



- 1
- 2
- 3
- 4

FIG. 2<sup>a</sup>.

de tiuj signoj oni faris tre bonan alfabeton (aŭ, pli ĝuste: silabaron, ĉar ĉiu el tiuj simpligitaj signoj signifas ne literon, sed silabon). Jen estas kelkaj el ili. (Fig. 3a).

Tiuj ĉi estas ja tre simplaj, kaj, ĉar estas nur 50 el ili, tre facillerneblaj. Tiuj ĉi estas nomataj

カ ka      チ ĉi  
キ ki      ラ ra  
マ ma      ム mu  
リ ri      ル ru  
ホ ho      ハ ha  
ヘ he      ケ ke

FIG. 3a.

« katakana », kaj estas elpensitaj dum la oka aŭ naŭa jarcento. Poste oni, tamen, trovis ke estas iom malfacile skribi ilin rapide, kaj bone interkunigi ilin, kaj sekve oni elpensis aliajn pli facil-skribeblajn silabsignojn, kiujn oni nomas « hirakana ». Jen estas kelkaj el ili. (Fig. 4a).

Nu, kiel oni do ordinare uzas tiujn signojn, nome: la hinaj ideografoj, la « katakana » kaj la « hirakana »? La « katakana » nun estas uzata 1) por telegramoj, 2) por skribi alilingvajn vortojn, do ne tre ofte; sed la du ceteraj manieroj? Jen estas la plej senrezona afero; ĉar kvankam la « hirakana » ebligas preskaŭ idealan skribmanieron, tamen oni precipe uzas la hinajn signojn, intermiksante la « hirakana » preskaŭ senregule. Mi kredas ke la regulo estas skribi substantivojn, verbojn, adjektivojn k. t. p. per la hinaj signoj kaj precipe uzi la « hirakana » por gramatikaj finoj, prepozicioj, konjunkcioj k. t. p., sed oni tute ne faras tiel; ĉar en la sama libro kaj eĉ sur la sama paĝo oni ofte vidas la samajn vortojn skribitajn jen per la hinaj signoj kaj jen per la « hirakana ». Tiuj du metodoj do estas uzataj tute

intermikse. Nu, rigardante ekz. japanan gazeton oni do vidas kaj la hinajn signojn kaj la « hirakana'n », sed ordinare oni ankaŭ povas vidi inter la linioj (memoru, ke la linioj estas vertikalaj) hirakana'n en malgranda tipo. Kio estas tio?

Tio montras metodon, per kiu eĉ homoj, kiuj ne

konas la hinajn signojn, havas la eblon legi la gazeton; ĉar tiuj malgrandaj hirakana-signoj (hirakana estas ja facillernebla) montras la signifon de la hinaj signoj, apud kies dekstra flanko ili estas enpresitaj. Sed kial do ankaŭ enpresi la hinajn signojn? Mi ne povas vidi ian pravan motivon por tiu ĉi senencaĵo.

Oni do havas ne sole unu, sed du bonegajn silabsignajn sistemojn, ambaŭ tre facile lerneblajn kaj skribeblajn; kaj se oni deziras imiti la Eŭropanojn,

ま ma.      よ jo  
き ki      ぶ bu  
く ku      は ha  
す su      め me  
た ta      て te

FIG. 4a.

oni povas ankaŭ tre bone kaj facile skribi kaj legi la japanan lingvon per la romaj literoj. Kial do konservi la hinajn signojn? Kial do malŝpari en la lernejoj la multevaloran tempon lernante ilin? Jes, kial ne volas la homaro progresadi? Kial oni ne baldaŭ faros tunelon inter Francujo kaj Anglujo? Kial oni ne baldaŭ fariĝos Esperantistoj?

Verkis

C. STEENBUCH (Japanujo).

LA JAPANA ESPERANTISTO

2<sup>a</sup> UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

en GENEVO, de la 25<sup>a</sup> Augusto ĝis la 6<sup>a</sup> Septembro 1906.

PROGRAMO

**Mardon 26<sup>a</sup> Augusto**  
8<sup>a</sup> 1/2 sesio, en Victoria-Hall.—Oficiala Malferma Cereemonio kaj Kongreso.  
**Merkredo 27<sup>a</sup> Augusto**  
Matino, en la Universitato.—Prepara Kunveno (Komitato), Saksoj, k. t. p.  
12 h. Cambio de la Regno.—Oficiala festeno.  
Pudingo, en la Universitato.—Unua Generala Kunveno.  
Vespere, en la Teatro.—Teatra Vesperto.  
**Ĵaŭdo 28<sup>a</sup> Augusto**  
Sipetraduro sur la Lemana Lago, kun oficiala festeno en Vevey.  
**Vendredo 29<sup>a</sup> Augusto**  
Matino, en la Universitato.—Dua Generala Kunveno.  
Pudingo.—Aĉeto de la Kongresojn de l'Eska de Siro Turicconi en la "Château" de "Vizito de l' Museo Aizama."  
Vespere.—Granda Ballo (Nacia kostumoj).  
**Sabato 30<sup>a</sup> Augusto**  
Matino, en la Universitato.—Kunveno de Komitato.  
Pudingo, en la Universitato.—Tria Generala Kunveno.  
Vespere, en Victoria-Hall.—Oficiala Ferma Cereemonio kaj Klostero.  
**Dimanĉo 31<sup>a</sup> Septembro**  
Tago rezervita por laŭdaj elparoj de la Kongresanoj.  
**Dimanĉo 1<sup>a</sup>, Martedi 1<sup>a</sup>, Merkredo 2<sup>a</sup> septembro**  
Vojaĝo tra Svisujo: Grenchen, Morgues-Oberland, Spiez, Interlaken, Muri, Berno, Grenchen.

第二回エスペラント萬國大會

一九〇六年八月二十五日より九月六日まで

執行順序

**火曜日 八月二十八日**  
朝八時半—ワグネル講—正式公會及音楽會  
午後—大學生會  
**水曜日 八月二十九日**  
朝—大學生會  
午後—大學生會  
**木曜日 八月三十日**  
レマン湖遊覧及シロウエにて大會會  
**金曜日 八月三十一日**  
朝—大學生會  
午後—大學生會  
**土曜日 九月一日**  
朝—大學生會  
午後—大學生會  
**日曜日 九月二日**  
大會員の自由日  
**月、火、水曜日 (三日—五日)**  
湖西内地旅行—セルマヨリセントローチ—エカント以下の諸地を遊覧せしむる  
**注意**  
各集會の時間を示す詳細の順序表は時に随じて譯め大會員に送付すべし

KONVERSACIO.

A. Mi deziras al vi bonan tagon.  
B. Bonan tagon, Sinjoro, kiel vi sanas (se kiel vi fartas)?  
A. Tre bone; mi dankas (vin).  
B. Ŝi ĉi diris al mi ke vi estas malsana.  
A. Ho, ne, dankoj al Dio; mi estas tre bone.  
B. Ĉu ne estas mia Amiko C.?  
A. Jes, estas li. La miera rompi sian kruon antaŭ du monatoj; kaj li estas ankoraŭ ĝena.  
B. Bonveno al vi, amiko; mi ja sciis la malfacilon, kiu ŝtatis al vi.  
Kiel vi sanas, nun?  
C. Vi estas tre aminda. Nun mia stato estas pli bona ol antaŭ, sed, en la unuaj tagoj, mi suferis tre.  
B. Ĉu via kama (fami) estas en bona sano?  
C. Mia religio ĝiam havas sian teran sanon.  
1. Mi estas ĉiuj ĝin andi.  
2. Sed una el miaj infanoj kaŭzas al mi grandan malkomforton.  
D. Kiel ĝi sanas?  
C. De kelkaj tagoj, ĝi havas mienon tre malfreŝan, ne havas pli apetiton kaj ĉiam ridetas per kaptilojn.

CONVERSATION.

A. I wish you good day, Sir.  
B. Good day, Sir, how do you do (or how are you getting along)?  
A. Very well; I thank you.  
B. Some one said to me that you are unwell.  
A. Oh, no, thanks to God; I am very well.  
B. Is our friend C. here?  
A. Yes, he is. The poor fellow broke his leg two months ago, and he still walks with effort.  
B. Welcome to you, friend; I just learned the malfacilon, which befall on you. How do you do now?  
C. You are very kind. Now my condition is more trouble, some than painful; but in the first time I suffered awfully.  
B. Is your charming family in good health?  
C. My wife always has good health. I am glad to hear it.  
B. But one of my children causes me a great uneasiness.  
C. Since some time, he has very bad tooth, has not much appetite and complains of headache.

會話

甲 今日は、如何ですか?  
乙 非常に佳きです。お元氣を御座いますか?  
甲 非常に御満足です。お元氣です。  
乙 何かの病氣を患っていますか?  
甲 ありません。  
乙 時に行君は健康に居ますか?  
甲 そうです。彼は二ヶ月前に足を折りました。今でも働いて居ません。  
乙 何か悪い病氣は、今聞かれましたか?  
丙 何かの病氣は、今聞かれましたか?  
乙 何かの病氣は、今聞かれましたか?  
丙 何かの病氣は、今聞かれましたか?  
乙 何かの病氣は、今聞かれましたか?  
丙 何かの病氣は、今聞かれましたか?  
乙 何かの病氣は、今聞かれましたか?  
丙 何かの病氣は、今聞かれましたか?



FIG. 5a. UNU PAĜO DE « JAPANA ESPERANTISTO ».

Tiu paĝo vidigas bonege la malsimilecon de la Japana kaj Esperanta lingvoj. Tamen Esperanto estas lernata de Japanoj pli facile ol iu ajn alia lingvo!

# Duonsurda

Duakta komedio, de ROKSANO originale verkita.

## PERSONOJ:

Fino VALENTENINO TOLEDO.

» GABRIELINO, orfino adoptita de gesinjoroj Toledo.

Sro EDUARDO TOKVILO, fianĉo de Valentinino.

» FREDERIKO, kuzo de Valentinino.

Du knabetoj.

*La agado okazas en saloneto.*

## A K T O I<sup>a</sup>.

### SCENO I<sup>a</sup>.

EDUARDO, FREDERIKO, poste GABRIELINO.

EDUARDO, *sen ĉapelo*. — Kompatu min, kara Frederiko, mi estas certe la plej malfeliĉa el ĉiuj malfeliĉuloj; kaj vere, mi malbenas iafoje la momenton kiam, traŝinte la leteron per kiu vi varme admonis, ke mi venu en vian ĉalton por pasigi unu-du monatojn, mi ĝojis pro la espero, ke mi ne nur travivos gajan libertempon ĉe ĉarma marbordaĵo, sed precipe pro tio ke mi retrovos malnovan amikon.

FREDERIKO *sen ĉapelo*. — Ĉu vi do bedaŭras vian senprokrastan alveturon?

EDUARDO. — Tute malkaŝe, jes; ĉar mi perdis mian kvietecon, mian trankvilecon. Ho! Kial mi ekkonis vian adorindan kuzinon, kies ravaj okuloj konfuzigas mian kapon?

FREDERIKO, *ridante*. — Vi min amuzas, kara, kaj mi tre miras, ke senpasia viro de l' Norda lando estas tiel facile flamiĝebla. Tamen mi konfesas, ke la okuloj de Valentinino estas kapablaj ekbruligi fajregon.

EDUARDO, *senpacienciĝante*. — Ne mokridu, mi petas; mi ĝin rediras: mi estas tre malfeliĉa.

FREDERIKO. — Ne tiel multe kiel vi ŝajnas opinii; ĉar mi certe ne eraras certigante, ke via alloga eksteraĵo jam ĉarmis Valenjon.

EDUARDO. — Mi ne kuraĝas kredi al tia feliĉo; sed eĉ se via diro estus la vero, ĉu mia kriplaĵo — se ŝi sciigis pri ĝi — ne malĉarmus ŝin?

FREDERIKO. — Kriplaĵo! Kia troiga vorto!

EDUARDO. — Kiel do vin ĝin nomus se vi estus sur mia loko? Ĉu vi volus esti tute surda je unu orelo? Vi ne povas konseii miajn suferojn, kiam tiu ĉarmulino estas apud mi. Ho! Momentoj samtempe plezurriĉaj kaj turmentplenaj! Ŝin vidi, ŝin admiri, aŭdi ŝian agrablan babiladon..... kiam ŝi estas dekstre de mi, tio estas ĝuado inda je l' dioj; sed ŝin vidi, malgraŭ miaj klopodoj, ĉe mia maldekstra flanko, kaj tute ne aŭdi ŝian melodian voĉon, kaj senĉese timi respondi iun absurdajn, tio estas infera sufero; tiam mi volus esti je cent mejloj.

GABRIELINO, *frapas je l' pordo, sed la junuloj tion ne aŭdas*. *Aperante kapvestita kaj portante sunombreton, ŝi flanken diras*: « Estas tre strange, ke ili ne min aŭdas; kiajn gravajn aferojn ili do prisdiskutas? Se mi aŭskultus!..... »

FREDERIKO. — Kial vi ne volas sekvi mian konsilon? Kial vi malpe/mesas ke mi pri tio sciigu ŝin?

EDUARDO. — Ne, ne, pro kompatato. Nenion diru. Ŝi timus la mokojn de siaj amikinoj kaj ne volus fariĝi mia edzino. Tiel agis, vi tion scias, Flino Kutoriko kun kiu mia bofratino volis edziĝi min. Feliĉe tiu afektemulino ne estis kaptinta mian koron.

GABRIELINO, *pli kaj pli alenta*. — Tio ĉi estas vere interesa, kaj por ĉio en la mondo mi ne cedus mian lokon.

EDUARDO. — Fine, pri mia amo mi skribis al miaj gepatroj aldirante, ke senatende ili venu por interkonsentiĝi kun viaj geonkloj. Sed, Frederiko, mi konfidis al vi: neniam lasu min sola, ĉiam helpu min.

GABRIELINO, *flanken*. — Por kio do, grandaj dioj? Mi donus.... eĉ la malgrandan fingron de mia dekstra mano por ekscii la tialon de tiu ĉi timo.

FREDERIKO. — Kiam vi ŝin amindumos, mi estos iom enuiga. Sed rekuraĝigu; tiu ĉi, en la Sudo, ni tiel gestas kiam ni parolas, ke dank' al nia senĉesa mimiko, surdulo tre facile komprenas nin. Se vi volos, ni tuj faros eksperimentojn. Jen! mi estas ĉe via malfeliĉa maldekstra flanko. (*Farante geston klarigan*) Ĉu vi bone manĝis?

EDUARDO. — Jes, mi manĝis, kaj tre bone.

FREDERIKO, *ĉiam kun klariga mimiko*. — Brave! Ĉu vi longe dormis?

EDUARDO. — Ne, ĉarma flino, miaj noktoj estas sendormaj, de l' momento kiam la memoro pri vi okupas mian tutan penson.

FREDERIKO, *ridante*. — Bravisime! Vi estas savita.

GABRIELINO, *flanken*. — Savita! Mian fidon, ne. Nun mi estas certa, ke mi venĝos min al tiu pedantulino. Ha! Moŝto fraŭlina, surda estas via amato, pri kies ĉarmoj vi konstante parolas.... kaj tedegas min. Ha! Ha! Ha! Ni ridos. (*ŝi frapas tre forte kaj enras ŝajnigante, ke ŝi malfacile spiras*): « Rapidu, rapidu, sinjoroj: ĉar S<sup>ro</sup> kaj Flino Todelo vin atendas por iri marpro-menadi antaŭ la horo de l' bano.

EDUARDO, *mallaŭte al Frederiko*. — Kiu scias, ĉu ŝi ne aŭdis nian konversacion?

FREDERIKO, *mallaŭte al Eduardo*. — Ne, tio estas videbla: ŝi ĵus kuris. (*al Gabrielino*) Ni tuj iros preni niajn ĉapelojn kaj revenos senprokraste.

(*Ili eliras*.)

### SCENO II<sup>a</sup>.

GABRIELINO, *sola*.

Ha! Sinjor Eduardo, vi ne volas ke Valentinino, la bela Valenjo, kiel oni ŝin nomas, eksciu ke vi estas duonsurda. Nu! Tion vi estos devigata diri al mia tre kara amikino, kiu, tial ke ŝi estas riĉa, altiras ĉiujn sopirantojn. Kial do oni min edukis kiel ŝin, ĉar niaj situacioj estas tute malsamaj, ĉar mi estas malriĉa? Jes, mi scias, al mi oni donos doteton kiel al almozulo oni donas pecon da pano. Kiel suferiga estas la rolo de protektatino! Ĉiam aŭdi la patrinon dirantan: « Mi havas du filinojn: mi tute same amas Valenjon kiel Gabrielinon » aŭ la filinon certigantan: « Karulino mia, kiel al fratino mi estas koralligata al vi. » Ho! Ĉiamaj rekantaĵoj havantaj nenium celon krom komprenigi al mi, ke eternan dankecon mi deve ŝuldas al miaj (*enfaze elparolante tiun ĉi vorton*) pro-tek-tan-ti-noj.

*Oni aŭdas voĉon en la kulisoj*: « Kuzo! S<sup>ro</sup> Eduardo! Ĉu vi ne estas pretaj? »

GABRIELINO. — Ĉu ĝi estas vi, Valenjo? Eniru, mi estas sola.

SCENO III<sup>a</sup>.

GABRIELINO, VALENTENINO, kun ĉapelo kaj sunombrelo,  
poste EDUARDO kaj FREDERIKO.

VALENTENINO. — Sola? Kie do ili estas? Kie estas Sinjoro Eduardo?

GABRIELINO, kareseme rigardante Valentinon. — S<sup>ro</sup> Eduardo! S<sup>ro</sup> Eduardo! Ĉiam S<sup>ro</sup> Eduardo! Feliĉa belulino!

VALENTENINO. — Jes, tre feliĉa; ĉar vi nescias kion mia onklino ĵus diris al mi. Morgaŭ gesinjoroj Tokvilo alveturos por peti miajn gepatrojn, ke ili min donu al ilia filo. Baldaŭ vi havos bofraton, amema fratineto.

GABRIELINO, flanken. — Fratineto! Ĉiam la sama rekantaĵo aŭdigas. (Al Val.) Mi tiel ĝojas, ke mi volas vin kisi (Ŝi alpaŝas al Val. kaj kisas ŝin). Kara, kara, mi ne scias diri, kiel sincere mi partoprenas al via feliĉo. Kiom da enviulinoj naskos la rava beleco de mia Valenjo en ŝia edziniĝa tualetto! Tio estos la plej bela tago de mia vivo.

VALENTENINO, emociata. — Dankon, dankon; sed vi ankaŭ havos ĉarman edzeton, kaj vi lin havos el mia mano; mi tion promesas, bonkorulino.

GABRIELINO, viŝante forestantan larmon. — Tro bona vi estas, amikino. Nur unu deziron mi havas: vidi vin edzinigitan kun la elektito de via koro.

(Eniras Frederiko kaj Eduardo).

FREDERIKO, ekkriante gaje. — Kiu estos tiu feliĉa mortemulo, belaj fraŭlinoj?

VALENTENINO, malice rigardante Eduardon. — Ha! tion mi ne scias jam.

FREDERIKO. — Hm! Hm!

VALENTENINO, ruĝigante. — Ni rapidu iri al panjo, kiu ne dubeble senpaciencaĝas.

FREDERIKO al EDUARDO. — Proponu do vian brakon al mia kuzino. (Li proponas la sian al Gabrielino).

EDUARDO, flanken. — Kaj mi ne povas proponi la dekstran! La mimiko min savu! (Li proksimiĝas al Valentinon kaj proponas sian brakon). Ĉu fraŭlino Valenjo volas fari al mi la honoron apogi sian blankan manon sur mian brakon?

VALENTENINO. — Tre volonte, sinjoro. (Apoginte sian brakon, ŝi parolas jarante nenian geston). Ni decidis fari marpromenadon, ĉar mia kuzo diris....

EDUARDO, ŝajnigante ke li sentas nefolereblan doloron interrompas ŝin per krioj. — Aj! Aj! Aj! Muskolstreĉiĝon mi havas ĉe l' brako. Aj! Aj! Aj!...

VALENTENINO eligante sian manon. — Sinjoro! Sinjoro!

GABRIELINO, alkurante. — Kion vi havas, sinjoro?

FREDERIKO, ridetante. — Tio estas negravaĵo. Forta frotado malaperigos tiun ĉi doloron. (Tion li faras). Ĉu tio efikas?

EDUARDO. — Ŝajnas al mi (Li provas ekmovi sian brakon). Aj! Aj! Aj! Ne jam.

FREDERIKO. — Estu do kuraĝa; silente suferu por ne timigi tiujn ĉi fraŭlinojn, kaj precipe ni ne pli longe restu ĉi tie; ĉar ni malkontentigis mian onklino. Proponu vian dekstran brakon al Valenjo, kaj ni foriru.

EDUARDO. — Plezure, se ŝia Moŝto volas konsenti.

VALENTENINO. — Sed jes, jes.

Brako ĉe brako, Valentinon kaj Eduardo, Gabrielino kaj Frederiko eliras.

Fino de la I<sup>a</sup> akto. — La kurteno falas.

AKTO II<sup>a</sup>.

La scenejo prezentas buduaron.

SCENO I<sup>a</sup>.

VALENTENINO sola, rigardante ĉirkaŭ si.

Mebloj, pentraĵoj, luksaĵetoj, post dek kvin tagoj al vi mi diros adiaŭ; ĉar mi havos novan propran hejmon. Certe el mia tuta animo mi amas mian karan fianĉon: li estas tiel bonkora, tiel altanima, kaj.... kaj tiel ĉarmoriĉa, kaj tamen mi ne povas venki iun korprematecon. Ĝis nun mi estis dorlotita infanino, kaj kiu scias, kion por mi rezervas la estonteco? Edziniĝi, tio estas afero trege grava. Forlasi miajn adoratajn gepatrojn, mian multamatan Gabrielinon, miajn kutimojn, fine ĉion kio min vidis kreskantan por esti la kunulino de viro, kiun mi de

tiel nelonga tempo konas!.... Eduardo promesas ja, ke li ĉiam min amos pli ol ĉion en la mondo, sed ĉu li efektive min amos tiamaniere?... Ho! kion do mi havas hodiaŭ? Kia malbonfaranta demono ĵetis nigran papilaron sur mian kapon? Foren! Foren! Malgajaj pensoj, mi volas ĝui mian feliĉon. Aliparte, li baldaŭ venos, li, l' amato, kaj mi ne devas fari malkontentan mienon... Kie do estas Gabrinjo? Se mi ŝin vokus. (Ŝi alpaŝas al la pordo). Mi ŝin aŭdas; ŝi venas.

(Gabrielino eniras).

SCENO II<sup>a</sup>.

VALENTENINO kaj GABRIELINO.

VALENTENINO. — Nu! karegulino; kion do vi faris?

GABRIELINO, tenante ĵurnalon. — Mi trarigardis la ĵus ricevitajn numeron de «Tra la Mondo», kaj konstatinte, ke ĝi estas ĉiam pli kaj pli interesa, mi ne povis kontraŭbatali la deziron skribi al ĝia ĉefredaktoro, S<sup>ro</sup> Montrosier, por lin gratuli pri la diversaj artikoloj kaj la tiel belegaj ilustraĵoj, kiujn li montras al ni.

VALENTENINO. — Certe, tute admiranda estas nia Ilustrato: tial Eduardo certigas, ke vidinte specimenon ĉiuj membroj de lia klubo eklernis mian belsonan lingvon. Kaj vi ne scias la ĝojigan novaĵon: tuj post nia edziĝo, ni forveturos al Varsovio por viziti nian glorindan majstrom, Dron Zamenhof. Kiom kontentega mi estas! Kaj poste, kiam ni havos naskiĝan Esperantistinojn — ĉar ĝi estos filineto, tio estas certa — ŝia baptopatrino, Gabrinjo, kaj mi parolos al si nur Esperante, ĉu ne?

GABRIELINO, flanken. — Mi devas forte kuraĝiĝi por diri..... VALENTENINO, ŝin aŭdas, kaj jam korpremata. — Por kion diri, Gabrinjo?

GABRIELINO, melante la ĵurnalon sur la geridonon. — Vi scias, amikino, ĝis kia grado vi estas kara al mi, kaj vi scias ke senŝanceliĝe mi donus mian vivon por igi vin feliĉa.

VALENTENINO. — Kion do signifas tiuj ĉi montroj de amikeco? Al la afero, Gabrinjo, al la afero. Klarigu viajn dirojn: ho! tuj, tuj.

GABRIELINO. — Ne timu, eble sen kaŭzo, ĉar mi volonte esperas, ke kion mi sciĝis kaj baldaŭ sciigos al vi, tio ne estas la vero.

VALENTENINO, vivece kaj skuante Gab. — Parolu, parolu, pro amikeco al mi. Kion vi scias? Ĉu tio rilatas al mia fianĉo? Kiel dolore kaj aŭdeble batadas mia koro! Parolu, mi petegas.

GABRIELINO. — Sed mi rediras, ke tion mi ne kredas; mi opinias, ke oni dissemis falsan famon.

VALENTENINO. — Kion mi tuj ekscios? Dioj bonaj, kompatu min. Gabrielino, viaj reticencoj (1) min mortigas.

GABRIELINO. — Nu! oni certigis al mi, ke laŭ la diro de via fianĉo mem, li ne edziĝos kun vi, sed kun via doto.

VALENTENINO. — Haltu! Haltu! tio estas abomeninda diro.

GABRIELINO. — Mi tute konsentas kun vi, sed mi preferis antaŭsciigi vin pri tiu famo, antaŭ ol iu alia persono ĝin ripetos al vi.

VALENTENINO. — Kiu do neas la antaŭsentojn? Antaŭ kelkaj minutoj mia koro premigis pensante pri la estonteco; kiel malbelega ĝi estus se mia fianĉo amus nur mian riĉecon!

GABRIELINO. — Mi opinias min bona konsilantino admonante, ke kiam S<sup>ro</sup> Eduardo venos, mi pri tio demandu lin, dum vi obstine rigardos lian vizaĝon.

VALENTENINO. — Jes, Jes, tiel ni agos kaj mi rigardos per mil okuloj. Mi preferas la certecon kia ajn seniluziiga ĝi estas pli ol la dubon kiu ŝiras mian animon. (Oni frapas je l' pordo). Ĝi estas li. Akceptu lin, Gabrielino; mia sufero estas neesprimibla, mi bezonas esti sola por retrovi bonstaton. Mi tuj revenos.

(Ŝi eliras).

(Daŭronta).

ROKSANO,

H. M. de la E. Vagabonda Klubo.

(1) Fr.: réticence. — Ang.: reticence. — Hisp.: reticencia.

## La Spiritismo, de Marcel Finot.

Kial do tiom da famaj scienculoj studis kaj studas la strangajn fenomenojn, al kiuj oni donas ĝenerale la nomon *spiritismo*, dum aliaj pensuloj kaj scienculoj nepre ilin neas? Kio estas vera, absolute konstatita kaj pruvita el tiuj fenomenoj, kaj kia estas ilia scienca klarigo? El artikoloj kaj laboroj de C. Flammarion, kaj el libro ĵus aperinta, mi eltiras la jenajn sciigojn. Tiu scienculo estas tiel fama, ke ni devas certe kredi liajn diraĵojn: tial mi ne timas meti tiujn liniojn en la rubrikon: Kroniko Scienca.

« Unue, li diras, el la homoj, kiuj sin okupis aŭ okupas pri tiuj problemoj, kaj la studoj la plej zorge faritaj, konvenas atenti al la eksperimentoj fizike nedubebaj de grafo Gasparin kaj profesoro Thury de Genevo, de V. Hugo en Jersey, tiel mirigaj kiel kortuŝantaj, de elektristo Varley, elfaristo de la unua ŝnurego transatlanta; de profesoro Richet, de V. Sardou, S. Prudhomme, J. Claretie, A. Brisson, profesoro Duclaux, fizikistoj d'Arsonval, Maxwell, nomoj respektindaj, al kiuj oni povus aldoni aliajn. Kontraŭe, kelkaj scienculoj kaj literaturistoj ne malpli famaj, estas absolute kontraŭemaj al ĉiu tia studo.

» Oni facile klarigas tian nekredemecon kaj malŝatecon: por fari ion persiste tiujn serĉadojn, estas necese ke oni estu scivolema. Ĉiu homo ne estas tia, kaj estas multe pli simpla ne okupi sin pri tio. Estas necese ke oni havu ankaŭ tempon por tio, kaj neniu el la laboristoj de la penso ĝin havas: multe granda kuraĝo estas do necesa, ĉar nenio estas pli sensenca kiel tempo perdita. Nu, tiuj fenomenoj estas tiel misteraj, tiel malordemaj, tiel forkuremaj, tiel nekompreneblaj; kaj artifikaj, mistifikaj, trompaĵoj okazas tiel ofte, ke oni tre rapide senkuragiĝas; kaj ŝajnas ke tempo dediĉita por tio estus pli utila por fari alian ajn aferon, kaj eĉ tute nenion fari.

» Tiuj fenomenoj, mi diras, estas nekompreneblaj. Jen estas kelkaj el ili, kiujn mi certege konstatis, kaj eĉ fotografis de tre longe, ĉar mi komencis miajn studojn kun Allan Kardek, en 1861 — jam de 45 jaroj.

» Tablo peza je 10, 15, 20 kgmj kaj pli povas subleviĝi tuta, disigi el tero, supreniri ĝis 20, 30, 40 cmj alte, per nekonata forto elfarita de eksperimentantoj, kiuj sidas ĉirkaŭe kaj sternas siajn manojn super ĝi. Se la tavolo estus fera kaj se ni havus sur manoj gantojn magnetajn, ni dirus ke la afero estas tre simpla, ĉar ni naive kredus ĝin klarigitan. Sed ĉar ni ne jam donis nomon al la altira forto ĉi tie aganta, ni pensas, ke tiu sublevo estas neakceptebla, kaj, por ĝin akcepti, ni estas ebligataj vidi ĝin dek, cent fojojn kaj ĝin fotografi, certaj ke la lado ne enskribos eraron de niaj sentoj.

Alia fakto ne malpli certa: ne estas absolute necese ke oni tuŝu tiun tablon, por ke ĝi subleviĝu: tavolo povas turniĝi, subleviĝi, tremeti, kiam neniu ĝin tuŝas: ĉar se oni pudras ĝin per blovilo, nenian makulon de fingro oni vidas sur la blanka tavolo.

Sed, oni demandas kelkafoje, kial oni ĉiam uzas tablon? Sendube tial ke ĝi estas la sola meblo ĉirkaŭ kiu oni ĝenerale kutimas sidi: sed ĉiuj objektoj estas por tio taŭgaj. « Jen estas alia meblo, multepeza salona apogseĝo. Dum mi parolas kun

ĉeestantoj, ĝi moviĝas senpere, glitas sur pargeto, venas ĝis mi: mi per piedo ĝin repuŝas: ĝi revenas, kaj ĉio okazas dum granda lumo. Kiu ĝin al mi alkondukas? certe neniu ĝin tuŝas, kaj ĝi estas malproksima el la plej proksima eksperimentanto je pli ol unu metro ».

Ĥatoj estas frapataj en tavolo, tra aero, en muroj; ili respondas al demandoj, diktas vortojn, frazojn, pensojn, ofte strange kaj fantazie. Kiu batas tiel? neniu el ni. Estas forto same fizika kaj *psika* (1), certe inteligenta. Ĉu ĝi estas interne de ni aŭ ekster el ni?

Daŭrigu: « Longa kaj peza kurteno alpendigita al plafono malsupreniras ĝis pargeto: subite ĝi moviĝas, kiel movita

de forta vento, sin jetas sur nin, kiuj sidas ĉirkaŭ tavolo, kaj ĉirkaŭas niajn kapojn. Ĉiuj fenestroj estas fermataj, neniam vento blovas. Neniu estas ĉe ni aŭ malantaŭ ni. Eĥo sen kaŭzo? ne; sed kaŭzo nekonata ».

Fortepiano peza je 300 kgmj, sur kiu ludas infano, eksaltas. Tablo, sur kiu sidigas homo peza je 87 kgmj, subleviĝas. Anstataŭ homo, oni metas sur ĝin sakojn da sablo kaj ŝtonojn pezantajn kune ĝis 75 kgmj: forto elfarita de eksperimentantoj estas tiel granda, ke, pro tiuj fortoj kontraŭaj, tavolo disrompiĝas.

Oni alpendigas tablon al dinamometro (pezilo), kies montrilo montras 35 kgmj; tavolo subleviĝas al dinamometro, kies montrilo montras 3, 2, 1, 0. Kontraŭe oni petas, ke la tavolo iĝu pli peza: ĝia pezo iĝas tiel granda, ke oni ne plu povas ĝin disigi el tero, kvazaŭ ĝi estus kun ĝi ŝraŭbita.

Oni povas ankoraŭ citi multe da analogiaj fenomenoj. « Mi aŭdis verajn batojn de frapilego sur tablon, batojn de pugno

sur pordon, kiuj mortigus iun, kiu ilin ricevus. Ĝenerale tiuj fortegaj batoj estas protestoj kontraŭ neaĵoj. Mi diras ekzemple: « Tiuj ŝercoj ne pruvas, ke tie ĉi estas animo ». Tuj tri batoj ŝajnas rompi la tablon: tie estas volaĵo ».

Tiun volaĵon, tiun intencadon ni retrovas en ĉiuj fenomenoj. Grafo de Gasparin, al kiu ni ŝuldas la unuajn sciencajn eksperimentojn pri tiu afero, kredis ke ĝi estas nur la volo de la ĉeestantoj, kaj ke nia volo povas agi ekster ni per elsendo de flua forto. Tiu hipotezo, bona por kelkaj fenomenoj, ne estas bona por ĉiuj. En 1855, Thury, profesoro de fiziko en Universitato de Genevo, imagis *psikodon*, substanco median inter animo kaj korpo, kiu povas agi ekster ni.

Tiuj fortoj estas certe naturaj, ĉar ĉio estas en naturo, kaj nenio apude. Sed elemento psika estas necesa: tiuj movadoj de tavoloj, tiuj fizikaj fenomenoj, tiuj diktitaj frazoj, estas ordinare vulgaraj; tamen estas ideoj, intencoj, volo. Mi parolas al tavolo kvazaŭ ĝi aŭdas, oni ŝajnas interparoli kun estaĵo kiu malaperos post eksperimentoj, kiu ŝajnas kreita de la ĉefa ĉeestanto, de tiu kiu havas la plej da fluo, de la *mediumo*. Ĉu la aro da fortoj de la ĉeestantoj kreas specialan forton? ĉu ĝi estas disigo de ilia personeco? ĉu tio estas kondensado de etero psika, interne de kio ni vivas? ĉu tio estas inteligenta forto malsimila je ni, animo jam vivinta sur tero, novaj estaĵoj nevideblaj? Tio estas hipotezoj, kaj science ni devas nenium el ili rifuzi ».



SPIRITISMA EKSPERIMENTO. TUTA ALTIĜO DE TABLO.

(1) *psika*. A *psychic*, F *psychique*, G *psychisch*.

Estus antaŭtempe serĉi ian teorion de tiuj fenomenoj. Galileo eraris, penante klarigi kapablojn de sukceso; Lavoisier eraris, kiam li penadis klarigi aerolitajn; Galvani eraris klarigante elektron. Ni sciu atendi.

Niaj kvin sentoj permesas tre malperfekte, ke ni interrilatigu kun tiuj elmontraĵoj de nekonataj fortoj. Ni vivas en mondo neesplorita: ni estas similaj je Kristoforo Kolombo, la antaŭan tagon kiam li ekvidis la Novan Mondon: ni veturas tra laNekonataĵo.

MARCEL FINOT.

**Eusapia Paladino.**

Kiel sekvo al mia antaŭa artikolo, mi donas ĉi sube kelkajn detalojn pri unu el la plej famaj medioj.

Eusapia Paladino estas certe la plej interesa el la medioj, kiujn oni povis observi: la plej famaj laboristoj de la spiritismo povis ŝin vidi, kaj miregis pro la potenco de ŝia psika forto.

Apenaŭ ŝi alvenas en ian lokon, kaj la tabloj turniĝas, la mebloj moviĝas, interparolado komencas inter tablo kaj la eksperimentantoj. Kelkafoje sendube ŝi ŝajnas trompistino, sed ĝenerale oni observis tiel zorgeme la faktojn, ke oni povas certigi, ke ili estas veraj, nedisputeblaj. Jen, ekzemple, ŝiaj lastaj eksperimentoj, okazintaj dum la unuaj monatoj de tiu jaro 1907, en Italujo.

La fama profesoro Lombroso povis enskribi materie la misteran forton elsenditan de la medio, per speciala kardiografilo (mezurilo de pulsadoj de koro). Eusapia iris poste en la laborejon de profesoro Foa, sekretario de Akademio de Sciencoj de Torino, kaj ne malpli interesaj estis la fenomenoj, kiujn oni povis tie palpi.

La kolono de hidrargo de speciala manometro enskribis premon de 10 kilogramoj, pro nekonata forto. Fotografita plato, envolvita en nigra papero, kaj tenita sur la kapo de la medio, estis impresata, kiel per radioj X, kaj ĝi estis fortege fortirata el la manoj de la observanto. Per rivelado, ĝi montris la nigran signon de kvar fingroj, kaŭzitan do de fenomeno de radiumaktiveco. Tamen, en la ĉambro estis grandega lumo, kaj la piedoj kaj kruroj de Eusapia estis zorgege tenitaj de du el la eksperimentantoj.


Tablo peza je 8 kilogramoj disrompiĝis kaj dispeciĝis laŭ mil fragmentoj. Alia plato fotografata najlita sub tablo, malnajliĝis mem kaj, antaŭ la okuloj mirantaj de ĉiuj, metis sin sur la tablon.

Tiaj estas la fenomenoj certigitaj en raporto subskribita de doktoro Foa kaj de kvar aliaj scienculoj. Ni ilin nur rapide priskribas, lasante al ili ilian propran valoron, kiu estas sufiĉa, por nin miregigi.

MARCEL FINOT.



EKSPERIMENTO KUN EUSAPIA PALADENO. ALTIĜO DE TABLO ĜIS 20 CENT.



SPIRITISMA DESEGNAĴO.  
La domo de Zoroastre sur la planedo Jupiter.

**Spiritisma astronomio.**

Kiam Camille Flammarion komencis siajn spiritismajn studojn kun Allan Kardec, tiu ĉi estis fondinta « Paris'an Societon por Spiritismaj Studoj ». La kunsidoj komencis per alvoko al la Bonaj Spiritoj, post kio kelkaj ĉeestantaj personoj estis petataj sin forlasi al inspiro, kaj skribi. Ili estis la « skribantaj medioj ».

Victorien Sardou, la mondkonata dramverkisto, kiu — kelkatempe — vizitadis Observatorio'n (astrobservojn), verkis kuriozajn pagojn pri la anoj de la planedo Jupiter kaj pitoreskajn desegnaĵojn, kiuj prezentis la loĝejojn de kelke da ili. Ni donas ĉi apude unu el ili, rimarkinde delikata kaj aera.





# Esperanto internacia praktikilo.

## SOCIAJ DEMANDOJ.

« **Laboro** »: Tia estas la bela nomo de nova organo Esperanta, monata bulteno de « Tutmonda Labora Societo » pri kiu ni jam parolis. La redakcio bonege komprenis, ke oni frukte laboras nur en paco, kaj faras la jenan deklaron, kiue estas vera programo. « Nepre kaj senkompatate ni malakceptos ĉiujn artikolojn tro revoluciemajn aŭ politikemajn. Nur por artikoloj, studoj, dokumentoj rilataj al la profesiaj interesoj kaj verkitaj de laboristoj estas difinita nia gazeto. »

Certe tiu programo havigos bonajn rezultatojn, kaj ni havos okazon paroli denove pri « Tutmonda Labora Societo » kaj pri « Laboro ». Senpaga n° estas senpage ricevebla de la administracio, ĉe S<sup>ro</sup> Paul Blaise, 4 Rue Bourg-Tibourge Paris (IV<sup>e</sup>).

## TURISMO

**Gvidlibro pri La Monto-Saint-Michel.** — Jen verko ŝuldata al fervora samideano, S<sup>ro</sup> Galard el Angers, kiu estas vera modelo proponinda al ĉiuj grupoj. La aŭtoro havis la bonan ideon traduki tre interesan francan gvidlibron pri la tutmonde famaj monto kaj abatejoj, kaj, konsente kun la fervoja kompanio de *l'Ouest*, oni intermetis la esperantajn paĝojn inter la francajn, tiamaniere ke ĉiu franca paĝo havas kontraŭ si la tradukon en Esperanto. Do la gvidlibro, kies nacia parto havas belegajn ilustraĵojn, taŭgas por esperantistoj kiel por Francoj, kaj tiu farmaniero, kvankam jam kosta pro la amplekso de la teksto, estas tamen multe malpli kara ol se oni estus eldoninta nur esperantan gvidlibron. Plue, la franca kompanio eble ne estus permesinta eldonon pure Esperantan; la procedo de S<sup>ro</sup> Galard ebligis al Esperanto enpenetri en la fervojan kompanion per pordo duone malfermita. Eble, estonte, ĝi tute malfermiĝos se multaj esperantistoj mendos la gvidlibron.

## KOMERCO.

Pli kaj pli komercistoj aŭ komercaj rondoj kaj organoj komprenas la gravecon de Esperanto. Tion pravas la anoncoj pli

oftaj en niaj diversaj gazetoj, kvankam ankoraŭ nemultaj; tiuj, kiujn ni povis legi en la bonegaj gvidlibroj por la kongreso kaj pri la londonaj interesajoj.

Fine mi plezure legis gravan 5-paĝan artikolon pri Esperanto de nia fervora samideano J. C. O'Connor, en « **The Business man's magazine** »: la magaseno de la aferisto. Jen tre notinda fakto, ĉar tia gazeto, kiel ĝin montras ĝia nomo, ne kutimas okupiĝi pri *sensencaĵoj!*

## SCIENCOJ.

La « **Vocabulaire technique et technologique français-Esperanto** » de nia estimata samideano Ch. Verax estas nova paŝo al la disvastiĝo de Esperanto ĉe la sciencistoj. Pli ol ĉiujn la redaktoro de « **Tra la Mondo** », pro la universaleco de la temoj en ĝi pritraktataj, scias kiom, iafoje, estas malfacile verki teknikan artikolon; kaj nesciite de la legantoj, okazis iafoje ke unupaĝa artikolo ricevita por « **Tra la Mondo** » kaŭzis multoblajn interŝanĝojn de leteroj, rimarkoj, diskutoj, ĝis akceptinda solvo pri iuj kreotaj terminoj.

Tiu laboro ne estis perdita, kaj malfermante la volumon de S<sup>ro</sup> Ch. Verax, ni havis la kontentiĝon legi la nomon « **Tra la Mondo** » inter la 4 fontoj, el kiuj li precipe elĉerpis materialojn por sia verko. La tri aliaj, krom la vortaroj, estis « **Lingvo Internacia** », « **Internacia Scienca Revuo** » kaj « **Matematiko terminaro** ».

Konsciante pri la penadoj necesaj por redakti korekte tiajn gazetojn, S<sup>ro</sup> Verax, teknika specialisto, kolektis ĉiujn teknikajn esprimojn legitajn kaj akceptindajn; li uzis la radikvortojn por krei devenajn vortojn laŭ la reguloj de nia lingvo, kreante laŭbezone logikajn kaj internaciajn sciencajn sufiksojn; kaj tiel li verkis vortaron tre utilan. Kompreneble, tia vortaro ne estas definitiva; okazas rilate Esperanton kiel pri la naciaj lingvoj: nur la uzo igas akcepti aŭ forĵeti la novajn vortojn. Sed, sendube, malmulte da ili estos forĵetataj el la vortaro de S<sup>ro</sup> Ch. Verax, kiu metis grandan prudenton je la servo de nediskutebla kompetenteco.

La volumo estas zorge eldonita, kaj prezentita sub bonaspekta kartona kovrilo. Ĝi estas labora libro. Ĉe Hachette & K<sup>o</sup>.

## KRONIKO KAJ BIBLIOGRAFIO.

Pli kaj pli Esperanto enpenetras la naciajn gazetojn: S<sup>ro</sup> Vaclay Riegel, unu el la kunlaborantoj de nia bonega kunfrato « **Časopis Českých Esperantistů** » skribas al ni ke la Direktoro de l' bohema gazeto « **Svetozor** », tre interesata de la legado de nia artikolo pri la Islanda Parlamento, kiun li poste reprenis laŭ nia permeso, malfermas regulan kronikon en Esperanto. Ni ĝojas pro la helpo tiel alportita de ni al la bohema propagando.

En Meksikujo, nia fervora samideano A. C. Wright donas esperantistajn lecionojn kaj sciigojn en « **El Testigo** » kaj « **El Esforzador Mexicano** ».

En Seattle, Was, U. S. de A., alia fervorulo Charles E. Randall instigis la administracion de nova ĵurnalo, « **Saturday Evening Tribune** » dediĉi grandan spacon al Esperanto.

En Brazilujo, Hispanujo, Bohemujo, Anglujo, Francujo, kaj multaj aliaj landoj, sama fakto okazas, kio estas la plej bona pruvo pri niaj progresoj.

En Francujo ni citos inter la plej malnovaj, la interesan monatan bultenon « **Le Correspondant International** », eks « **Internationalis Concordia** », kiu, de longe, subtenas Esperanton. Ĝi estas la oficiala organo de la Societo « **Concordia** » pri interrilatoj kaj korespondado internaciaj, pri kiu ni jam parolis, kaj kiu estas tute atentinda por ĉiuj kiuj interesiĝas pri la eksterlandlimaj aferoj, t. e. por ĉiuj esperantistoj. Ĉiuj sciigoj estas riceveblaj de la oficejo 15, Rue des Grands Augustins, Paris.

Citinda ankaŭ « **Skrapp Book** » pri kiu ni parolis en nia maja n°. La magaseno estas tre bela, kaj estas grava fakto ke, en ĝi, troviĝas 5-paĝa artikolo pri Esperanto.

En « **Suno Hispano** » ni legis plezure longan artikolon inspiritan de unu el niaj problemoj (Septembra 1905), kies

solvo estis *neniamaniere*. Ni ĝojas konstatante ke ĉiuj fakoj de nia gazeto estas juĝataj atentindaj.

Per nia bonega kunfrato ni ekscias monate ke Esperanto senhalte disvastiĝas en Hispanujo.

La Julia n° nin sciigas pri eldono de « **Tutmonda Ilustrita Enciklopedio** », kiu enhavas etimologiojn kaj tradukojn de la plimulto el la vortoj *france, itale, angle, germane, portugale, katalane* kaj **Esperante!** La verko estos plena vortaro hispana-esperanta kaj estos do tre grava por niaj transpireneaj amikoj. Ĝi estos eldonata de la fama eldona firma esperantista **José Espasa**, al kiu Esperanto kaj la esperantistaj Hispanoj multe ŝuldas.

Por abonoj kaj sciigoj sin turni al « **Suno Hispana** ».

« **Antaŭen Esperantisto** », nia Perua kolego pli ampleksiĝis kaj enhavas regule dek ses paĝojn. En la Marta n° tre grava artikolo por la Hispanoj: ĝi estas la analizo de l' nova vortaro germana-Esperanto kun la traduko, hispanen de l' novaj radikoj.

Nia kolego afable dediĉis artikolon al nia enketo. Koran dankon.

### Novaj organoj:

« **The Esperanto Instructor** », celas instrui la lingvon al la angloparolantaj: Ĉe Gilbert Pitman, 85, Fleet Street, London, E. C. Jare 2 fr. 50 (1 Sm.).

« **Tra Parizo** » monata organo de l' « **Amicale Espérantiste de Paris** », nova grupo tre agema, kiu jam organizis multajn kunvenojn kaj promenadojn, interalie por la 21<sup>a</sup> de Julio, en Brunoy. 2 fr. (0,80 Sm.) ĉe S<sup>ro</sup> Clément Vachet, 33, Rue Radziwill, Paris.

Korajn dezirojn al ambaŭ.

### Novaj poŝtkartoj:

« **La esperantistaj gazetoj** », poŝtkarto montranta, lerte

arangitajn, la plimulton el niaj gazetoj: unu centu 5 fr. 40 (2,16 Sm.), ĉe S<sup>ro</sup> N. Frumkin, Varsovio, Pologne, Str. Elektraĵna, 13. Simila duobla poŝtkarto estas eldonita de « Casopis Českých Esperantistu ».

« **L' Universelle**. Tia estas la titolo de romano, france skribita, de nia konata kaj distinginda samideano *Emile Cherblanc*, tute alloga, kaj bonega por la propagando.

La nobla ama aventuro, kies okazaĵoj animas ĝiajn paĝojn, komencas en Boulogne-sur-mer, dum la neforgesebla kongreso pri Esperanto, kiu, unuafoje, sub la prezido de D<sup>ro</sup> Zamenhof, kunigis la reprezentantojn de pli ol 20 nacioj, frate unuigintaj en la uzado de sama lingvo. Ĝi disvolvigas inter artaj vidaĵoj kaj historiaj elvokoj, tra London', Dunkerque, Ostende, Bruxelles, Liège. Ĝi finiĝas melankolie en Antwerpen', meze de l' bruo de l' korporaciaj muzikoj, kies akordoj festas la 75<sup>an</sup> datrevenon de la Belga Sendependeco.

La legado de tiu verko estas vera ĝuo por la esperantistoj, kiuj ĉeestis nian unuan kongreson, kaj ankaŭ plezuro por la aliaj.

Plue tiu romano, la unua kies temo estas Esperanto, estas sagaca propagandilo, kiun ni ne tro sciis rekomendi al la atento de la esperantistoj. Sincerajn dankojn kaj gratulojn meritas nia talenta samideano: (3 fr. 50, 1,40 Sm, ĉe la *Librairie Universelle*, 33 R. de Provence, Paris).

« **Progresado de la Pilgrimanto** », alegoria sonĝo de Johano Bunjano (John Bunyan). Tiu kurioza verko, kiel ĝia nomo ĝin montras estas alegorio moraliga verkita de eksdrinkulo kaj blasfemulo iĝinta piulo kaj predikisto vojaĝanta. Tiu John Bunyan « la blasfemema lutisto (riparisto de boliloj) de Elstovo » (Elstow), vilaĝo de la Bedforda provinco en Anglujo, naskiĝis en la jaro 1628, studis en senpaga unuagrada lernejo, lernis la metion de riparisto, kaj post sia 17a jaro varbiĝis en la militistaron de Olivero Kromvelo, kaj batalis dum la Interna Militado. Edziĝinte, li fariĝis drinkulo kaj entuziasma sportulo je la dimanĉo. Voĉon el la ĉielo li aŭdis, kiu riproĉis al li sian konduton. Terurigita pro tio, li sincere pentis kaj fariĝis piulo, vojaĝante por prediki, inter la Bedfordaj vilaĝoj, kiel Baptisto. Pro tio, malpermesita de la tiamaĵ leĝoj, li estis dufoje malliberigita, kaj en malliberejo verkis ĉirkaŭ 60 volumojn, inter kiuj troviĝas aldono al la « Progresado ». En tiu verko estas videblaj la piaj sentoj kaj la predikemoj de Bunyan, sed prezentitaj tute netede, kontraŭe tre interese kaj alloga, sub formo de pilgrimvojaĝo dum kiu li trapasas multajn aventurojn, kies personoj estas ĉiuspecaj virtoj kaj malvirtoj.

La tradukisto estas nia malnova samideano, Jos. Rhodes, la fondinto de la grupo en Keighley, la unua angla se ni ne eraras; li celis konservi la stilon kuriozan de la angla metiisto. La verko enhavas multajn ilustraĵojn, afable pruntitaj de S<sup>ro</sup> W. E. Stead, la fama redaktoro de « Review of Reviews », kaj eltirita el la angla eldono « The Pilgrim's Progress » (n<sup>o</sup> 8 el la admirinda Serio da Libretoj por Infanoj — « Books for the Bairns »).

La volumo kostas 2 fr. (0,80 Sm.) ĉe Stead's Publishing House, 39, Whitefriars Street, London, E. C.

« **Hebrea Kalendaro** » kiun uzis la Izraelidoj dum la jarcento de Jesu-Kristo. Interesa historia provo de Pastro Jacobo Bianchini, en kiu oni trovas la devenon de nunaj festoj, kun interesaj klarigoj pri la tiutempa religia jaro kaj la civila. Oni vidas ankaŭ en ĝi ke la tagoj komenciĝis je l' sunkuŝiĝo: ke nur du tagoj de la semajno havis propran nomon: la unua *sabato*; kaj la lasta, *parascivo* (vendredo); ke la monatoj estis lunaĵ, t. e., komenciĝis kaj finiĝis kun luno: unu jaro konsistis el 354 tagoj; kaj, por sekvi la sezonojn, ĉiutrigare okazis jaro el 13 monatoj.... La aŭtoro intencas konigi, poste, sciigojn pri ĉiuj festoj kaj kutimoj de la antikvaj Izraelidoj.

La verko kostas 20 cent. (pag. pm) kaj estas aĉetebla ĉe « Espero Katolika », Sainte Radegonde apud Tours (Francujo).

*Eldonoj de la librejo Franckh'sche Verlagshandlung, Stuttgart*: Unua ĉapitro el la Ama vivo en la naturo de Wilhelm Bölsche. — Edziĝa festo en Capri, de Paul Heyse. — La monaĥejo de Sendomir, de Franz Corillparzer. Tri verkoj de eminentaj germanaj aŭtoroj, tradukitaj Esperanten de nia konata samideano L. E. Meier. Ĉiu 1 fr. 35 ĉe l'eldonisto. 1 fr. 60 afr.

« Simpla metodo de la agronomia profitkalkulado », de A. Nippa (sen prezo).

Ĉe *Presa Esperantista Societo*, 33 Rue Lacépède, Paris,

multaj broŝuretoj eltiritaĵoj el **Lingvo Internacia kaj Internacia Sciencra Revuo**: « La kalendaro », de Lengyel Pál; « Pri la homa radiado », de E. Boirac; « Du Biletaj » de H. J. Bulthuis kaj L. Touchebeuf (40 c.); « La benkoj de la Promenejo », de J. Jouy kaj P. Corret (20 c.). « Une heure d'Esperanto » (2<sup>a</sup> eldono), de Th. Cart (60 c. vendata je l' profito de l' blinduloj).

« Esperanta Frazlibro de l' turisto », frazaro en la jenaj lingvoj: franca, angla, germana, itala, hispana, Esperanta. Tiu libro, tre praktika, estas speciale rekomendinda al la vojaĝemaj samideanoj. (50 c. — 0,20 Sm.)

« Mocard kaj Saljeri », el « Lingvo Internacia », dramaj Szenoj de A. S. Puŝkin, Rusujo, trad. de Vs. Lojko: 25 c., 10 kop.

« Sinjoro Vento kaj Sinjorino Pluvo », el « Juna Esperantisto », de Paul de Musset, Francujo, trad. de Paul Champion (Sen prezo).

« Guide Esperanto de la Croix-Rouge », de L<sup>to</sup> Bayol. (Vidu la artikolon en la Junia n<sup>o</sup>). Bonega propagandilo enmetebla en leterojn, rekomendinda kaj varme rekomendata al la grupoj por la propagando en la militaj kaj ruĝ-krucaj mezoj. 5 c. ĉiu ekz.

La « Grand Dictionnaire Français-Esperanto » daŭras eliri regule. La 5<sup>a</sup> volumero aperis kaj enhavas vortojn de *arcane* ĝis *atteindre*.

Ĉe la eldonistoj de *Germana Esperantisto*: D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof: « Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto and Esperanto-Deutsch »: 1 M., 0,50 Sm. — « Esperanta — Germana Frazlibro de la ĉiutaga vivo », de J. Borel, laŭ R. Anton: 0,50 M., 0,13 Sm.

Kiel oni vidas, niaj germanaj samideanoj preparas jam la 4<sup>an</sup> Kongreson.

#### « Tutmonda jarlibro esperantista. »

La eldono de jarlibro estas malfacila tasko, precipe kiam ĝi enhavas nomojn kaj adresojn el ĉiuj landoj. Do ĝis nun ni konstatis, nevolante ilin peze rimarkigi, multajn erarojn en la Jarlibroj por 1904, 1905 kaj 1906, neeviteblajn laŭ la plano elektita.

Apogante sur sperto akirita, la redaktoro de la jarlibro, S<sup>ro</sup> F. de Ménéil, forigis la erarajn kaŭzojn, alprenante alian planon tre klare prezentitan en la antaŭparolo de la jarlibro por 1907. De nun tiu verko enhavas kaj enhavos:

1<sup>e</sup> la nomojn de la *novaj esperantistoj*, kiuj sendis siajn aliĝon kaj adreson al D<sup>ro</sup> Zamenhof;

2<sup>e</sup> la nomojn de la *novaj esperantistoj*, kiuj sendis sian adreson rekte al la Redakcio de la « Tutmonda Jarlibro »;

3<sup>e</sup> la nomaron de la *societaj esperantistaj* kaj de *iliaj anoj*, kiam la sekretario sendos tiujn sciigojn, kaj *nur tiam*;

4<sup>e</sup> la *konsulojn esperantistajn* enmetitajn en la urbon, kie ili loĝas;

5<sup>e</sup> la plenan nomaron de ĉiuj gazetoj *Esperantaj* aŭ poresperantaj.

Do la eraroj devenos nur de la malzorgo de la *novaj esperantistoj* kiuj mallegeble skribis siajn nomon kaj adreson — kio, ho! ve oftege okazas — aŭ de la sek. de grupoj kiuj ne zorge kontrolis siajn anajn nomarojn aŭ tute malzorgis ilin sendi — kio ankoraŭ ne estas malofta.

Bona ideo ankaŭ estas aldoni inter krampoj unu aŭ plurajn el la literoj S. P. L. A. signifantaj: skribas, parolas, (Esperante kompreneble), atesto pri lernado aŭ atesto pri kapableco.

De nun oni povas senŝanceliĝe rekomendi la *Tutmondan jarlibron esperantistan* dirante pri ĝi la samon kiel pri la *Ĉefaj aĵoj*: havu ĝin, diskonigu ĝin, kio estas la plej bona rekomendo, kaj aldonante: kompletigu ĝin. (Ĉe Hachette & Kio, 3 f 50. fr. 3,60 ĉe ni).

« **Gvidlibro pri Bourg (Francujo)** ». Oni multe atentis, dum la kongresa ekspozicio, tre rimarkindan gvidlibron pri Bourg, la urbo tutmonde konata pro sia fama preĝejo, iam talente priskribita en « Tra la Mondo ». Ni nur aludos tie ĉi tiun ĉarman kaj belan broŝuron, rimarkinde eldonitan de la firmo Witteryck. Tiu gvidlibro estas nova sukceso por la bonfama presejo, kies ĉiuj eldonaĵoj, ilustritaj aŭ ne, havas veran artan karakteron. Ni konsilas al ĉiuj grupoj havi ĝin kaj diskonigi la broŝuron, senpage riceveblan.



Kl. Ecole des Roches.

ĈE LA LERNEJO « DES ROCHES ».  
La ĥemia laborejo.

## Internacia enketo pri Edukado <sup>(\*)</sup>

17 Landoj partoprenintaj.

La eduka sistemo de Skotlando. — Lernoprogramoj en Japanaj lernejoj. — Edukejoj en Nova Zelando. — Konkludo.

En nia lasta N<sup>o</sup> ni parolis pri l'Ecole des Roches, fondita de S<sup>ro</sup> Demolins, kaj ĵus — de tiu tempo — la blinda morto trafis lin antaŭtempe, en plena fortikeco.

Unu el la unuaj, li estis kompreninta, ke oni ne povas ege laborigi la cerbon ne zorgante pri la korpo, kaj li multe ŝatis la instruajn metodojn de la Angloj. En volumo fama, kies apero instigis pasiajn diskutojn: « La supereco de la Anglo-Saksoj », li aljuĝis tiun superecon al la edukada sistemo. Oni povas diri, ke tiu libro — instigante multajn personojn pli atente ekzameni tion, kio estis farata trans la Manika Maro (angle: kanalo), estis unu el la unuaj iloj por la « kora konsento ». Kun respekto ni salutas hodiaŭ lian nomon, kiel ni estis feliĉaj konigi tutmonde lian instruan kreadon. (\*\*)

T. I. M.

\*\*

La eduka sistemo de Skotlando devenas, ĝuste dire, de la Reformacio Protestantista de l' dekseca centjaro. En tiu tempo John Knox (fama skota reformanto) redaktis projekton administran bonege ellaboritan, kiu donis al ĉiu paroĥo de la lando almenaŭ unu lernejon unuagradan kaj al ĉiu urbo unu lernejon duagradan; la supron de tiu konstruaĵo formis la universitatoj. Por efektivi tiun

instruprojekton admirindan, oni elĉerpis el la fondaĵo de l' eklezio katolika, kiun, en Skotlando, oni ĵus estis disiginta de la ŝtato; sed, kaŭze de l' avareco de l' nobelaro (tiu ĉi nobelaro ludas en la historio de Skotlando rolon tre malbelan), jam fariĝis tre malplenaj la monkofroj edukaj, kaj la projekto Knox'a tial efektiviĝis nur parte. Sed fine, per la leĝo de la 1872<sup>aj</sup>, oni kreis en Skotlando Departementon de Publika Instruado por ĉiuj edukejoj ne-universitataj, elirigante la monrimedojn bezonatajn parte el la instrupagoj de l' lernantoj, parte el impostoj lokaj, parte el mondonacoj disdonitaj de l' ŝtato laŭ rezultatoj de ekzamenoj. Nuntempe ne plu ekzistas instrupagoj; ĉia instruado publika estas por infanoj kvin-ĝis dekkvarjaraj senpaga kaj deviga.

Skotlando estas dividita je 32 graflandoj, kiuj, siavice, estas partigitaj je paroĥoj aŭ komunumoj; ĉie troviĝas ankaŭ kelkaj dekduoj da urboj, kiuj posedas, rilate al la administracio loka, proprajn rajtigojn. La suprenomita leĝo de jaro 1872<sup>a</sup> starigis en ĉiu paroĥo kaj urbo konsilantaron edukan (angle: « School Board ») ĉiu trijare elektitan per voĉdonado popola, kaj transdonis al tiuj ĉi konsiligoj la tutan lokan administradon de instruado unuagrada kaj supera, esceptinte la universitatojn.

La unuagrada lernejo akceptas plej ofte siajn

(\*) Fino. Vidu la N<sup>ojn</sup> 8an, 9an, 10an, 11an, 12an (IIa Jaro), kaj 1an (IIIa Jaro).

(\*\*) Ĉar ni ne povis utiligi ĉiujn interesajn vidaĵojn afable senditajn de S. Bertier, Direktoro de l'Ecole des Roches, ni uzas ilin hodiaŭ.



Kl. Ecole des Roches.

ĈE LA LERNEJO « DES ROCHES ».  
La kolektado de la fojnoj.

instruotojn en la aĝo de 5 jaroj, kaj donas al ili okjaran kurson instruadan, daŭrantan en la apartaĵo « infana » (aŭ « plej juna ») du jarojn kaj en la « juna » kaj « plimaljuna » tri jarojn. La kurso enhavas la lingvon anglan, historion, geografion, aritmetikojn, skribadon, desegnadon, kantadon, natursciencojn, korpokercadon, kaj iom da manlaboro, unuvorte ĉiujn lernobjektojn elementajn, kiujn oni cetere praktikadas ĝis grado sufiĉe alta. Tiu kurso finiĝas per ekzameno (t. n. « *Qualifying Examination* »), kiu prezentas, por tiel diri, elirejojn el la studadoj elementaj kaj samtempe enirejojn en la studadojn apartajn aŭ superajn. Multe da lernantoj neniam plenumas tiun ĉi ekzamenon, aŭ ĉar ili malregule vizitadis la kurson, aŭ tial ke ili eniris tro malfrue en la lernejon. Aliflanke, lernantoj akurataj kaj lertaj povas jam plenumi la ekzamenon, havante dek du jarojn. Tiaokaze ili povas fari elekton inter du vojoj. Se ili intencas eliri el la lernejo estante 14-jaraj, ili trairas, ordinare en la sama lernejo, kurson alplenigan, praktikadante lernprogramon pli personan kaj apartan; por la knaboj tiu kurso estas industria, komerca, aŭ terkultura; por la knabinoj mastruma. Oni celas helpi al memstaraj klopodoj de l' geinstruatoj, formi ĉe ili guston ĝustan pri la literaturo, kaj disvolvi iliajn kapablojn de sendependa observado, ebligante ke ili sin mem instruadu laŭ metodoj ĝustaj; anstataŭ plenegigi ilin per faktoj pere akiritaj. Dekkvarjaraj, tiuj ĉi lernantoj eliras el la lernejo por sin doni al diversaj profesioj kaj metioj; multaj el ili faras apartajn kursojn ĉe la « vesperlernejoj », por sin perfektigi je kelkaj specialaĵoj, kiel ekzemple modernaj lingvoj, sciencoj, matematiko, stenografio, kaj librotenado, — instrufaktoj, kiuj ne apartenas al la kurso elementa.


Tiuj, kiuj deziras daŭrigi dum kelke da jaroj siajn studadojn, forlasas la

unuagradan lernejon, plenuminte la ekzamenon antaŭe nomitan, kaj eniras en superan lernejon, aŭ mezan aŭ duagradan.....

Bezone estas klarigi tie ĉi, ke en Skotlando tute ne ekzistas, en la ordinara senco de l' vorto, duagradaj lernejoj, kiujn la lernantoj eniras havante proksimume dek du jarojn. Ĉiuj duagradaj lernejoj havas departementon por la plej junaj, akceptante plimulte eĉ infanojn kvinjarajn, tute same kiel la unuagradaj lernejoj.....

La mezaj (« intermediate ») lernejoj donas al tiuj, kiuj jam plenumis la « *Qualifying Examination* », kurson tri- aŭ kvarjaran. Oni tie sin donas antaŭ ĉio al studadoj tute specialaj, kiel ekzemple la scienco, la komerco, la lingvoj. Inter la lernantoj de tiuj institutoj troviĝas la studentoj estontaj de l' « *Technical Colleges* » (teknikaj lernejoj), de l' « *Agricultural Colleges* » (terkulturaj lernejoj), de l' « *Schools of Art* » (belartaj lernejoj), kaj de aliaj edukejoj specialigaj; el ilia lernantaro elvenas ankaŭ la komercistoj kaj la plej bonaj metiistoj. La instrukurso de meza lernejo finiĝas per akiro de « atesto intermeza » (angle: intermediate certificate), kiu rajtigas sian posedanton eniri lernejon teknikan, belartan, k. s., aŭ duagradan lernejon. La lernantoj de tiuj ĉi mezaj lernejoj pagas instrumonon; sed, al junaj talentuloj malriĉaj, ĉiam estas eble havigi sufiĉe da rimedoj per ŝtataj mondonacoj aŭ de administrejoj lokaj. La samajn faciligilojn oni donas al la duagradaj lernejoj; kaj tiamaniere povas antaŭeniri ĉiu lernanto, eĉ la plej malriĉa.

La duagradaj lernejoj faras kvin- aŭ sesjaran kurson, post la « *Qualifying Examination* » komencantan. Simile kiel la mezaj lernejoj ĉi supre priskribitaj, ili sin limigas grandaparte per lernemoj tute apartaj. Ilia elirpordo estas la ekzameno por la « *Leaving Certificate* » (laŭvorte: *forirdiplomo*), kiu atestas kvanton da konoj preskaŭ ekvivalentan al la Oxford'a grado « *B. A.* ». La duagradaj lernantoj




Kl. Ecole des Roches.

ĈE LA LERNEJO « DES ROCHES ».  
La lignajista laborejo.

antaŭdifiniĝas plimulte por profesioj klerulaj, kiel teologio, medicino, leĝoscienco, instruado, k. t. p. Akirinte la « Leaving Certificate », ili povas eniri universitaton aŭ alian superan lernejon, kie ilia lernkurso kompreneble finiĝos per grado je l' fakultatoj teologia, medicina, literatura, sciencia, aŭ leĝa.....

Skotlando posedas kvar universitatojn: St. Andrews en jaro 1411<sup>a</sup> fonditan, Glasgow en 1450<sup>a</sup>, Aberdeen en 1494<sup>a</sup> kaj Edinburgh en 1582<sup>a</sup>; sume tio prezentas aron da 7000 ĝis 8000 studentoj el loĝantaro da 4 1/2 milionoj. Tiuj ĉi universitatoj, havantaj la fakultatojn literaturan, sciencan, medicinan, leĝan kaj sciencan, estas malfermitaj kiel por la viroj, tiel ankaŭ por la virinoj. Iliaj gradoj ordinaraj estas: M. A. (latine: *magister artium*), M. B. (latine: *medicinae baccalaureus*), M. D. (latine: *medicinae doctor*), B.Sc. (angle: *bachelor of science*), LL. B. (latine: *legum baccalaureus*) kaj B. D. (angle: *bachelor of divinity*). Plenuminte je plej granda honoro (« *summâ cum laude* ») la ekzamenon finan, la *Magistri* kaj *Baccalauri* jus fariĝintaj povas antaŭenpaŝi al gradoj pli altaj: Ph. D. (latine: *philosophiae doctor*), Lit. D. (angle: *doctor of literature*), kaj D. Sc. (*doctor of science*). Ĉiuj universitatoj povas ankaŭ doni al siaj eminentuloj la honorajn titolojn: D.D. (*doctor of divinity*) kaj LL.D. (*legum doctor*). Laŭ la eduka sistemo skota, la universitatoj neniel submetiĝas al la Departemento de Publika Instruado, nek pri ekzamenado, nek pri administrado, nek pri financo, sin regadante ĉiurilate laŭ propra leĝo, « *Scottish Universities Act* » nomata.

En Skotlando tute ne ekzistas tia bataldisputado religia, kiu maltrankviligas Francujon kaj Anglujon. Ĉe ĉiuj publikaj lernejoj oni donas instruadon biblian, sed ĉiuj gepatroj povas forpreni sian infanon dum tiuj lecionoj; preskaŭ neniam fariĝas do iaj ajn plendoj pri tiu ĉi punkto. La eklezio katolika persistas, preskaŭ sola, konservi en propraj manoj siajn edukejojn, kaj, pro tio ĝi devas elpagi iliajn kostojn administradajn. Kompreneble tiaj lernejoj sekvas la instruprogramon nacian, enkalkulinte la ekzamenadon, kaj ricevas ŝtatajn



INSTRUADA SKALO EN SKOTLANDO.

mondonacojn..... Ĝis jaro 1880<sup>a</sup> Skotlando estis la plej bone instruita lando de Eŭropo; sed dum la dudek jaroj pasintaj ĝi estis superita de kelkaj partoj de Svisujo kaj Germanujo. Nuntempe ĝi tenas la plej altan viĉon rilate al instruado unuagrada, kaj ĝiaj duagrada lernejoj egaligis rapide je la plej perfektaj ekzemploj de gimnazioj germanaj kaj liceoj francaj. Jam de du jaroj la parlamento angla prilaboras por Skotlando nova « *Education Act* » (eduka leĝo), kiu konservas la plej bonajn metodojn instruadajn kaj administradajn, reformante samtempe la edukadon de l' instruistoj kaj la administradon de l' normalaj lernejoj

JAMES KNIGHT,  
estro de l' lernejo  
« St. James », Glasgow  
(Skotlando).

Esperantigita de  
J. W. EGGLETON (Germanujo).

\*.\*

Pri la lernoprogramo en japanaj lernejoj mi ankaŭ ricevis tre ŝatindajn informojn de niaj bonegaj samideanoj S-roj Iwamura kaj Horio el Okajama.

S-ro Iwamura skribas: « Mi estas dudekjara kaj studento de la ĉi tiea kolegio. Mi estas internulo, t. e. mi loĝas kaj manĝas en ĝi.

Estas, en nia lernejo, tri departementoj: la I<sup>a</sup> por tiuj, kiuj lernas literaturon, politikon, leĝosciencan, k. a., la III<sup>a</sup> por tiuj, kiuj deziras fariĝi doktoroj; kaj la II<sup>a</sup> por tiuj, kiuj lernas en aliaj fakoj, precipe sciencaj. Mi estas en la klaso II, 2, A; 2 signifas ke mi estas en la dua lernada jaro; A signifas nur ke mia klaso estas dividita en pluraj partoj A, B,... kaj ke mi estas en la parto A. Jen estas la ĉiusemajna lernoprogramo de mia klaso: (Tabelo II<sup>a</sup>)

Estas en nia lando 7 kolegioj: la 1<sup>a</sup> en Tokio, la 2<sup>a</sup> en Sendai, la 3<sup>a</sup> en Kioto, la 4<sup>a</sup> en Kanazawa, la 5<sup>a</sup> en Kumamoto, la 6<sup>a</sup> en Okajama, la 7<sup>a</sup> en Kagoŝima. La lernantoj, kiuj finis la trijaran kurson, povas eniri la universitaton.

La kosto por la loĝado en nia kolegio estas proksimume de 15 jenoj ĝis 25 jenoj (15-25 Sm.). 2400 Sm. estas sufiĉaj por pasigi unu jaron ĉi tie. »

S-ro Horio ankaŭ estas lernanto de la kolegio de


Okajama sed li ne estas internulo; li loĝas ekstere. « Mi estas 23 jara, li skribas, kaj mi lernas en la klaso 1, 3, A, kies ĉiusemajna lernoprogramo estas jena: latina lingvo (3 h.), germana lingvo (8 h.), ĥinaj klasikaj verkaĵoj (2 h.), japanaj klasikaj verkaĵoj (8 h.), historio (3 h.), etiko (1 h.), elementoj de leĝoscienco (2 h.), elementoj de ekonomio (2 h.) korpaj ekzercoj (3 h.)

Mi ne konas la francan lingvon, sed mi ĝin lernos en la Universitato en Tokio la venontan jaron. »

Por fini tiun ĉi raporton mi donas jenan statistikon pri knabinaj kolegioj, sendita al nia bona kunbatalanto S<sup>ro</sup> Steenbuch, kiu ĝin tradukis, de S<sup>ro</sup> M. Kawaji, inspektoro de la lernejoj en Awaji.

« La publika edukado en Japanujo nuntempe tre progresas. Estas nun en tiu ĉi lando 27,138 antaŭ-preparaj lernejoj (japane; ŝo-gakko), 269 mezlernejoj (japane: ĉu-gakko), 91 altaj knabinlernejoj (japane: ko-to-jo-gakko), 61 normalaj lernejoj, 3 alt-normalaj lernejoj, 39 specialsciencaj lernejoj, 3 universitatoj kaj proksimume 3000 aliaj edukaj institucioj.

Inter la suprediritaj edukaj institucioj, la lernejoj por knabinoj ŝajnas esti malmultaj kompare je tiuj por knaboj, sed post la publikigo de la suprediritaj statistikoj estas malfermitaj multaj novaj knabinlejoj, kaj multaj ankaŭ estas preparataj. La nombro de la lernantinoj de la altaj knabinlernejoj estas nun pli ol 25.000, kaj pli grandigadas proporcie



Kl. Ecole des Roches.

ĈE LA LERNEJO « DES ROCHES ». Konstruado de Ponto de la lernantoj.

kun la plimultigado de la lernejoj. La nombro de la lernantoj de la samangaj lernejoj por knaboj estas nun pli ol 100.000.

La fakoj de instruado estas jenaj: etiko, japana literaturo, angla lingvo, historio, geografio, matematiko, zoologio, fiziologio, higieno, ĥemio, naturscienco, pentrarto, mastrumado, kudrarto, muziko, gimnastiko, socialaj ceremonioj. »

Mi nun raportis, plene aŭ resume, sed kiel eble plej ĝuste, pri la dokumentoj, kiujn niaj leg-

antoj tiel afable kaj tiel grandnombre sendis al ni de ĉiuj partoj de la terĝlobo. Mi esperas ke, per tio, mi montris nedisputeble, kio estis la celo de la entrepreno, kiel bonege nia Esperanto taŭgas por fari internaciajn enketojn pri kiu ajn temo.

Krom la sciigoj pri la ordinaraj lernejoj, kiujn mi petis, mi ricevis ankaŭ dokumentojn pri teknikaj kaj specialaj lernejoj: industriaj, militistaj. Ili trovas lokon en niaj fakaj paĝoj.

Tre sincere mi dankas denove miajn afablajn kunlaborantojn, kiuj donis al mi persone grandan ĝuadon pro la ekzameno de siaj interesaj sendaĵoj, kaj la verkado de mia raporto.

TH. ROUSSEAU. T. RUSO.

Kiel redaktoro de « Tra la Mondo », mi deziras ankaŭ danki la kunlaborantojn de nia distinginda samideano kaj bonega amiko P<sup>ro</sup> Rousseau.

	8h - 9h	9h - 10h	10h - 11h	11h - 12h	1h - 2h	2h - 3h
<b>LUNDO</b>	»	matematiko	ĥemio	germana lingvo	angla lingvo	gimnastiko
<b>MARDO</b>	germana lingvo	fiziko	matematiko	angla lingvo	desegnado	desegnado
<b>MERKREDO</b>	ĥemio	angla lingvo	ĥemio	germana lingvo	angla lingvo	gimnastiko
<b>ĴAŬDO</b>	matematiko	matematika	fiziko	desegnado	desegnado	»
<b>VENDREDO</b>	germana lingvo	germana lingvo	angla lingvo	angla lingvo	germana lingvo	»
<b>SABATO</b>	germana lingvo	fiziko	angla lingvo	gimnastiko	»	»

TABELO II<sup>a</sup> — LERNOPROGRAMO EN JAPANA LERNEJO.

Per sia emo respondi al nia alvoko, ili montaris ke ili sentas la internan ideon de Esperanto, pri kiu parolis tiel bele nia kara Majstro, D<sup>ro</sup> Zamenhof, dum la malferma kunsido de la Kembriga kongreso. Ni ĉiuj, kiuj laboras por la senĉesa progresado de lia admirinda kreaĵo, devas nin helpi reciproke por ĉiuj propagandaj celoj.

Tiuj, kiuj ne povis partopreni en la enketo povas almenaŭ labori nun por ĝin diskonigi. Oni resumu ĝin en naciajn lingvojn, oni publikigu, per naciaj instruaj gazetoj, eltiraĵojn kapablajn elvekigi la atenton kaj intereson de la pedagogiistoj, farante por Esperanta raporto tion, kion oni ofte faras por raporto verkita en iu ajn nacia lingvo. Sed la supereco de Esperanta raporto estas, ke ĝi estas tuj utiligebla por specialisto el kiu ajn lando! Aliparte, kaj tio



ĈE LA LERNEJO DES ROCHES. EN LA PARKO.

*Kl. Ecole des Roches.*

devas esti ankaŭ rimarkigita, la raporto estis verkata, sen malfacileco, utiligante dokumentojn el 17 landoj!... ĉar ĉiuj estas Esperante redaktitaj.

Kia homo, eĉ fanfaronante pro kvazaŭ universala lingvocienco, povus pretendi koni sufiĉe bone 17 malsimilajn lingvojn por utiligi sen longa pervortaraj laboroj, sen helpantoj, tiom da diverslingvaj dokumentoj!!

Oni ne malzorgu tion ĉi rimarkigi. Ni konfidas, pri tio, al niaj es-

perantistaj kunfratoj.

Fine, niaj legantoj utiligu la enketon en privataj paroladoj kun personoj apartenantaj al la edukistaro: unuvorte oni penadu utiligi la grandvaloran propagandilon, kiun ni plezure liveras al niaj legantoj.

A. MONTROSIER.



## LA EDUKEJOJ EN NOVA ZELANDO.

Oni povas dividi la publikajn edukejojn de Nova Zelando je tri klasoj:

1<sup>o</sup> La edukejoj unuagradaj por la geknaboj, kvin-<sup>2</sup> dekkvinjaraj. Tiuj ĉi lernejoj enhavas fakon por geinfanetoj kvin-<sup>2</sup> jaraj proksimume. Estas 1851 lernejoj unuagradaj en N. Z. kaj la tuta mezonombro da gelernantoj estas 120,265. La tuta nombro da geinstruistoj unuagradaj estas 3816. Oni instruas la knabojn kaj knabinojn kune sed ili ludas aparte.

2<sup>o</sup> La edukejoj duagradaj por la knaboj kaj knabinoj, dekdu-<sup>2</sup> deknajjaraj proksimume. Estas 27 lernejoj duagradaj en N. Z. kaj la tuta mezonombro da gelernantoj estas 4060. La tuta nombro da geinstruistoj duagradaj estas 246. Oni instruas la knabojn kaj knabinojn aparte en lernejoj apartaj.

3<sup>o</sup> La Universitato de N. Z. kiu konsistas el kvar kolegioj, po unu en ĉiu el la kvar ĉefurboj. La gestudentoj studas kune. Oni povas trapasi tra la tri gradoj de edukejoj senpage laŭ iaj kondiĉoj.

1<sup>o</sup> La edukado ĉe la lernejoj unuagradaj estas tute senpaga kaj ankaŭ deviga de la sepa jaro ĝis la dekkvara aŭ ĝis la lernanto gajnos ateston pri kompetenteco. Ne estas religia instruado en la publikaj lernejoj; sekve la katolikoj subtenas aparte siajn proprajn lernejojn. Estas tre malmultaj privataj lernejoj. Preskaŭ ĉiuj infanoj, riĉaj kaj malriĉaj, studas kune en la publikaj lernejoj unuagradaj.

La gelernantoj studas kvin horojn kaj kvin tagojn ĉiusemajne. Ili ne kunvenas sabaton. Estas ok semajnoj da libertempo ĉiujare.

2<sup>o</sup> La edukado ĉe la duagradaj lernejoj estas senpaga por ĉiuj lernantoj, kiuj plenumis sukcese la ekzamenon pri kompetenteco antaŭ la dekkvara jaro. Je la fino de la dua jaro, ili devas plenumi pli malfacilan ekzamenon, se ili volas daŭrigi la duagradan kurson. La lernantoj studas kvin horojn ĉiutage kaj kvin

tagojn ĉiusemajne. Ili ne kunvenas sabaton. Estas dekdu semajnoj da libertempo.

3<sup>o</sup> La Universitato de N. Z. konsistas el kvar kolegioj, po unu en ĉiu el la kvar ĉefurboj. Por eniri senpage la Universitaton, la studento devas plenumi honorinde kaj sukcese ekzamenon multe pli malfacilan ol la ordinaran matrikulan ekzamenon. Tio okazas ĉiujare ĉe la ĉefurboj. La tridek konkurantoj, kiuj gajnas la plej multe da poentoj ricevas jaran salajron de 1250 ĝis 1500 frankoj dum ili studas ĉe unu el la kolegioj. La ceteraj konkurantoj, kiuj gajnas du trionojn el la tuto de la poentoj ricevas universitatan edukadon senpage. La lernantoj kaj studentoj de la publikaj edukejoj loĝas hejme aŭ en loĝejoj luitaj. Novzelandaj lernantoj kaj studentoj estas fervoraj ludantoj de ĉiuj atletaj ludoj kaj sportoj.

En la dek ĉefurboj estas tekniklernejoj.

### MILITA EKZERCO.


Ĉe la unuagradaj lernejoj, la knaboj dekdu-<sup>2</sup> dekkvinjaraj lernas militan ekzercon, kaj en ĉiuj lernejoj havantaj pli multe ol du cent lernantojn, estas roto de militaj kadetoj uniformvestitaj. La registaro donas kartoĉojn kaj kuragiĝas la praktikon de pafado per premioj, Estas 12,000 unuagradaj kadetoj. Batalionaj paradoj okazas ĉiujare en ĉiu regiono edukada.

Ĉe la duagradaj lernejoj por knaboj, ĉiuj lernantoj praktikas militan ekzercon kaj pafadon. La duagradajn kadetojn regule inspektas milita oficiro kaj ili paradas kelkfoje kun la memvolaj soldatoj.

\*\*\*

Krom tiuj ĉi lernejoj unuagradaj estas 95 por la infanoj de la aboriginalaj enlanduloj (Maoris). Estas 3863 lernantoj aboriginalaj, kiuj estas instruataj de 196 instruistoj anglaj.

E. WEBBER,  
Lernejestro en Invercargill (Nova Zelando).



LA VOJO LAŬIRITA DE AMUNDSEN DUM SIA 3-JARA VOJAĜO.

## En la polusaj regionoj.

### Amundsen.

La polusaj regionoj ĉiam altiris la atenton de la scienculoj, esploristoj, maristoj k. t. p. Tial glorinda estas la nomaro de la pioniroj, kiuj senĉese kontraŭbatalis la ventegon kaj la malvarmegon, por alproksimiĝi al la norda poluso. Iom post iom homoj tiaj, kiaj *Franklin*, *Mac-Clure*, *Nordenskiöld*, *Nansen*, *Cagni*, *Peary*, *Amundsen*, malkovris la sekretojn de l' glaciaj maroj kaj malpligrandigis la interspacon, kiu apartigas la teranojn de la teoria punkto, kie matematika akso nian sferon traboras.

En 1896, *Nansen*, Svedo, trafas,  $86^{\circ} 12'$ .

En 1900, *Cagni*, Italo trafas,  $86^{\circ} 33'$ .

En 1906, *Peary*, Usonano, trafas,  $87^{\circ} 6'$ .

Nur 325 kilometrojn, kaj, por la unua fojo, homo metos la piedojn sur la nordan Poluson.


Atendante tian mirindan sukceson, du mondfamaj marveturistoj trapasis la Nord-orientan kaj la Nord-okcidentan marvojn: *Nordenskiöld*, Svedo, en 1879; *Amundsen*, Norvego, en 1903-06.

Ŝajnas ke la libera Norvegujovolis egaligi la kuraĝon, la maran sciencan, la grandan famon de sia najbarino kaj

fratino. Svedujo havis Nordenskiöld, Norvegujo havas Amundsen.

De pluraj centjaroj vanaj estis la penoj de multnombraj ekspedicioj por trapasi la marvojn, kiu laŭkuŝas la nordan randon de l' Amerika kontinento. En 1845-47, *Franklin* teruran marvojaĝon kondukis, trafis preskaŭ la celon, kaj fine trovis la morton, li kun 78 kunuloj. En 1853, *Mac-Clure* sukcesis iri de la maro Behring ĝis Oceano. Sed li estis devigata forlasi sian ŝipon en la glaciaj kaj fini la vojaĝon per glitveturiloj.

Plene venkis Amundsen! Sur malgranda speciala ŝipo « *Gjoa* », la heroo Norvego iris de l' atlantika ĝis la pacifika Oceano, sekvante la multnombrajn markolojn de l' glacia Oceano. La 23<sup>an</sup> de julio 1903, li forlasis Kristiania kun ses kuraĝuloj, kaj rapide alvenis al *Godhavn* en Groenlando. El tie, li eniris la ofte neprofundajn markolojn, kaj, en septembro, komencis unuan vintran haltadon. Dum dudek tri monatoj, niaj sep ŝipanoj kuraĝe vivadis en la glaciaj, suferante ofte temperaturon apenaŭ



LE GJOA.



kredeblan de 60°, observante la eksterordinarajn fenomenojn de la magneta poluso. En Aŭgusto 1905, « Gjoa » longa nur je dudek du metroj, sian kuron rekomencis meze de cent kaj cent insuloj kaj insuletoj ĝis la enfluejo de rivero Mackensie. Tie, dua vintra haltado estis necesa. Sed en printempo 1906, la loĝantoj de urbeto *Nome*, akceptis kun ĝojegaj aplaŭdoj, kapitanon Amundsen kaj la aliajn Gjoa'anojn.

Triumfe revenis Amundsen en Eŭropon. En Paris', la norvega maristofaris belegan rakonton

antaŭ ĉiuj eminentuloj de la ĉefurbo. La geografia



AMUNDEN AKLAMATA EN PARIS'.

societo donacis al li sian oran medalon kaj enskribis lian nomon en la libron de mondfamaj esploristoj. Hodiaŭ la gazetar sonigis tiun ĉi nomon per siaj mil trumpetoj kaj « *Tra la Mondo* » plezurege prezentas la heroon al sia legantaro.

Modesta, grava, kvieta, Amundsen, sur la marbordo de Norvegujo, rigardas la ondojn de la senfina maro, rigardadas la misteran vojon al la norda poluso, kiu senĉese altiras la fortulojn kaj la multimulojn.

Profesoro BORD.



## NOVA KROZADO DE PRINCO DE MONAKO.

Meze de Junio, princo de Monako forlasis Le Havre, sur sia jakto *Princesse-Alice*. Lia scienca stabo konsistis el S<sup>roj</sup> D<sup>ro</sup> Richard (fervora esperantisto), P<sup>ro</sup> Hergesell, K<sup>no</sup> Isachsen, pri kiu iam parolis nia distinginda kunlaboranto, P<sup>ro</sup> Bord (1<sup>a</sup> J. 5<sup>a</sup> n<sup>o</sup>), kaj Ŝipleŭt<sup>o</sup> Bourée, lia adjunkta oficiro.

La princo intencis daŭrigi la kartografiajn kaj hidrografiajn laborojn, kiujn li entreprenis la pasintan jaron en la glaciaj Spitzberg'aj regionoj. Li daŭrigis ankaŭ siajn meteorologiajn serĉadojn pri

la supra atmosfero. Franca ŝipleŭtenanto akompanis la princon la komencajn tagojn de la krozado, por lertiĝi pri la procedoj uzataj por la lanĉo de l' sondbalonoj utiligataj por la studado de la supra atmosfero.

Franca krozŝipo, ja, faris poste tiajn eksperimentojn, dum aliaj diversnaciaj ŝipoj plenumis samtempe similajn lanĉojn ĉe diversaj globaj lokoj. La jakto *Princesse-Alice*, ĵus reveninta, agis same en la nordaj regionoj.



## PRI EDMONDO HALLEY' KAJ LIA KOMETO.

La famega kometo de Halley' reaperos dum la jaro 1910a, laŭ la antaŭdiro de la estimata mortinto, Grafo de Pontecoulant, kies atentindaj eldonaĵoj pri tiu kometo troviĝas en la « *Mémoires* » de la Akademio de la Sciencoj (Parizo, 1864). Kia propagandilo Esperanta por scienculoj estus pli bona ol rakonteto pri tiu mirinda ĉiela objekto revenonta, aŭ ol biografieto pri Halley mem? La belega laŭdego pri li, verkita de Mairan, (teksto franca) estas publikigita en la « *Mémoires* » suprediritaj, por la jaro 1742. La esperantistoj anglaj trovos tradukon en sian naturan lingvon, en « *The Gentlemen's Magazine* », Londono, 1747.

Mitreege ŝatus libreton pri Halley, aŭ pri lia kometo, presitan en du lingvoj, kiel « *Tra Mez-Afriko* », tio estas en franca (aŭ angla) kaj Esperanta. Ĉu iu el la legantoj de « *Tra la Mondo* » volos entrepreni tiun gravan verkon?


Ĉiu ajn leganto, kiel la scienculo, akceptus plezure la libreton proponatan, ĉar la vivado de Halley enhavis multajn mirindajn kaj tre interesajn okazojn. Oni diras ke angla astronomiisto entreprenos la taskon redakti biografion de Halley; tio ĉi estas dezirinda, sed al la esperantistaro mankas aparta eldono, internacie komprenata de ĉiuj. Nedubeble, ĉiu ajn distinginda scienculo, ĉu angla, franca, germana aŭ alia, apartenas al la tutmondo; tial lia vivado devas esti konata tutmonde. Kompreneble, biografio skribota en la lingvo de liaj samlandanoj estas nun la plej grava kaj, sendube, tre dezirinda; sed la aliaj popoloj ankaŭ posedas la rajton peti tian verkon facile legeblan de ili. Ĉi tion Esperanto povas fari!

EUG. F. Mc PIKE.



Fot. A. Ploussu

ATENDANTE LA ALVENON DE ZAMENHOF.  
Antaŭ la stacidomo — 12-8-1907.



Fot. A. Ploussu.

FORIRO DE LA STACIDOMO.



Fot. Leroy.

LA NUN HISTORIA MARKET-PLACO,  
La centro de la Kongreso.

## La « Tria »

Kemбриго, 12-17 Aŭgusto 1907.

La trian fojon ni havas la plezuron raporti pri esperantista kongreso internacia; aŭ, pli ĝuste, universala, pro la multnombreco kaj diverseco de la landoj kaj lingvoj reprezentitaj. Ni neniel intencas verki por vi, legantoj-amikoj, plenan kaj metode ellaboritan rakonton. Tiun zorgon ni lasas al la propagandaj gazetoj, el kiuj almenaŭ unu ĉiu el vi legas. Precipe impresojn, personajn aŭ ricevitaĵajn per orelo sciema, eĉ maldiskreta — ĉu raportisto ne devas ĉion scii? — ni donos al vi. Kaj, se en nia rakonto vi trovos, meze de varmaj laŭdoj, ian kritiketon, ĝi nur privalorigos la *altajn farojn* de la « Tria ». Vere, ĝi meritas la plej korajn kaj fierigajn dankojn: de la kongresanoj, pro la rimarkinda preparo de la kongreso ĝis la disdono de la dokumentujoj en la akcepteno; de Kemбриго, pro la enspezigo de valoraj sumoj, en la urbo lasitaj ĉiutage de 1500 personoj proksimume; de la tuta esperantistaro, pro la antaŭenpuŝo donota al nia kara afero de la neforgesebla « Tria ».

« TRA LA MONDO ».

### Tra Kemбриго. — La fizionomio de la popolamaso.

Tuj post la elvagoniĝo, kaj jam kelkajn tagojn antaŭ la komenco de la kongreso, la samideano alvenanta en Kemбриго sentas sin en festa atmosfero. Gaje flirtadas je la fervoja halo kaj ekster la stacidomo standardoj kaj blazonflagoj, inter kiuj gaje impresas la okulon la verda koloro.

Esperantaj afiŝoj sciigas lin ke liaj pakaĵoj, se ili estas provizitaj per la specialaj etiketoj senditaj de la Trio, estos transportataj en lian loĝejon sen klopodoj por li; kaj afabla delegito certigas al li la aferon, donacante — sebezone — etiketojn.

Tra placo tute ornamita li aliras al la tramo, kiu tuj kondukos lin ĝis la centro de la urbo. La ĉarmo alloga kaj altira de tiu ĉi, kun ĝiaj domoj vestitaj de hedero kaj ĉirkaŭitaj de ravaj ĝardenoj, kun ĝiaj monumentoj je la mezepoka arĥitekturo, kun ĝiaj vastaj « verdaĵoj » (herbejoj), ne malhelpas, ke li rimarkas multenombrajn kaj grandegajn standardojn karajn por sia esperantista koro. Eĉ sur la tegmento de la oficialaj

monumentoj, kiel la pompista domo, kiel la Urbodomo, ĝi staras venke, kvazaŭ por montri, ke, dum la historia semajno, Esperanto regos en Cambridge.

Fakte, Esperantepresitaj elpendaĵoj, afiŝetoj en la butikoj, penadas altiri la novspecan klientaron sciigante ĝin ke « Tie ĉi estas vendataj la plej bonaj fruktoj » aŭ ke « La kuriozaĵoj, poŝtkartoj, k. t. p. tie ĉi aĉeteblaj estas la plej belaj, kiujn oni povas trovi en la urbo ». Iam hotelo sciigas, ke « oni trovos tie ĉi komfortajn manĝojn eĉ por personoj ne loĝantaj en la hotelo », k. a. Multe rimarkataj, ankaŭ, la boteloj de Viskio, de nia bonega amiko Buchanan, kaj la cigaredoj Esperanto de la Tobacco Syndicate en Glasgow, aprobitaj de Dro Zamenhof, kaj videblaj en multaj butikoj. Gojante pro tiu agrabla vidaĵo, la kongresano alvenas sur la nun historian Market-Placon, kie la Urbodomo (Guildhall) montras iom malbelan fasadon; sed kiom komfortaj, puraj, estas la internaj ĉambroj, ĉambregoj, salonoj, kaj la teatro! Kontraŭe, sur alia flanko de la placo



Fot. Geo C. Law.

LA KEMBRIGĜA URBODOMO KUN KELKAJ SAMIDEANOJ.

vidiĝas grandaj anoncoj por nia bonega kunfrato « La Revuo ». Dum tuta semajno tiu placo kaj la Urbodomo estis la rendevuejo, la elekta loko de centoj kaj de centoj da samideanoj, la teatro konstante alloga de koraj renkontoj, de amikaj kunvenoj.

Jen veturiloj, transportantaj malfruevenintojn, haltas ĉe la sojlo de l' municipala palaco; jen la aŭtomobilo de D<sup>o</sup> Cunningham, kiu trairas la urbon, — lian urbon — alkondukas aŭ dekondukas lin aŭ iajn eminentulojn.

Amaso komence kurioza kaj skeptika ĉirkaŭas la kongresanojn, iaforte repuŝata de policano, kiu serioze elmontras sian esperantistan scion: « Ne haltu... atentu la trotuaron... tie la akceptejoj... »; sed baldaŭ, rimarkinte ke, kontraŭe je la mokaj certigoj de malamikoj, la esperantistoj parolas ja Esperanton, ĝi iĝas simpatia, avida aŭskulti; kaj ofte ni devis trairi densan homfluan por eniri aŭ eliri la Urbodomon, la Grenvendejon, aŭ aliajn kunvenejoj de la Kongreso.

Ĉiuj Kembriganoj ne estis skeptikaj, tamen, kaj, persone, mi havis la bonŝancon loĝi en domo, kie 3 fratinoj parolas Esperanton. Mi devas diri, ke ne estis multo da tiaj progresemulinoj en la urbo, komence, kaj multaj el ni estis tute embarasataj aŭ por peti pri iom da varma akvo, aŭ alumedo, k. t. p... aŭ pri ia ajn manĝaĵo, se la alportita komforta manĝaĵo ne plaĉis al ili.

Sed estis videble, ke, samtempe kiam la tagoj pasis, la intereso en la urbo pligrandiĝis, kaj certe nia restado en Kembrig'o esperantistigis grandan parton de la loĝantaro.

Mi devas aldoni, por esti justa ke al tiu celo laboradis efike la bonhumora Kolonelo Pollen, Prezidanto de la Trio kaj de la Kongreso, per siaj gajaj paroladoj, kaj nia fervora amiko Christen, kiu sukcese faras tra Britujo kvarlecionajn kursojn.

### La kunvenejoj.

Tuj alveninte, la kongresano rapidis al la akceptejoj, kie, montrante sian provizoran karton, li ricevis koverton kun ĉiuj utilaj dokumentoj. La rapideco, laŭ kiu tio fariĝis estas vere admirinda kaj montras kia rimarkinda organizanto estas la sindona sekretario de la Trio, nia amiko Bolingbroke Mudie. Al liaj kunlaborantoj Mann Blaise, k. a., al Kühnl, kiu afable proponis helpon, iras la gratuloj de ĉiuj gekongresanoj.

La akceptejoj estis la preferata kunvenejoj de tiuj ĉi. Estis ja interesa, pitoreska, ĝojiga la senĉesa



Fot. Geo C. Law.

LONDON. LA ALVENO DE LA MAJSTRO.



Fot. A. Ploussu.

ELIRO DE AGADA KUNSIDO.

Gesinjoroj Mybs-Kühnl

alveno, dum tri tagoj, de ĉirkaŭe 1500 amikoj alvenantaj de tiom da diversaj terregionoj, de tiom da malproksimaj landoj: kiaj ĝojaj « bonan tagon » kaj koraj manpremoj. Bonege aranĝita la skriboĉambro, kun multaj tabloj provizitaj je ĉio necesa por skribi, de la « Trio » kaj ankaŭ de samideanoj. La propagandaj poŝtkartoj eldonitaj de S<sup>o</sup> Buchanan por la Viskio esperantista estis speciale ŝatataj kiel bonega propagandilo por Esperanto, kaj ankaŭ por la nacia trinkaĵo de niaj britaj amikoj.

Laŭdan citon meritas ankaŭ la ĉambro por la ĵurnalistoj kun multaj skribmaŝinoj kaj multigilo.

Tre rimarkinda ankaŭ la aranĝo de speciala, tre oportuna poŝtoŝeĉejo en la akceptejoj. Ĉiuj organizaĵoj de tiu kongreso meritas esti alprenitaj kiel modelo. Ekz. estis tre agrable scii, antaŭe, la nomojn de multaj kongresanoj; la « kongresa gvidlibro » enhavis ĉirkaŭe 8 centojn da ili. Estus dezirinde ke, estontece, oni konigu ĉiutage la nomojn de la nove alvenintoj por faciligi la renkontigojn.

Tiu kongresa gvidlibro estis tre pratike elpensita, same kiel la « Londonaj kuriozaĵoj » verkita, por la vizitantoj de Londono de la tiea grupo. La aŭtoroj de ambaŭ meritas ĉiujn gratulojn

### La akcepto al la majstro.

Vere belega, admirinda, entuziasmema kaj entuziasmiga ĝi estis.

Londono matene, Kembrig'o vekigis sub belega festa ornamo: Market Placo estas kovrita per multaj standardoj, kaj la fasado de la Urbodomo vestita per grandaj festonoj el blankaj kaj verdaj ŝtofoj. Vere, niaj anglaj amikoj estas lertaj magistroj. Ĉirkaŭ la unua horo, post la eliro el la Grenvendejo, ĝoja amaso komencas ekmoviĝi al la stacidomo. Per granda aŭdigilo, l' amiko Hobomo petis la samideanojn,

ke ili ordigu sur la trotuaroj laŭ du grandaj vicoj inter la stacidomo kaj Fitzwilliam Muzeo, tiamaniere ke la kara majstro suriru la vojon inter du muroj el amikaj vizaĝoj, kaj jam oni pretiĝas. Tie ĉi kaj tie vidiĝas uniformoj, aŭ akademaj roboj surmetitaj laŭ la peto de la organizantoj. Bedaŭrinde oni ne donis al ili specialan lokon kaj, anstataŭ formi imponantan kaj honoran akceptantaron, ili estas kvazaŭ perditaj en la amaso; la Kembriganoj rigardas ilin kiel strangulojn, kaj multaj el ili ne povas eĉ ĉeesti la

6.  
11  
6  
65  
77.  
572  
76



Fot. Theis.

LONDON. ELIRO DE FITZWILLIAM-MUZEUUM.

La aŭtomobilo de S<sup>ino</sup> Zamenhof akompanita de D<sup>ro</sup> Cunningham kaj Kolonelo Pollen.

alvenon de l' majstro.

Sed ni daŭrigu ĝis la stacidomo: la granda apuda placo estas tute plenigita de popolo, veturiloj portantaj videmulojn. Oni salutas la kelkajn privilegiulojn, kiuj penetras sur la kajon; oni montras al si la taĉmenton de *Frontiersmen* rajdantaj, kiuj formas honoran akompanantaron por la kaleŝo de D<sup>ro</sup> Zamenhof.

Kiam mi alvenas sur la estradon de la Granda Norda Fervojo, estas jam pentrinda grupo de eminentuloj, inter kiuj la urbestro, S<sup>ro</sup> G. Stace, kun multenombra sekvantaro en kuriozaj skarlatataj vestoj. Multaj ornamaĵoj, flagoj, ŝtofoj gajigas la murojn; tapiŝoj kuŝas sur la kajo parte okupita de la muzikistaro de la Urba Policanaro, kiu ludas kelkajn ariojn atendante D<sup>on</sup> Zamenhof.

La vagonaro alvenas ĵus kiam oni aŭdas la kanton « Rigardu! La heroo alvenas! » Centoj kaj centoj da krioj « Vivu Zamenhof! » akceptas la majstron, kiu, post nedaŭraj salutoj estas rapide veturigata ĝis Fitzwilliam-Muzeum, meze de movado, de krioj entuziasmaj elĝetitaj de amaso, kies ideon niaj bildoj donas pli bone ol longa priskribo.

Je la supro de la honora ŝtuparo de la bela antikvastila konstruaĵo staras Rev. E. S. Robert, la eminenta vickanceliero de la universitato. Dum la prezentado, la paroladoj, densiĝas la amaso de la samideanoj kaj de videmuloj, kiuj okupas, premegataj, la internan ŝtuparon, la vestiblon, kaj la ĉirkaŭaĵojn de la monumento. Ĝi estas vere impresa vidaĵo, imponanta spektaklo. Iom post iom la popolo enfluas la muzeon, antaŭpasante la karan Doktoron, kiu premas kore manojn emocije alirigitaj al li. Tiu grandioza festo finiĝas per unuanima kanto de la himno « En la mondon venis nova sento ».

Poste ĉiuj rapidas al Trinity College por fotografiĝi. Tiel multaj ni estas, ke oni devas fari du grupojn. Ne sen malfacileco oni sukcesas apartigi kaj ordigi la samideanojn, kaj amuza estas la preparado de la operacio. Fine, lastaj rekomendoj per aŭdigiĝilo..., kaj « klik »: ĝi estas farita.

## La solena malfermo de la Kongreso.

Vespermanĝinte rapide, la kongresanoj rapidas al la Nova Teatro baldaŭ plenigita de preskaŭ mil kvin cent homoj avidaj vidi kaj aŭdi.

Sed ne la « Majstro » vidigas, kiam la kurteno malfalas, sed ĥoristaro organizita de S<sup>ro</sup> Arthur Tuffield kiu, admirende kondukata de S<sup>ro</sup> C. B. Rootham, kantas « La Espero » kies lasta strofo estas entuziasme rekantata de la ĉeestantaro.

La kurteno falas, kaj resuprenirinte baldaŭ, oni ekvidas nun nian modestan, simplan, karegan Doktoron, al kiu iras, dum kelkaj minutoj la « Vivu » oj, la aplaŭdoj, la « hurrah! » pleje brujaj kaj varmaj.

Kia triumfo por tiu homo bonema, dudek jarojn apenaŭ post la publikigo de lia elpensitaĵo!

Apud li estas: dekstre la Urbestro (Alderman Stace), la gracia Urbestro, S<sup>ro</sup> H. Bolingbroke Mudie; maldestre,

kolonelo Pollen, D<sup>ro</sup> Cunningham, Pastro Schneeberger, Prez. de la Geneva Kongreso.

Kiel kutime, tiu ĉi transdonas la prezidantecon al Kolonelo Pollen, meze de l' aplaŭdoj de la kongresanoj, kiuj aklande elektas kiel vicprezidantojn D<sup>on</sup> Cunningham kaj S<sup>ron</sup> Bolingbroke Mudie.

Tre rimarkinde estas ke, poste, la Urbestro kaj la Urbestro parolas en Esperanto, salutante D<sup>on</sup> Zamenhof kaj la kongresanojn. Jen estas vere ĉarma maniero montri, ke nia ĉeestado ne estas nur plenumo de devo, sed ankaŭ efektiva partopreno en la soleno.

Kolonelo Pollen prezentas tiam belegan blazonflagon broditan per oro kaj arĝento, kiel oficialan flagon de la Esperantistaro. Oni ĝin admiras sed rimarkas malice, ke la... verda stelo estas arĝenta.

Sed venis por D<sup>ro</sup> Zamenhof la momento fari sian jaran paroladon, la ĉefan allogaĵon de la kunveno.

Salutante la grandan landon, kiu akceptas la kongreson, li, tute prave, rimarkigas la gravan signifon de tia kongreso, okazanta en glora universitata urbo de Granda Britujo, t. e. en lando, kies lingvo povus pretendi iĝi internacia, se lingvo nacia estus kapabla ludi tian rolon, kaj li aldonas:

« Tio ĉi montras antaŭ ĉio, ke la homoj komencis jam kompreni, ke lingvo internacia estas utila ne sole por popoloj malfortaj, sed ankaŭ por popoloj fortaj; sed tio ĉi montras ankoraŭ alian aferon, multe pli gravan: ke la homoj vidas en la esperantismo ne sole aferon de egoisma oportuneco, sed gravan ideon de intergenta justeco kaj frateco, kaj al tiu ĉi ideo volas servi la noblaj homoj de ĉiuj popoloj, tute egale, ĉu iliaj popoloj estas fortaj aŭ malfortaj, kaj ĉu la intergenta justeco estas por ili profita aŭ malprofita. »

Kaj nia kara majstro, meze de konsentaj aplaŭdoj, malvolvas tiun ideon, kiu estis la instiganto de liaj infanaj pensoj, de liaj junulaj laboroj, kaj kiu plenis lian koron de matura homo, ema al la idealo kaj al la bono.

D<sup>ro</sup> Zamenhof salutas nun « la tro multajn amikojn, kiujn la Morto kaptis dum la pasinta jaro », speciale D<sup>on</sup> Lloyd, prezidanton de la Liverpula Grupo, la gloran scienculon Berthelot, la profesoron Michael Foster, kiu esperis nin akcepti en Kembriĝo, fine D<sup>on</sup> Javal, eminentan amikon de Esperanto. Respekte la aŭdantaro levigas laŭ la propono de la majstro, por honori la memoron de ili kaj de ĉiuj mortintaj esperantistoj.

La dudekjara Jubileo de Esperanto havas poste la honoron de longa aludo, kiu certe estos agrabla al ĉiuj el niaj legantoj, kiuj respondis al nia alvoko. Ĝi montras, kiom ni estis pravaj penadante savi la ideon de S<sup>ro</sup> Otto Simon, kiun oni volis ankoraŭ entombigi, kiel oni vidos pli poste.

« Samideanoj! Antaŭ tri semajnoj finiĝis ĝuste dudek jaroj de la tago, kiam aperis publike la unua libro pri la lingvo Esperanto. En ĉiuj partoj de la mondo la esperantistoj festis tiun tagon. Kiel fondinto de Esperanto, mi ricevis en tiu tago multajn gratulajn telegramojn kaj leterojn.

Ĉar mi ne havas kancelarijon, sed mi devas mem ĉion plenumi en miaj liberaj horoj, tiel oni facile komprenos, ke respondi ĉiujn ricevitaĵajn esprimojn de amik-eco estis por mi afero absolute ne ebla, kaj oni min facile pardonos. Mi uzas nun la bonan okazon, por esprimi mian plej sinceran dankon al ĉiuj, kiuj sendis al mi amikajn bondezirojn.



Fot. Derveaux.

LA KAVALERIA ESKORTO.

Antaŭ Fitzwilliam-Muzeum.

Modeste, la Doktoro aldonas:

« La gratuloj apartenas kompreneble ne al mi persone, sed al la tuta batalantaro esperantista, kaj mi estas nur la centra punkto, en kiu kolektiĝis ĉiuj gratuloj, por resalti de tie al ĉiuj flankoj de la mondo, al ĉiuj lokoj, kie loĝas kaj laboras niaj senlacaĵ samideanoj. Kvazaŭ silente komisiita de la tuta esperantistaro, mi vokas al ĉiuj esperantistoj-batalantoj: mi vin gratulas! Mi kore vin gratulas, ke vi pacience eltenis en la daŭro de dudek jaroj, malgraŭ la multaj atakoj kaj malagrablaĵoj kiuj al neniuj el vi mankis. Mi kore vin gratulas pro tiuj rezultatoj kiujn donis via energia kaj sindona dudek jara laborado. Dudek jaroj de laborado por la esperantismo! Kion tio signifas, oni komprenos nur iam poste, kiam oni legos la detalan historion de la esperantismo. Kian grandegan gravecon havas niaj ĝisnunaj akiroj, tion oni ankaŭ ĝuste komprenos iam poste, kiam oni ekscios detale la historion de niaj unuaj jaroj, kiam la akiro de ĉiu nova esperantisto estis ligita kun senfina laborado kaj oferado. »

Li aludas la malfacilajn komencojn de nia afero kaj elokvente esprimas sian konfidon al la estonteco:


« Nun nia afero forte staras. La glacia tavolo de antaŭjuĝoj de la mondo estas rompita, kaj nia afero kreskas regule kaj senhalte. Ĉiu jaro potence pligrandigas niajn fortojn, kaj ni iras al nia celo jam kun plena trankvileco. Centoj da miloj da radikoj kaj radiketoj subtenas nian arbon, kiu jam ne timas la venton. La naturo, kiu longan tempon batalis kontraŭ ni, batalas nun por ni, ĉar tiu sama forto de inercio, kiu longan tempon terure malhelpis ĉiun nian paŝon, ĝi mem nun ŝovas nin antaŭen. Eĉ se ni volus nun halti, ni jam ne povus. »

Nun li transiras al tio, kio estas la vera temo de lia parolado: la esenco kaj celo de niaj kongresoj. Li klarigas, ke oni ne venas por paroli pri lingvaj demandoj, « kiuj apartenas ekskluzive al la Lingva Komitato », ke la deziro ekzerciĝi en Esperanta parolado, nek tiu fari propagadon, ne sufiĉus pravigi grandajn vojaĝojn kaj elspezojn necesajn por veturi al niaj kongresoj.

« ... Ni faras manifestacion kaj propagadon por la esperantismo ne pro ia utilo, kiun ĉiu el ni persone povas havi de ĝi, sed pro tiu grava signifo, kiun la esperantismo havas, por la tuta homaro, pro tiu komune homa celo, kiu nin, aktivajn esperantistojn, altiris al Esperanto; ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo, por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontiĝo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la esperantismo en si enhavas.

Kiel la antikvaj hebreoj tri fojojn ĉiujare kunvenadis en Jerusalemo, por vigligadi en si la amon al la ideo monoteisma, tiel ni ĉiujare kunvenas en la ĉefurbo de Esperantujo por vigligi en ni la amon al la ideo esperantisma, kaj tio ĉi estas la ĉefa esenco kaj la ĉefa celo de niaj kongresoj. »

La oratoro aludas nun la neŭtralecon de Esperanto, kaj la sendependecon de ĉiu persono izolata utiliganta la lingvon, kiu havas la rajton nomi sin esperantisto. Sed, kiu venas al niaj kongresoj, tiu enpenetras en Esperantujojn, t.e. en landon, kiu havas « si-



Fot. Theis.

ĈE TRINITY KOLEGIO.

Malgranda parto de unu el la du grandegaj samideanaroj.

ajn apartajn leĝojn, siajn apartajn morojn kaj principojn... en kiu regas la verda standardo! »

Li klarigas la internan ideon de Esperanto:

« Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povos pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn... Ĉio, kio kondukas al rompado de la muroj inter la gentoj apartenas al nia kongreso. »

La oratoro malvolvas longe kaj grandanime tiun penson kaj finas, meze de la plej varma entuziasmo sian belan paroladon, per la jenaj vibrantaj paroloj:

« Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio vivu la celo kaj la interna ideo de la esperantismo, vivu la frateco de la popoloj, vivu ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj, vivu, kresku kaj floru la verda standardo! »

Kiam la aklamado ĉesis, S<sup>ro</sup> Gaston Moch, ĝenerala sekretario de la organiza komitato levigis. Li anoncas, ke li havas la tedan devon legi la multajn telegramojn kaj leterojn ricevitajn; kaj pro la granda nombro da ili, li legos nur la plej interesajn pro la malproksimeco de la senditoj. Oni rimarkis, ke tiu komenco ne estas tre deca, ke tiuj, kiuj kore antaŭkomuniis kun ni, sendante salutojn al nia majstro — samtempe kiam aliaj, pli feliĉaj, ekveturis, por ke tiuj salutoj alvenu ĝustatempe — eble ne estos tre flatigaj eksciinte ke ilia fervoro kaŭzis tedon al tiu, kiu havis la honoran devon raporti pri ili.


La ironiemo de nia distinga samideano montriĝos ankaŭ kiam, dum la alparoloj de la delegitoj, li penados komprenigi al ili, ke estus bone ke ili ne plu parolu, imitante lin, kiu ne profitas sian rajton paroli kiel delegito de Monaco.

Oni konstatis cetere, ke neniuj delegitoj volis kompreni la inviton, kaj ĉiuj, venintaj de proksimaj aŭ malproksimaj landoj, de regionoj « kie la malvarmecon de l' klimato ne malhelpas la varmecon de l' sentoj » k. a. ne juĝis la ekzemplon de S<sup>ro</sup> Moch sekvida.

Nur S<sup>ro</sup> Blanjean, belga delegito por la franca lingvo, preterpasas sian parolvicon, sed pro alia motivo: ĉar jam parolis franclingva belga delegito, leŭtenanto Cardinal, oficiala delegito de l' Belga Kegnestraro.


La saluto de tiu ĉi estas varmege aplaŭdata de la kongresanoj, kiuj komprenas la altan signifon de tiu komenco. Oni ne forgesu, kaj utiligu laŭ la cirkonstancoj, la iniciativon de la belga registaro.

Post leŭtenanto Cardinal parolis S<sup>roj</sup> Schröder, Otto Simon, Ĉeĵka (Bohemujo) por Aŭstrujo, de Beaufront (Francujo), Schmidt, D<sup>ro</sup> de la Observatorio de Postdam, kaj D<sup>ro</sup> Mybs (Germanujo), Esvtifeieff kaj Lojko (Rusujo), R. de Saussure (Svisujo), Volcan, juna kaj lerta esperantisto (Venezuelo), Gelula (Tunisujo), Ahlberg (Svedujo), R. Frenkel (Siberujo), D<sup>ro</sup> Bein (Polujo), Muinos (Urugvajo), Boebel (Danujo), D<sup>ro</sup> H. Lambert (Malta), Edwards (Gibraltaro), J. Rhodes, Warden (Skotlando), Fournier d'Albe (Irlando), por la Granda



Fot. Harry Hall.

LA INTERNA IDEO DE ESPERANTO.



Fot. Germaine.

ĈE KINGS COLLEGE.  
La orkestro de la skota gvardio.



Fot. A. Ploussu.

ĈE KINGS COLLEGE.  
La skotaj sakfajlistoj.

Britujo, F. B. Viles (Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko), Thorsteinson (Islando), Bicknell kaj S<sup>ino</sup> R. Junck (Italujo), Uitterdyck (Holandujo), Pastro Guinart (Hispanujo), S<sup>ro</sup> Pujula (Katalano), Van der Biest (Belgujo, flandra lingvo), Beauchemin (Kanado).

Estas ĉiam granda plezuro aŭdi, ĉiujare, tiujn delegitojn, kiuj venas por igi la kongreson — tuŝeblan manifestacion de la esperantismo — aŭdanton kaj certiganton pri la progresoj de Esperanto en sia lando, pri la fervoro, la amo al la lingvo kaj al ĝia elpensinto, la emo al ĝia interna ideo de ĉiuj, kiuj ne povas ĉeesti, kaj kiuj komunias per la penso en nia ama kaj spera festo.

Laŭ mi, kaj pro tio, la malferma kunsido de niaj kongresoj estas speciale rimarkinda; kaj ĝi iĝos ĉiujare tiom pli interesa ke, ŝajnas, la aliaj ĝeneralaj kunsidoj iĝos malpli interesaj.

Plue, la nombro de la parolantoj iĝos pli granda, ĉar la nombro de la landoj kaj de la lingvoj gajnitaj por nia afero konstante kreskas. La aŭdado de ili estas impresa elmonstro de la nuna situacio de Esperanto.

Eble por kelkaj personoj, tio ŝajnos teda, sed, feliĉe, ili estas ankoraŭ tre malmultaj; kaj estis vere rimarkinda la atento, kun kiu oni aŭskultis ĉiujn delegitojn; kelkaj, tute izolitaj personoj, ŝajnis trovi iujn delegitojn tro parolemaj, sed oni konsideru, ke iuj el ili faris milojn da kilometroj por veni kaj ĝui la kongreson; ke, de jaroj, iuj el ili vivis kun la espero, ke ian tagon ili povos siavice ĉeesti kongreson, vidi, aŭdi la karan majstron, iom lin alparoli, kaj ke tiu tiel dezirita tago venis!

Ĉu, pensante al ilia ĝojo, simila al tiu, kiun ni havis en Boulogne, ni ne povas esti iom indulgemaj se iu delegito, pro sia granda emocio, ne esprimis ĉiam flue aŭ tiel agrable kiel aliaj, la sentojn, kiuj plenigas lian koron.

La sintenado de la 1500 aŭdantoj estis, cetere, tute rimarkinda, kaj montris ke la ĉeestantaro tute partoprenis en mia opinio. Nur kelkaj tute esceptaj signoj de laceco montriĝis, kaj al iliaj aŭtoroj sin turnis nia juna kaj vigla samideano Edmond Privat, kiu finigis la serion de la alparoloj dirante per vibra voĉo: «Kelkaj el vi ŝajnas lacaj. Ili devus pensi al sia feliĉo, al la bedaŭroj de tiuj, kiuj ne povas partopreni en nia ĝojo, tial ke ili ne havis la necesan monon por fari la vojaĝon al la kongreso.» La aplaŭdoj ricevitaj montris, ke li tradukis la komunan senton.

La kunsido finiĝis per la brita kanto «Savu la reĝon, Di!» laŭ la belaj paroloj de D<sup>ro</sup> Zamenhof.

A. MONTROSIER.

## Teatraj prezentadoj.

La serio komenciĝis, sabate, de tre interesa koncerto organizita de nia «Vagabondaj» amikoj, kiuj verkis preskaŭ ĉiujn erojn de l' programo, kaj bonege kantis, deklamis, eĉ dancis ilin. Tre koran dankon pro la plezuro havigita meritas la modesta prezidantino, F<sup>ino</sup> C. W. Oxenford, F<sup>ino</sup> C. Burleigh, F<sup>ino</sup> Padwick, S<sup>ro</sup> R. Deshays, S<sup>ro</sup> R. de Saussure, F<sup>ino</sup> Welch, F<sup>ino</sup> Schafer, fine S<sup>roj</sup> Deming kaj Gibson, blindaj studentoj el la «Per-



Fot. Berger.

GARDENA FESTO.  
La akcepto de la geurbestroj en Kings Kolegio.

kings Institution for the Blind», Boston, U. Ŝ. de A., kiujn niaj legantoj povis rekoni, kaj kiuj venis kun nia distinginda kolego Pro Harvey.

Du aliaj prezentadoj unuigis la kongresanojn en la nova teatro mardon kaj merkredon vespere. Ĉiuj partoprenantoj montris talente la similecon de la eiparolado. Cetere, ĝi estas unu el la plej atentindaj faktoj de la «Tria»: oni konstatis rimarkindajn progresojn pri tiu ĉi punkto kaj certe tio estas ŝuldata al la du antaŭaj kongresoj, kies partoprenintoj, profitinte la valorajn lecionojn ricevitajn en ili, iĝis siavice bonegaj profesoroj.

La ĉefaj «pecoj» de la prezentadoj estis: la unuan tagon, «Boks kaj Koks», sprite ludita de S<sup>roj</sup> Page (Boks), Ford (Koks) kaj Hulme (S<sup>ino</sup> Bauncer); kaj la duan tagon, «Bardel kontraŭ Pickwick» de Dickens, bonege ludita de aktoroj el naŭ diversaj nacioj, inter kiuj la tri «Trianoj» (Britoj), Privat (Svisoj), Beauchemin (Kanadano), Kühnl (Bohemo), D<sup>ro</sup> Fromageot (Franco), S<sup>ino</sup> Junck (Italino-Bohemino).

Deklamis aŭ kantis, antaŭ la teatraĵoj: la unuan tagon, F<sup>inoj</sup> Dorothy Chapman, Zablon d'Her, S<sup>ino</sup> Bolingbroke Mudie, S<sup>ino</sup> Rosa Junck, kiu tre bele deklamis la «Kongresa Preĝo» n de nia Majstro, S<sup>ino</sup> Guivry, nia talenta muzika verkistino kaj kantistino, S<sup>ro</sup> R. de Saussure; — la duan tagon, P<sup>ro</sup> Cart, S<sup>ro</sup> Doré, kiu je metia talento ludis spritan monologon, k. a. Komence, Baronino de Ménil ĉarmis la aŭdantaron per interesa parolado kun lumbildoj pri la infanaj kolonioj.

Ni jam aludis la paroladon kun lumprojekcioj de kolonelo Pollen, kiu multe interesis la aŭdantaron per la rakonto de sia evangelia vojaĝo tra Indio, dum kiu la verda stelo anstataŭis la krucon.

«Oni devas rimarki, skribas S<sup>mo</sup> Rousseau, ke la teatraĵoj estis anglaj teatraĵoj havantaj pure anglan karakteron. Pro tio ni devas ĝoji, ĉar ĝi pravas ke Esperanto taŭgas por konigi la alilingvajn literaturaĵojn, sed eble estus bone, se, flanke de naciaj verkoj, oni ludus internacian teatraĵon; t. e. teatraĵon originale verkitan, en kiu la personoj estus esperantistaj, kaj ankaŭ la sentoj; nun la esperantistaro havas sian historion, siajn morojn (kiel diris la majstro), siajn eminentulojn, sian specialan manieron rigardi la mondon. Teatraĵo aludanta tiun historion, tiujn morojn, estus tre certe granda allogaĵo.»

La sukceso de la jam ekzistantaj literaturaj verkoj esperantistaj pravigas tute nian amikon.

## Festoj. Amuzaĵoj. Flankaj kunvenoj.

Inter la eksterkongresaj kunvenoj, specialan lokon ni devas doni al la Esperantaj d'servoj, kiuj okazis la 11<sup>o</sup> de Aŭgusto, kun specialaj kaj ŝatindaj permesoj de la religiaj aŭtoritatoj, ĉu anglikana, ĉu katolika.

Matene okazis diservoj en «Great St. Mary's»-Preĝejo, laŭ la anglikana diservordo, kaj en la katolika preĝejo. En la unua oni legis la anglikanan preĝlibron kaj kantis himnojn laŭ bonegaj tradukoj de nia eminenta kunlaboranto



Fot. Snaps.

ĈE LA ĜARDENA URBO.



Fot. Geo C. Law.

EN LA ĜARDENA URBO.  
Parolado de Sro Ebenez Howard, la fondinto.

Pastro J. C. Rust, kaj niaj amikoj J. Rhodes, Bicknell, k. a.; multe impresa estis la prediko de Pastro Rust.

En la katolika preĝejo, parolis talente Pastro Richardson el Bruxelles. Li legis telegramon de Monsinjoro Giambiene, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti la kongreson, enhavantan la papan benon.

Vespere okazis nova anglikana diservo, sub prezido de Pastro Selbie.

Kompreneble, kaj grava fakto, oni parolis nur Esperante. Kaj estis vere grandioza spektaklo vidi kaj aŭdi milon da homoj el ĉiuj nacioj, el ĉiuj religioj — ĉar estis Musulmanoj kaj Indianoj —, kantantajn aŭ legantajn fervore himnojn kaj preĝojn kvankam por multaj la Dio ne estis la ilia, aŭ ne plu estis la celo de kredo malaperinta. Sed, tra la aldiaj paroloj kaj versoj, ĉiuj komuniis en Esperanto!

Riproĉeto farebla al la festoj kaj amuzaĵoj povus esti..., ke ili estis tro multnombraj dum la tagoj, kaj ke oni ne povis ĉiujn ĉeesti.

Mi citas la interesan viziton al la Ĝardena urbo, marde, kun ĝiaj domoj kaj dometoj ĉirkaŭitaj de aero kaj de arboj. Oni rimarkis speciale lernejon konstruitan, en kiuj la litoj de la lernantoj povos altiĝi ĝis la plafono por doni liberan spacon dum la tago.

Dum agrabla tetrinkado, Sro Ebenez Howard, nia fervora samideano kaj fondinto de la Ĝardena urbo klarigis la celon trafotan, Bela ilustrita gvidlibro de nia klera amiko P<sup>ro</sup> Hugon restos kiel agrabla memoraĵo por ĉiuj vizitintoj.

Tre interesa ankaŭ estis la milita Turniro, merkrede, al kiu ĉeestis multe da oficiroj tre afable akceptitaj de la anglaj kunfratoj.

Jauĉe D<sup>ro</sup> Zamenhof kaj multaj samideanoj ĉeestis al la festo de la Policaĵ Sportoj, kaj li prezentis konstantan pokalon donacotan ĉiujare al la policano, kiu plej bone plenumis siajn rugkrucajn devojn dum la jaro.

Vendrede, afabla akcepto estis farata al la esperantistoj de la provincestro kaj Vicgrafino Clifden, kaj de la urbestro kaj urbestrino de Kembridĝo, S<sup>ro</sup> kaj S<sup>ino</sup> Stace. En la belega ĝardeno de la Fratuloj, oni gaje promenadis sub majestaj arboj plezure marŝante sur verda dika herbotapiŝo, je la sonoj de la muziko kaj de la sakfajfado de l' Skota Gvardio.

Ni ne forgesu la agrablajn vizitojn en la admirindaj kolegioj, je la mezepoka arĥitekturo, kun fasadoj kovritaj per hedero, nek ĉarman promenadon sur la rivero Kem, kiu trairas la belegajn parkojn de la kolegioj.

Amikaj salutoj interŝanĝas aŭ de boato al boato, aŭ de boatoj al pontoj, kovritaj de samideanoj kaj ankaŭ de Kembridĝanoj mirigitaj. La belega «Sopira ponto» instigas komunan admiron.

Sed mankis tago tute dediĉita al la plezuro de l' renkontiĝoj kun samideanoj, kiun eble oni neniam revidos, kiel la ekskurso en Le Portel kaj en Anglujo dum la Unua, kiel la neforgesebla tago de Vevey dum la Dua; tagoj dum kiuj la majstro estis senceremonie kun la kongresanoj, meze de vera «granda rondo familia».

## La manĝoj en la Grenvendejo. La Balo.

Mirinda spektaklo estis la Grenvendejo, iĝinta en kelkaj horoj belega manĝejo. Pli ol 800 kongresanoj povis kune

manĝi, sidantaj ĉe multnombraj tabloj ŝarĝitaj per brilaj teleroj, glasoj, manĝilaroj. Vera armeo da servistinoj staris malantaŭ la gemanĝantojn, pretaj por mendi kaj alporti la elektitajn manĝaĵojn.

Ĉar, bedaŭrinde, ili ne jam parolas nian lingvon, sur la tablo kuŝis menuoj dulingvaj. Elektinte ian manĝaĵon sur la Esperanta paĝo, oni montris, sur la korespondanta linio, la anglan nomon. Tiel oni povis sen eraroj komprenigi sin.


Je sonorila sono, ĉiuj servistinoj aliris al la manĝodisdonejo; je alia sono, ili revenis ŝarĝitaj. Preskaŭ tiom da kelneroj alportis la trinkaĵojn.

Vere agrablaj estis la manĝoj en la Grenvendejo, ĉar ili liveris la eblecon renkontiĝi kaj paroladi kun samideanoj, dum la tiel okupiga kongreso.

Aŭdigi sin en la brua kaj gaja manĝeĝejo ŝajnis neeble. Tamen, per granda voĉoplifortigilo, sukcesis iafaje solvi la problemon la sindona organizinto kaj vic-prezidanto de l' kongreso, l' amiko Hobomo, kiam li bezonis doni klarigojn.

Novan transformadon ricevis la Grenvendejo vendrede vespere. Ĝi iĝis dependaĵon de la Urbodomo, kun kiu ĝi estis kunigita per tendo. En ambaŭ salonegoj okazis pitoreska kaj vere internacia balo, ĉe kiu intermiksiĝis ĉiunaciaj kostumoj, oficiraj uniformoj, akademiasaj roboj... Super tiu grandioza spektaklo de nacia diverseco blovis vento de frateco kaj de amikeco, regis unike la internacia komprenilo elpensita de nia kara Majstro, kaj — per ĝi — trafluis la cerbojn la interna ideo, kiu igas Esperanton tiel nekomparebla inter la ĉiutempaj geniaj eltrovoj.

Longe daŭris la balo, en kiu alternis la komunaj dancoj kun interesaj naciaj dancoj. Ili formis vere ĝojigan spektaklon por tiuj, kiuj preferis ĝui la okulan plezuron, aŭ lastafoje babiladi kun baldaŭ forirontaj samideanoj.



Kl. Leroy.

DUM LA MILITA TURNIRO.  
Hispanaj Oficiroj K<sup>no</sup> A. den Hengst L<sup>vo</sup> Kolonelo Matton  
(Holando) (Franco).



GAJA GRUPO.

*Dro L. L. Zamenhof, A.-J. Willeryck, H. Bolingbroke Mudie, L<sup>to</sup> Van Weyenbergh.*

« Sed, en la balo, estas tute nesufiĉe paroli internacie — rimarkigas al ni P<sup>ro</sup> Rousseau, oni devas ankaŭ danci internacie. Nu, tio tute ne ekzistas. Pri la polkoj, mazurkoj, la afero sufiĉe bone marŝas. Pri la valsoj, estas jam malpli facile akordiĝi; sed en la kvadriloj kaj aliaj plurparaj (po multparaj) dancoj, regis granda konfuzo kaj malordo. Estas do tre dezirinde ke, *tuj*, oni okupiĝu starigi internacian — t. e. esperantujan manieron danci, tiamaniere ke oni uzu ĝin dum la venonta kongreso, kaj ke oni ne estu devigata danci kvadrilon, ekzemple, nur inter Francoj, Germanoj, k. c... Oni povus sin turni al la Internacia Asocio de la dancistoj, kiu havis sian kongreson per Esperanto.

Mi aldonas, ke la lernado de la esperantista dancmankon estus nova allogaĵo por niaj grupaj kunvenoj ».

## La Ekspozicio.

Ĝi estis vere ĥaoso sen plano. La komercaĵoj senditaj estis parte flanklasitaj aŭ tute malfacile videblaj. Tamen, laŭ ni, tiu parto de la ekspozicio devus esti zorge preparita. Kiel ni jam ofte diris kaj neniam laciĝis diri, ni devas celi altiri la komercistojn kaj, por tio, konigi la firmojn, kiuj venis al Esperanto, per vera, serioza, elmontro de iliaj komercaĵoj, prospektoj, reklamiloj, k. t. p.

Meze de specimenoj lokitaj en angulo ni ekvidas ĉokoladon, ĉampanvinon, k. c. je la marko Esperanto. Sinjoroj Malone, Fratoj (Anon), Dublino, Irlando, elmontras sian «Bot-Poluron» (registritan), nigran kaj brunan, kiu estas ricevinta flateman laŭdon en diversaj lokoj de la mondo. Apud la ekspozicio de «Tra la Mondo» oni rimarkas la belan kaj ankoraŭ pli bonan poŝhorloĝon «L'Espero», por kiu la aĉetintoj ĉeestantaj la kongreson estas la plej bonaj reklamistoj. La nova kaj tute ĉarma modelo por sinjorinoj, kun la verda emajla steleto, allogas ĉiujn niajn graciajn samideanojn.

La du unuaj jaroj, binditaj, de nia gazeto, instigas la admiron de la vizitantoj. Oni rigardas interese kaj komparas la artikolojn kaj bildojn pri la du unuaj kongresoj.

Se oni havas la tempon kaj la eblecon, oni plezure rigardus malnovajn kaj kuriozajn Esperantajn eldonaĵojn pruntitajn de de nia kolego S<sup>ro</sup> Carlo Bourlet... sed oni estas tro premata.

Cetere, mi lasos la parolon al S<sup>ro</sup> Th. Rousseau, elĉerpante kelkajn atentindajn rimarkojn el notoj de li verkitaj kaj presitaj en nia venonta numero.

STELETO.



*Ni penadis, per multaj ilustraĵoj, igi vivantaj niajn notojn pri la kongreso, tiele ke ili estu agrabla memorajo por la ĉeestintoj kaj plaĉa prezentaĵo por la aliaj. Por ne sorbi tro da spaco, ni malgrandigis liom kiom eble la bildojn. Malgraŭ tio ni estas devigataj forigi kelkajn artikolojn, por tuj paroli pri urgaj aferoj: la estonta kongreso kaj la ĉiujara festo de la esperantismo.*

T. I. M.

## La estonta kongreso.

La *Kvara* inde daŭrigos la valoran efikon de la tri unuaj kongresoj.

Oni povas esti certa pri tio, se oni iom pripensas pri la rimarkindaj rezultatoj akiritaj en Germanujo de 4 jaroj: en Nov. 1903 fondiĝis la unua germana grupo, en Berlin; de tiu tempo, grandparte dank'al la fondo de nia bonega kunfrato «Germana Esperantisto», la grupoj senhalte naskiĝas. Ili jam estas 35 en Germanujo. Pluc, la gazetaro nacia iĝas pli kaj pli simpatia aŭ, almenaŭ, malpli kontraŭema, kio ankaŭ estas ŝuldata grandparte al nia kunfrato. Fine la scienca mondo ekrigardas Esperanton kun intereso, dank'al kelkaj famaj sciencistoj: Prof. Hugo Schuchard, Ostwald, Schmidt, D<sup>ro</sup> de la R. Magneta Observaĵejo ĉe Potsdam, ĵus nomita prez. de I. S. A.

La preparado de la *Kvara* donos novan antaŭenpuŝon al tiu jam grava movado: kaj ĝia esperebla sukceso forigos la lastan kontraŭdiron pri la novlatineco de Esperanto.

Kiam Esperanto estos venkinta la germanan lingvon, kiel ĝi venkis la novlatinajn, slavajn kaj anglan, kaj enpenetris la turkan kaj japanan, kiu do povos nei, ke ĝi estas la lingvo de ĉiuj, estante tiu de neniu aparte; kiam oni vidos ke ĝi varbis la komercemajn kaj industriemajn Germanojn kiel la praktikemajn Britojn kaj Amerikanojn, kiel la progremajn Japanojn, kiu povos diri, ke ĝi estas nur utopio, aŭ afero taŭga nur por revemaj homoj!

Ĉiu do penadu sukcesigi la «Kvaran», eĉ se ĝi estas certa, ke ĝi ne povos ĝin ĉeesti; ĉar ĉiu klopodo por niaj kongresoj estas bona semo por Esperanto.

## LA ĈIJJARA FESTO DE LA ESPERANTISMO.

*Dum la korekto de la presprovaĵoj, la 19<sup>an</sup> de Septembro, mi ricevis gravan cirkuleron de S<sup>ro</sup> O. Simon, plenigantan la sciigojn donitajn sur la sekvanta paĝo.*

*Ni tuj ĝin enpresas, ĝojante pro la rapida decido de nia Majstro, kaj la ne malpli rapida plenumo de liaj instrukcioj de S<sup>ro</sup> O. Simon.*

1<sup>a</sup> CIRKULERO.

*Tre estimata Samideano!*

Konforme al la decido de la Kembriĝa Kongreso D<sup>ro</sup> Zamenhof en letero de 5-9-07 elektis komitato por la fiksado de la dato de tutmonda Esperanta festotago, kaj komisiis min je la ofico de sekretario.

Jen la listo de la komitatanoj, proponitaj de D<sup>ro</sup> Zamenhof:

S<sup>ro</sup> Capé-Montrosier (Orleans),  
S<sup>ro</sup> Codorniu (Murcia),  
S<sup>ro</sup> Hankel (Dresden),  
S<sup>ro</sup> Kolonelo Pollen (London),  
S<sup>ro</sup> Otto Simon (Vieno),  
S<sup>ro</sup> Tabenski (Ejszyszki apud Vilno),  
S<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> Zamenhof (Varsovio).

Mi havas do la honoron inviti vin, ke vi konsentu esti membron de la komitato, kaj ke vi sendu kiel eble plej baldaŭ provizoran proponon pri la dato de la projektita festo. Laŭ propono de D<sup>ro</sup> Zamenhof mi publikigos la ricevitajn respondojn en la Esperanta gazetaro kun peto, ke la legantoj bonvole skribu al mi siajn opiniojn. El tiuj leteroj mi elverkos raporton, kiun mi sendos al ĉiuj komitatanoj kaj petos, ke ĉiu membro diru sian voĉdonon definitivan. La rezultaton mi sendos al la Centra oficejo kaj publikigos en la gazetoj. La kvaran kongreson ni petos je ĝia sankcio.

Nia Majstro provizore proponas:

- la daton de 17<sup>a</sup> de decembro (dato de la unua festo esperantista en la jaro 1876);
- la tagon de la printempa (por suda hemisfero-aŭtuna) tagnoktegalco, kiu povas servi kiel simbolo de neŭtraleco por la tuta homaro.

Kun esperantista saluto,

OTTO SIMON.

Vieno, VIII, Josefstad-orstr., 66, Austrujo.

Je stranga koincido, mi estis skribinta, la 16<sup>an</sup> de Septembro, al D<sup>ro</sup> Zamenhof por proponi al li la fagon de la printempa (aŭ aŭtuna) tagnoktegalco. Mi do multe ĝojis vidante, ke mi same pensis kiel D<sup>ro</sup> Zamenhof.

La 17<sup>an</sup> de Dec. estas tro *vintra*, kaj estis jam kontraŭparolita de multaj samideanoj, inter aliaj D<sup>ro</sup> Leon Zamenhof, pro ĝia proksimeco al Kristnasko.

Pro multaj kaŭzoj, kontraŭe, la tagnoktegalco taŭgas egale por ĉiuj popoloj, kaj estas tre dezirinde, ke ĝi estu elektita por nia festo.

Dezirinde ankaŭ estas, ke decido rapide okazu. Do, oni tuj skribu al S<sup>ro</sup> O. Simon.

A. MONTROSIER.



# La Dudekjara Jubileo de Esperanto.

Ĝi estis senegala sukceso; kaj vere, kiam « Tra la Mondo » decidis revivigi la proponon de Sro Otto Simon, tiel lerte entombigitan en Genevo, ĝi ne esperis tian prosperon. Oni povas diri, ke en ĉiuj landoj oni festis la Jubileon. Krom la multaj dokumentoj (ĵurnaloj, leteroj, raportoj, poŝtkartoj kaj fotografaĵoj) persone ricevitaj de « Tra la Mondo » pri tiu neforgesbla festo, ĝin pravas la legado de niaj naciaj propagandaj gazetoj.

Ĉie la festo estis fonto de ĝojo kaj de plezuro por la ĉeestantoj, kaj potenco apogo por la propagando, pro la multaj artikoloj publikigitaj en la lokaj gazetoj. Oni povas diri, ke, pro tio, ĝi estas la plej grava fakto de la finiĝinta jaro, post la kongreso, eble eĉ antaŭ ĝi, ĉar ĝi estis videbla, aŭdebla per la propraj okuloj kaj oreloj de multaj personoj, kunvenintaj el la diversaj regionoj, kiuj poste rakontis kaj priskribis tion, kion ili vidis.

Pro tio, kion mi ĉeestis en Château-Chinon, kie 150 ĝesperantistoj kunvenis el 10 burgundaj grupoj, mi ne timas tion certigi. La tuta urbo vivis nur per kaj por Esperanto dum unu tago, de la alveno ĝis la eliro; kaj la loĝantaro, la urbestraro, la muzikistaro havis nur unu celon; nin akcepti, akompani, vidi kaj aŭdi; kaj kia helpo por la turista propagando en tiu bela regiono!

Oni multe kuniĝis por festi la jubileon; la grupoj pli fortaj helpis tiel la pli malfortajn; iafoje ankaŭ, la junaj antaŭenpuŝis la pli maljunajn iom dormemajn.

Kaj tiu revokigo aŭ vekigo estos ankoraŭ bona flanko de nia ĉiujara festo. En kelkaj kunvenoj oni pridis-kutis propagandajn aferojn, organizadon de federacioj.

La amikoj, kiuj sendis raportojn senkulpigu nin se ni ne povas ilin enpresi: ili estas tro. Sed, plezure, kaj por helpi al la organizado de niaj estontaj festoj, mi citos la plej atentindajn el ili:

En Francujo festo en Carqueiranne: grupoj de Toulon kaj Hyères (projekto de Sud-franca federacio); festo en St. Amand-les-Eaux: grupoj de Lille, Valenciennes, Armentières, Béthune, Anzin kaj delegito el Dusseldorf (Germanujo) (bonegaj raportoj en la lokaj gazetoj, aparte l'Union Amandinoise kaj l'Echo Amandinois); festo en Château-Chinon: grupoj de Beaune, Châlon, Creusot, Mâcon, Dijon, Autun, Nolay, Paray-le-Monial, Savigny, k. a. kun ĉeestado de niaj fervoraj amikoj gesinjoroj Frenkel el Einissejsk, Siberujo (projekto de federacio, raportoj en la ĵurnaloj, precipe en l'Autunois, le Journal de Beaune); festo en Sens: grupoj de Sens, Montereau, Troyes (Le Petit Troyen, L'Avenir de l'Yonne); festo en Bourg: grupoj de Bourg & Lyon (tre longa artikolo en la grava Lyon Républicain); festo en Orléans: grupoj de Orléans, Blois, Chartres, Montargis, (le Républicain, l'Avenir, Le Progrès du Loirel). Fine okazis granda festo en Agde, kie kunvenis la grupoj de Béziers, Montpellier kaj Agde. (Le Petit Méridional, l'Eclair, la Dépêche, l'Union Républicaine, l'Avenir Agathois.)

Jen, pri tiu lasta festo, eltiraĵo el raporto de nia kunlaboranto Sro Fize, pravigantan tute tion, kion ni diris, pri la propaganda efikeco de niaj festoj:

« Mi nur diros, ke la tiel agrablaj sonoj de nekonata lingvo, la verda steleto de l'espero fiere brilanta sur nia brusto altiris la atenton de virinoj, viroj, fraŭlinoj, fraŭloj, kiuj scivoleme alproksimiĝis grandnombre kaj demandis pri ni, precipe kiam eĉ l'fino de la festeno, ĉirkaŭ tablo belege aranĝita en granda ĝardeno, aŭdiĝis la stranga harmonio de la « Vojo », kaj kiam la aero estis skuata de energiaj voĉoj kantantaj « La Marseillaise » — presitan en « L'Avenir Agathois » dank'al la nelacigebla profesoro Marcel, kaj kiam ĉiuj levante nian glason je la honoro de l' majstro amata kriadis: Eterne vivu D-ro Zamenhof! Vivu Esperanto!

Tial la neesperantistoj, eksciinte ke oni tuj ludos teatraĵeton, rapide interpremiĝas en la ĉambrego de l' Verda Kastelo baldaŭ tro malgranda por tiel granda aŭdantaro. Nia talenta blvodirinto profesoro Marcel, mallonge rakontas france la tute ĉarman komedieton de l' sprita Roksano (1), kaj sekve tre bone komprenas la publiko, kiu per tondra aplaŭdado ofte interrompas la geaktorojn. Nepriskribebla estas la entuziasmo elmontrata, kiam nia Beziers'a konsulo Sro Carles, (unu el la geaktoroj kun Fraŭlino Vally kaj via humila servanto) prezentas — post peŝado de l'ĉeestantaro — la aŭtor-aktorinon. Profitante el tia entuziasmo, la fervorega propagandisto, Sro Bel el Montpellier, faras priesperantan paroladon, tiel elokventan kiel spritan, longe akklamatan de l' aŭskultantaro. Post plezurega marpromenado, ravitaj kaj dankaj pro la senegala akcepto ricevita en Agde, kaj iom malĝojaj pro la finiĝo de tiu ĉarma festo, ni supreniras la vagonon, dirante al niaj karaj samideanoj « ĝis la venonta jaro en Beziers! ».

Sume, tiu tago estis plezurriĉa por la koro kaj fruktodona por nia beninda Esperanto, ĉar de tiam ni ĉiutage enskribas novajn geadeptojn. »

Fremdlande. — El Japanujo, de kie ni ricevis fotografaĵojn kaj poŝtkartojn, Malto, Alĝerio, fine Brazilujo, venis ankaŭ raportoj pri la festo, certigantaj ĝian internaciecon.

La ĉoj de ĝi, cetero, aŭdiĝis de nia kara majstro mem, kiu ricevis tiom da amemaj atestoj, ke li ne povis malhelpi sin longe aludi la Jubileon en sia bela malferma parolado.

Estas do strange, ke oni aŭdis kontraŭparolojn, post kiam nia amiko O. Simon, dum la dua labora kunsido, persone subtenis sian proponon. Inter aliaj pruvoj pri la neebleco de samtaga tutmonda festo, Sro Gaston Moch diris, ke ĉiuj nacioj ne agas samtempe; ekz. Brazilujo aŭ Japanujo dormas kiam Eŭropo maldormas kaj reciproke. Aliaj personoj diris, ke oni havas jam multajn festojn, ekz. festoj naciaj, festo de l'arbo, k. a. kaj ke, sekve, estas neeble starigi novan feston. En vigla respondo, nia ĉefredaktoro montris, kiel la ekzemplo de Sro Moch estas malbone elektita, ĉar Japanujo kaj Brazilujo festis, samtage kiam Eŭropo, la jubileon, kaj tion faris admirinde, montrante, ke ili ne dormas, kiam la afero estas labori por Esperanto. Li deklaris ĉi tiu meze de aplaŭdoj ke, kvankam festo de l'arbo estas grava,

ĉar ĝi estas la principo de l'esperantismo kaj de la interna ideo de Esperanto havas alian ja pli altan signifon; li rememorigis pri la aprobo, eĉ la deziro, de nia majstro pri la festo, dirante por fini ke la festo okazis ĉie, ke tio estas fakto nekontraŭirebla, al kies graveco atentigis D-ro Zamenhof mem.

Tiu ĉi levigis, dirante ke, persone, li efektive aprobas la principon, ne volante tamen ĝin altrudi.

Je granda plimulto, la principo de ĉiujara festo estis akceptata de la kongreso. Duafoje, Sro Montrosier savis la proponon.

Je la eliro, D-ro Zamenhof dankante nian redaktoron, iom melankolie deklaris: « Mi ne volas ĉiam konigi miajn deziraĵojn, ĉar iafoje malgraŭ tio, oni ilin kontraŭbatalas. »

Tre multe da personoj obstinis en sia sintenado. Granda sukceso por la penadoj de « Tra la Mondo » estas, ke Rektoro Boirac, kiu — lastajare — parolis kontraŭ la principo, prezidis la feston ĉe Château-Chinon kaj, en artikolo en la ĉefa franca gazeto: « Le Temps », citis ĝin kiel ateston pri la tutmonda disvastiĝo de Esperanto.

Pri la tago, nenio estas jam decidita. Ni petas niajn amikojn, ke ili tuj sendu siajn opinion kaj pravigitajn proponojn.

STELETO.



ONI FESTIS LA JUBILEON EN JAPANUJO!

(1) Tiu komedio, « Duonsurda », de la ĉarma Roksano, komenciĝas en nia duobla numero.

**La Brazila kongreso.**

Ĝi estis grandega triumfo, kaj ni vere bedaŭras, ke ni ne povas enpresi la tre interesan raporton ricevitan de nia fervorega amiko Backheuser, el kiu mi elĉerpas la jenon: «... Ĉiuj ĵurnaloj ĉiutage raportis pri ĝi... La solena malferma kunsido (1000 personoj) okazis sub prezido *persona* de Lia Moŝto Sro Pavares de Lyra, Ministro de l' Internaj aferoj. Nia fervora samideano, deputato Medeiros Albuquerque, faris elokventan paroladon pri nia lingvo kaj ĝia taŭgeco. La kardinalo kaj la Ministro de l' Publikaj Laboroj estis reprezentataj de sekrekarioj... Post la parolado oni inaŭguraciis la ekspozicion. La fotografistoj de la ĉefaj ĉiumonataj kaj ĉiutagaj gazetoj fotografis la diversajn fakojn... »

Kiel ĉefaj rezultatoj: organizado de la Ligo esperantista Brazila (Estraro: Sro Ev. Backheuser, Fred. Geyer kaj Pajva Araujo); kreado de atestoj pri kapableco kaj profesoroj aprobitaj, eldono de propagandaj verkoj, vortaroj, k. a.; regula funkciado de naciaj kongresoj....

Tiu ĉi mirinde finas la agadan jaron de niaj brazilaj fratoj. Ni ricevis pri ĝi bonan raporton de « **a Terra livre** », kaj du ilustritajn artikolojn en « **Fon-Fon** » kaj en la belega revuo « **Renascença** ». Tiu lasta gazeto enhavis, kiel aldonon, la belan



**PROBLEMOJ DIVENOTAJ (1<sup>a</sup> kvaronjaro).**

La divenintoj volu bone rimarki ke la lastajn problemojn erare vi havas en kapo — kion oni bezonas — malo de ideo ilin per 1a-2a-3a-4a-5a-6a numeroj.

**Problemo 7<sup>a</sup> (DE MI).**

. . .  
 . . .  
 . . . . .  
 . . .  
 . . . . .  
 . . . . .

parto de l' korpo — promencio — ĉiuj virinoj estas ĝi — kion vi havas en kapo — kion oni bezonas — malo de ideo post sidigo. (Oni legas horizontale kaj vertikale).

**Problemo 8<sup>a</sup> (DE L' SAMA).**

En ĉielo mi estas, tamen ne sanktulo; en infero vi min vidas, tamen ne diableculo. La tero min havas, sed ne la akvo, Kiu mi estas?

muzikan verkon *Trovita*, kun paroloj de Grabowski laŭ Goethe kaj muziko de la plej fama brazila verkisto Francisco Braga.

A. M.

**LETERFAKO.**

« La Novzelanda registaro starigis specialan oficejon, kiu celas doni plenajn informojn al turistoj kaj ĉiuj demandantoj pri Novzelando.

Oni sendos senpage plenajn sciigojn pri la lando, la komerco, la famaj vidindaĵoj aŭ io ajn.

Ĉiu oficistoj *devas* skribi kaj paroli Esperante.

Ni *petegas* la samideanojn, ke ili helpu la aferon skribante por informoj al la

Government Tourist office Christchurch, New Zeland. »

*El letero de Sro J. Hampton, Prez. de la Esperantista Klubo en Christchurch. (La gazetoj bonvolu represi).*

« **Saturday Evening Tribune** », la plej granda grava amerika ĉiusemajna ĵurnalo socialista, deziras esperantistajn korespondantojn en ĉiu lando pri la laboro kaj socialista movadoj. Redone oni sendos la ĵurnalon. (En ĉiu N<sup>o</sup> Esperantaj artikoloj.) Sin turni al Ch.-E. Randall, 1522, First Ave., Seattle, Wash. U. S. A. (Unuigitaj Ŝtatoj).



**Problemo 9<sup>a</sup> (DE L' SAMA).**

Al vortoj: ARO — AVO — ANO — ADO aldonu literon por ricevi novajn vortojn. La nomoj de la unuaj literoj de la novaj vortoj montrus novan vorton.

Anstataŭigante ĉe ĉia vorto la 2<sup>an</sup> literon, vi ankoraŭ ricevos kvar aliajn novajn vortojn.

**Problemo 10<sup>a</sup> (DE ESP. 100,000).**

Parto de kapo kaj aro; jen estas legomo !?

**Problemo 11<sup>a</sup> (DE L' SAMA).**

Multfoje komenco de letero — kaj vorto luda; jen estas fiso !?

**Problemo 12<sup>a</sup> (DE L' SAMA).**

Bruo sekvata de prepozicio, jen estas kukaĵo !?

**Problemo 13<sup>a</sup> (DE L' SAMA).**

Fine por fini tiun manĝadon prenu parton de kombisto kaj jen estas trinkaĵo !?

**Problemo 14<sup>a</sup> (DE L' SAMA).**

Kun V blua — kun T nigra — kun N blanka.

**Problemo 15<sup>a</sup> (DE L' SAMA).**

Antaŭ libro melu nomon de litero vi vidos beston.

**Problemo 16<sup>a</sup> (DE L' SAMA).**

Ĉiam kiam vi iras ien, mi estas, kiu mi estas?

CH. BRUNET.



**Premio al niaj gelegantoj.**

Por esti agrablaj por niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transportkosto en ĉiun Eŭropan landon krom Rusujo (Transmare kaj Rusuje, eksteren transporto kaj limdepago plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorloĝon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikejoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento, estas fotografe montrata ĉi apude (ĝustagrande por sinjoroj).

La poŝhorloĝo estas plene **garantiata**, bonege reguligita, radaro je ankro perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de « Tra la Mondo ».

Por **SINJOROJ**: Unika kvalito, supera, 30 fr. = 12 Sm. — Por **SINJORINOJ**, kun verdemajlita stelo: Ora, 90 fr. = 36 Sm.; arĝenta, 45 fr. = 18 Sm.

# GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

## GELLE FRÈRES

Parfumistoj

PARIS

La firmo korespondas Esperante.

Al samideanoj en la tuta mondo.

### GRAVA AVIZO.

**NI** povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn.  
**NI** akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.  
**NI** aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.  
**NI** sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l' Esperanto  
 (Internacia esperantista librejo)  
 15, Rue Montmartre  
 Paris.

Nova adreso



## Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la  
 Internacia Scienca Oficejo Esperantista  
 Ĝenevo-Svislando.

Kelkaj el la lastaj originalaj artikoloj:

- Universala kalendaro*, de CARLO BOURLET, Parizo (Franc.).
- Deveno de l' speco ĉe la lepidopteroj*, de P. A. H. MUSCHAMP (Angl.).
- Projekto pri internacia atlaso de « erozio »*, de E. CHAIX, Ĝenevo (Svis.).
- Evolucio de la religia ideo*, de D<sup>o</sup> L. VALLIENNE, Parizo (Franc.).
- Pri la uzebleco de la fortoj de l' homo*, de ANDRÉ BROCA, Parizo (Franc.).
- Nuna Stato de Internacia Bibliografio*, de J. HANAUER, Frankfurt a/M. (Germanujo).
- Projekto pri internacia monsystemo*, de R. DE SAUSSURE, Ĝenevo (Svis.).
- Pri kelkaj Merovingaj kaj mezepokaj kranioj trovitaj en Angers* (Franc.) de G. V. DE LAPOUGE, Angers (Franc.).
- Nova speco kaj nova gentonomo de formikoj*, de D<sup>o</sup> A. FOREL, Yverne (Svisujo).
- Psikologio de l' popolamasoj*, de P. LAPIDARI, (Ital.).

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono : 2,75 Sm. (2 spesmitoj 75 spesdekoj), aŭ 7 frankoj.

Unu numero : 25 spesdekoj aŭ 65 centimoj.

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & C<sup>ie</sup>* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusi*, Livorno, (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Rusujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Høst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).

# LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ  
 eliranta la 15-an de ĉiu monato.

LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ ESPERANTISTAJ  
 GAZETOJ FONDITA EN 1895.

ADMINISTRACIO :

Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris.

JARA ABONO :

Sen Literatura Aldono . . . . . 2 Sm. aŭ 5 fr. »  
 Kun Aldono . . . . . 3 Sm. aŭ 7 fr. 50

Specimena numero estas senpage ricevebla.

## Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio : Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

LA INTERNACIA TRINKAĴO !

## Viskio Esperanto

Registered trade mark      Marque déposée  
 N<sup>o</sup> 270,042.                      N<sup>o</sup> 13,195  
 Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la aŭŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

### Buchanan, Scott & C<sup>o</sup>

GARTHLAND STREET,  
 GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso : Esperanto - Glasgow.

MILKA  
 VELMA  
 NOISETTNE

# Suchard

LA BONGUSTEGAJ

ĈOKOLADOJ

POR MANMANGĪ.



## ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Ĝenevo 1906

Prezo : FRANCUJE. — 11 f50 la kesto da 2 boteloj  
 Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALILANDE. — 4 f ĉiu botelo prenita en S<sup>t</sup> Etienne, impostoj kaj transporto pluaj.

Generala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo :

J. B. Brunon-Chauvet  
 S<sup>t</sup> Etienne (France).

# Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

Ni akceptas nenian respondecon pro la nericevo de la gazetoj. Tiukaze, oni sin turnu senpere al la administracioj.

## ESPERANTAJ ORGANOJ.

**Eho Esperantista.** — Praktika kaj komerca. Ĉe S<sup>o</sup> Karl Steier, Plan-Ufer 41, Berlin S, Deutschland. Jare, 2 markoj (1 Sm.).

**Esperanta Ligilo.** — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — (1,20 Sm.). Ĉe S<sup>o</sup> Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

**Esperanto.** — Speciala anonco.

**Espero Katolika.** — TuteEsperante. Unu N<sup>o</sup> afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Étienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

**Espero Pacifista.** — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S<sup>o</sup> Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

**Foto-Revuo Internacia.** — Speciala anonco.

**Laboro.** — Monata bulteno de Tutmonda Labora Societo. Jare 3 fr. (1,20 Sm.), ĉe S<sup>o</sup> Paul Blaise, 4, rue Bourg-Tibourg, Paris.

**La Revuo.** — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D<sup>ro</sup> Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

**Socia Internacia Revuo.** — Pritraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

CHARLES MENDEL, ÉDITEUR  
118, Rue d'Assas, PARIS.

NOVA REVUO DE FOTOGRAFADO

# FOTO-REVUO

— Teksto franca kaj Esperanta. —

La Foto Revuo Internacia n'est pas la traduction en Esperanto de la Photo-Revue; c'est une revue indépendante dont les articles sont originaux ou puisés dans les meilleures revues du monde entier.

ABONO: Jare: 5 fr. (2 Sm.) por ĉiuj landoj.

## PROPAGANDAJ ORGANOJ.

**Afrika Esperantisto.** — Senpaga. 4, Rue du Marché, Alger, Algérie. Por afrikaj samideanoj **The American Esperanto Journal.** — Jare 2 Sm., 5 fr. Boulevard Station, Boston, Mass. (U.S.A.).

**Amerika Esperantisto:** 1 dol. (2 Sm.) l'America Esperantisto, 1239 Michigan Ave, Chicago.

**Antaŭien Esperantistoj.** — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

**La Belga Sonorilo.** — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1<sup>a</sup> de Septembro.

**The British Esperantist.** — Jare 4 fr. — Ĉe B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

**Brazilia Revuo Esperantista.** — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉe la administracio, Rua da Assembla, 46, Rio de Janeiro, aŭ ĉe « Tra la Mondo ».

**Ĉasopis Českých Esperantistu.** — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.). Adm. kaj Red.: Praha II — 313 — Karlovo namesti.

**L'Espérantiste.** — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

**Esperantisten.** — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta N<sup>o</sup>: 35 cent. (14 Sd.)

**Esperanto.** — Hungare kaj Esperante. Sciencia kaj literatura. 4 fr. (1,60 Sm.). Ĉe S<sup>o</sup> Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV.

**Finna Esperantisto.** — Ilarejo esperantista, Helsinski, Finnlando. 1 fr. 50 (0,60 Sm.) por la 1a jaro.

**Germana Esperantisto.** — Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate) Redaktata germane kaj Esperante. Jare 4 fr. (1,60 Sm.). Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

**Helpa Lingvo.** — Dane kaj Esperante. Abono 1,20 kr. (0,70 Sm.). Admin. ĉe P<sup>ro</sup> G. Mønster, Osterbrogade 54 B, Kopenhago O., Danujo.

**Japana Esperantisto.** — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 2 fr. 60 (2 Sm.). — N<sup>o</sup> 1a, 3 ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio.

**La Lumo.** — 5 fr. (2 Sm.). Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, n<sup>o</sup> 2299 V. Tirnovo, Bulgarujo.

**Pola Esperantisto.** — Pole kaj Esperante. — 2 fr. 50 (1 Sm.). Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

**Ruslanda Esperantisto.** — Ĉiumonata organo de la S-to « Espero »; — Jara abono 8 fr.: (3,20 Sm.). Ruslando, St Peterburgo, B. Podjačeskaja, 24, al la S-to « Espero. »

**Suno Hispana.** — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanar, 11, presejo — Valencia (Espana).

**Svisa Espero.** — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

## ESPERANTEMJ ORGANOJ.

**Les Annales politiques et littéraires.** — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

**Le Cycliste.** — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — D<sup>ro</sup>: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Etienne. — Abono: Francujo 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. (1 Sm.) Ĉiuj informoj pri la bicikloj kun meĥanismo por ŝanĝi la rapidumojn kaj pri higieno ciklista.

**De Luthof.** — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.). Sin turni al la presisto de Tra la Mondo, Bruĝo, Belglando.

**La Saturday Evening Tribune,** plej bona granda socialista amerika ĵurnalo, aperas ĉiusemajne, angle skribita, okpaĝe.

La fama aŭtoro kaj parolisto Walter Thomas Mills, ĉefredaktoro. Originalaj politikaj, sciencaj kaj aliaj artikoloj, kun bona Esperanta fako. Fremda abono: Dol. 1,50 ĉiujare (3 Sm.).

Sin turni al Ch. E. Randall, 1522 First Ave., Seattle, Wash., U. S. A.

**La plume Sténographique de France.** — Internacia revuo ilustrata de Stenografio Daktilografio — D<sup>ro</sup>: L. P. Canet, Adm., Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj skribaĵojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludk. t. p. Petu specimeno.

**Il Cittadino Italiano.** — Itala familia gazeto Via della Posta, 16. Udine.

**Tous les Sports.** — Oficiala Gazeto de l' Unigantaro de la Societoj Francaj de Sporto Atletaj (100,000 anojn) D<sup>ro</sup> Raoul Fabens, Rue N.-D. de Nazareth, Paris. — Konstanta rubriko en Esperanto de ĉiulandaj kunlaboretoj. Jarabono: Paris 9 fr.; Dep. 10 fr.; Al. 12 fr. — Por U. S. F. S. anoj jare: Paris 5 fr. Dep. 6 fr.; alil. 8 fr. — Unu numero 0.15 francaj stacidomoj. Petu specimeno. (1 fr. 0,40 Sm.)

Ĉiu esperantisto estas petata insisti ke librovendistoj de la urbo ĉiam tenu provizda niaj propagandiloj kaj elmontru en sia fenestroj niajn reklam-kartonojn. Ni sendafranke, ĉien en la mondo, centojn da « Ŝlosiloj » po 3.50 fr. kaj da « Tutoj » po 7.00 fr. Skribu

**Internacia Propagandejo Esperantista**

Merton Abbey, London, S. W.

## Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramoj) enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebligantan tuj kaj senprepre decifri kaj legi ĉion Esperante skribitan » Enmeteblaj en letro sen pliigo de la poŝtkosto

Jam estas pretaj la angla, dana, franca, germana, hispana, itala, sveda, portugala, donoj, kaj riceveblaj po

**3,50 frankoj la centon (100).**

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ efektiva valoro.

## L'Internacia Signo

estas la « VERDA STELO » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (p. kunmona mendo). Ĉe S<sup>o</sup> Emilo Gasse, 10 rue du Lycée, Le Havre (France).

**LA PLUS LOGIQUE des Méthodes appliquées et LA PLUS SIMPLE des langues suivies LES PLUS MODERNES des principes d'enseignement des langues.**

## Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25 (0,50 Sm.). Franco: Belgique, fr. 1.35. — Etranger, fr. 1,50

VERVIERS, Place Verte, 20.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.  
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.